

UDC 821.222.1
B20

S.N. Mozaffari Balouchi
(Said Baluĉi)

Antologia skizo de la persa literaturo

Tradukoj kaj klarigoj de:
Prozspecimenoj de 33 aŭtoroj aŭ libroj (102)
Poemspecimenoj de 24 poetoj

Serio Oriento-Okcidento, n-ro 58
Sub Aŭspicioj de UEA
en Konsulta Partnereco kun Unesko

Respondecaj redaktoroj *Dmitrij Ŝevĉenko, Anna Striganova*
Provlegis *Rob Moerbeek*

Said Baluĉi

B20 Antologia skizo de la persa literaturo / Саид Балучи. Ан-
тологический очерк персидской литературы. На языке эс-
перанто — М.: Импэто, 2021. — 164 с.
ISBN 978-5-7161-0311-5

UDC 821.222.1

ISBN 978-5-7161-0311-5

© Said Baluĉi, 2021
© Eldonejo «Impeto», 2021

Enhavtabelo

Antaŭparolo (A. Giridhar RAO)	5
El la libroj	7
Enkonduko	8
Unua Parto: Prozo	11
1– Ábu Mánstur Moámmári.....	11
2– Bál’ámi.....	14
3– La Granda Komentario.....	18
4– Bubákr Áhávájni.....	23
5– La libro “La limoj de la mondo”.....	25
6– La Pura Komentario.....	29
7– Ábolhásán Háráqani.....	32
8– Mo(v/ŭ)áffáq Herávi.....	35
9– La komentario de Korano (Kembríĝa).....	37
10– Aviceno.....	41
11– Ábu Já’qub Ságázi.....	48
12– Eshaq ben Ebrahim.....	50
13– Bu-Násr Moŝkan.....	51
14– Hoĝviri.....	53
15– Ábolfázl Bejháqi.....	55
16– Naser Hósro.....	57
17– Onsor-ol-Máali Kejkavus.....	60
18– Háĝe Ábdollah Ánsari.....	62
19– Nezam-ol-Molk Tusi.....	64
20– Surabadi.....	66
21– Algazelo.....	67
22– Omar Hájam.....	69
23– Ejn ol Qozat.....	71
24– Násrollah Monŝi.....	73
25– Nezami Áruzi.....	75
26– Áttar.....	76
27– Háĝe Násir.....	79

28– Rumi.....	81
29– Áta Málek Govejni.....	83
30– Sadio.....	85
31– EzzodDin Máhmud Kašani.....	92
32– Áli Ákbár Dehŕoda.....	94
33– Mohámmád Áli Ĝámalzade.....	96
Dua Parto: Poemoj.....	99
1– Rudáki.....	99
2– Rabee.....	100
3– Ferdoŭsi.....	101
4– Fárroŕi.....	108
5– Onson.....	109
6– Mánucŕehri.....	111
7– Fáhroddin Ás’ád Gorgani.....	112
8– Ásádi Tusi.....	113
9– Naser Ŝosro.....	114
10– Sánai.....	116
11– Ánvári.....	118
12– Nezami Gángávi.....	120
13– Ŝaŕqani Ŝervani.....	122
14– Áttar.....	124
15– Rumi.....	125
16– Sadio.....	127
17– Hafizo.....	129
18– Saeb.....	130
19– Iráĝ Mirza.....	131
20– Párvin E’tesami.....	132
21– Nima Juŝiĝ.....	133
22– Áhmád Ŝamlu.....	135
23– Sohrab Sepehri.....	139
24– Foruq Fárroŕzad.....	144
Piednotoj.....	148
Dankoj.....	161

Antaŭparolo

A. Giridhar RAO
Novembro 2020
Bengaluro, Barato

Je la unua fojo en la Serio Oriento-Okcidento aperas antologio de persa literaturo. (La tuta listo aperas en la Esperanto-vikipedia paĝo pria.) Tiu ĉi apero en nia Esperantujo gravas pro du kialoj. Unue, pro la enhavo de la antologio mem; kaj due pro tio kion la apero substrekas pri Esperantujo.

La elpersigon faris S. N. Mozaffari Balouchi (Said Baluĉi). Li informas nin, ke tiu ĉi cent-kelkpaĝa antologio estas mallongigo de 600-paĝa libro, kiu mem estas unu-libro de du-voluma “Trezorejo” de persa literaturo.

Kaj “Trezorejo” ĝi ja estas! Post kelkaj bazaj klarigoj pri la literumado uzata en la antologio, oni unue legas fragmentojn de Prozo de Ábu Mánstur Moámmári (mort. 961) ĝis Mohámmád Áli Ĝámalzade (1892 – 1997); same ampleksa estas la sekcio Poemoj, de Rudáki (859 – 940/941) ĝis Foruq Fárroĥzad (1934 – 1967). Kiel jam diris nia gvidanto, “Por esti honesta kaj kiel eble plej neŭtrala, mi mem ne elektis la fragmentojn por traduki, krom kelkajn... Mi tradukis la elekton de aliaj, kompetentaj majstroj” (p. 8).

Ĉiu verkisto estas enkondukita per kelkaj linioj de biografiaj informoj. Sed ne nur pri sekaj datoj temas. Ni ricevas ankaŭ sciigojn pri ilia aktuala reputacio. Ekzemple pri Omar Ĥajam (Ĥájjam) (1048? – 1132?), oni informas nin, ke “en nuntempaj iranaj universitatoj, Ĥajam, kiel poeto, ne estas bonvena” (p. 71). Aŭ pri Foruq Fárroĥzad (1934 – 1967): “Ŝi estis avangarda poetino dum tempo kiam paroli pri modernaj konceptoj, ĉefe pri korpaj plezuroj, estis tabuo kaj plej ĉefe, se virino verkas pri tiaj aferoj, estus ankoraŭ pli malakceptebla” (p. 144 – 145).

La pli larĝa kunteksto

Jam en 2004, Abel Montagut sciigis nin pri la neegaleco en la monda kultura trafiko de tradukado. Inter la tradukaĵoj listigitaj en

la *Index Translationum* de Unesko, la fontlingvoj por 70% el ili estis nur kvar lingvoj: la angla, rusa, franca kaj germana (nur la ordo de tiuj ŝanĝiĝis en novembro 2020; vidu la ligilon en la referencoj). En la sama periodo en Esperantujo aperis 344 tradukaĵoj, duono el ili de la ĉina, vjetnama, nederlanda kaj japana – kaj la ceteraj de pluraj aliaj lingvoj. Simile inter 1991 kaj 2003, Montagut raportas, ke en Esperantujo nur 30% estis el tiuj kvar “grandaj” lingvoj; 70% venis de pluraj “malgrandaj” lingvoj.

Do tiu ĉi irana Trezorejo ja estas plia indikilo en Esperantujo de la kultura justeco inter la lingvoj kaj literaturoj de nia mondo. Akiru ĝin kaj legu ĝin!

Referencoj

Montagut, Abel. 2004. ‘La contribució de la llengua internacional esperanto a la supervivència de la diversitat lingüística’. En la kataluna: https://www.linguapax.org/wp-content/uploads/2015/03/3_montagut.pdf kaj en la angla: https://www.academia.edu/39601178/Abel_Montagut_Romance_Philologist_The_Contribution_of_the_International_Language_Esperanto_towards_Linguistic_Diversity.

Unesko. *Index Translationum*. ”Top 50 Original languages”. La “pintaj” kvar fontlingvoj restas la angla, franca, germana kaj rusa. <http://www.unesco.org/xtrans/bsstatexp.aspx?crit1L=3&nTyp=min&topN=50>

Vikipedio. Serio Oriento-Okcidento, https://eo.wikipedia.org/wiki/Serio_Oriento-Okcidento.

Antologia skizo de la persa literaturo

El la libroj:

- 1– Gánĝine (La trezorejo)
- 2– Gánĝe Sohán (La trezoro de la parolo)
(kaj publikaj retejoj)

La du menciitaj libroj estas verkitaj de: D-ro Zábihollah Sáfa, eminenta universitata profesoro. Tiujn du librojn mallongigis kaj en unu volumo eldonis sub la titolo “Gánĝ o Gánĝine” d-ro Sejj-ed Mohámmád Torabi, universitata profesoro. (Eldonejo Qoqnus, Tehrano, Irano, aŭtuno 1372 irana/ 1993 p.K. 603 paĝoj).

Elpersigis: S.N. Mozaffari Balouchi (Said Baluĉi) por sia magistriĝo ĉe la Azad-Universitato, Centra Tehrano, sub la gvidoj de:

- 1– Prof. d-ro M.H. Sahebzámani
- 2– Prof. d-ro S.M. Torabi
- 3– Prof. d-ro Ĝálil Táĝlil

Studjaro: 1376-77 (irana)/ 1998 p.K.

Lingva revizio: 2020

Enkonduko

Literaturo estas spegulo de la vivo, vivo vivita, vivo vivata kaj vivo revata. Irano havas longan historion, longan vivon kaj kompreneble longdaŭran literaturon. Por esti honesta kaj kiel eble plej neŭtrala, mi mem ne elektis la fragmentojn por traduki, krom kelkajn (21–24 en la poezia parto kaj 32–33 en la proza parto). Mi tradukis la elekton de aliaj, kompetentaj majstroj.

Mi estis juna kiam mi trovis la internacian lingvon. Tiom juna ke mi tuj ekamis ĝin. Mi komprenis ke la nura amo ne kapablas trabori kulturajn murojn inter la popoloj. Mi komprenis ke la amon oni devas miksi kun scio kaj laboro.

Korespondante kun multaj homoj el pluraj landoj, mi konstatis ke “La vero” troveblas ĉe multaj homoj. Mi konstatis ke la religioj, lingvoj, ideologioj, kulturoj, naciecoj ktp. estas nur “nomoj” kiuj povus apartigi la homojn unu de la alia, se oni ne profunde konus unu la alian kaj aliflanke, povus esti allogaĵoj surbaze de kiuj la homoj interesiĝus unu al la alia.

Laŭ mi, por la literaturo, ni malrapide, tamen certapaŝe kaj efike, povus iri al interliteraturo, interkulturo kaj poste transkulturo. Por krei verajn interkulturaĵojn kaj transkulturaĵojn, neniu nacia lingvo povus esti taŭga instrumento, ĉar ĉiu nacia lingvo portas kulturo(j)n de nacio(j).

Nur neŭtrala kanalo sukcesas plene transdoni la bezonatajn kulturelementojn de diversaj kulturoj por krei (almenaŭ) la kernon de la transkulturo, kulturkomunaĵo, el kiel eble plej granda parto de la mondanoj.

Tial mi opinias ke la tradukado de literaturaĵoj el diversaj lingvoj en Esperanton estas unu el la plej gravaj taskoj de ni esperantistoj.

Tio ne estos tuja solvo por la konfliktoj inter la homoj, tamen necesa kaj fareda paŝo.

Nacilingvaj tradukaĵoj al kutimigas nin ĝui tiujn erojn de la fremda literaturo kiujn ni komprenas surbaze de niaj denaskaj nacikutimoj kaj gustoj. Sed ŝajnas al mi ke surbaze de Esperantaj tradukaĵoj formiĝas pli ampleksa komunliteraturo.

Klarigoj:

– Por transskribi la persajn vortojn mi uzas la Esperantan alfabeton. Plus **Ā** por pli mallonga **A** (Ĉar la diferenco estas tre granda kaj mi ne povas rezigni ĝin. Ekzemple *bad*= vento kaj *bád*= malbona, *bá'd*= poŝte), **Q** por **Ĝ** kaj **ق** (kiel la prononco de la franca **R** en la franca vorto *bonjou**R***– ofte en anglaj transskriboj tiu konsonanto estas skribita per *gh*) kaj simplan (‘) por montri **ع** aŭ **ـ**. Mi ne transskribas la skriban formon, sed la elparolan formon. Se ekzistas granda diferenco, mi montras ambaŭ formojn. Se ekzistas Esperanta formo de nacia vorto, mi preferas ĝin. Ekzemple: **هارون الرشيد** (perse kaj arabe) = Harun Āl-Ráŝid (skriba formo surbaze de la origina skriba formo) = Esperanta Harun-al-Raŝido.

– Pri la specialaj ne-PIV-aj vortoj mi uzas la vortojn kiujn oni povas trovi en Vikipedio. Kelkaj ekzemploj estas: *Halala* (Islamŝarie permesata, mal-vorto de Harama), *Harama* (Islamŝarie malpermesata, mal-vorto de Halala), *Vakfo* (Islama fideikomiso aŭ donacio aŭ konsekraĵo), *Azano* (laŭtkrio kiun faras muezino), *Ĝihado* (sankta porislama batalo) ktp.

– Ĉe genitivo, la persa lingvo uzas **e** ekzemple: **Ábu-Mán-sur-e Moámmári**, mi skribis **Ábu Mán-sur Moámmári**. Se vi serĉos interrete, vi trovos **Abu Mansur Mamari** (angle). Do, por serĉi pli da detaloj pri ĉi en la interreto, se vi ne trovos la koncernan nomon kiu estas skribita per Esperantaj literoj aŭ entenas supersignojn, bonvolu uzi la proponitajn literojn: **Á=A**, **Ĉ=CH**, **Ĝ=J**, **I=Y**, **J=Y**, **Ĥ=KH**, **Ĵ=J** aŭ **ZH**, **OŬ=OW**, **Q=GH**, **Ŝ=SH**, **U=OO** aŭ **OU**).

Mi konfesas ke tiurilate ne ĉiam estas facile trovi persajn nomojn, ĉar kvankam la persa oficiala transskribo estas bazita sur la angla alfabeto, tamen oni ne ĉiam obeas la normojn aŭ unu-

formecon. Ridinda ekzemplo estas ke en mian iranan pasporton oni transskribis mian familian nomon *Balouchi* kaj en tiun de mia frato *Baloochi*, kvankam en la persa skribo tiu nomo havas nur unu formon kaj prononciĝas same (بلوچی = Baluĉi).

Pri la datoj:

– p.H. = Post-Heĝira Luna = Islama kalendaro (vid. PIV).

– irana = Post-Heĝira Suna = nuntempa irana kalendaro kiu komenciĝas ekde la heĝiro sed daŭras surbaze de la orbito de Tero ĉirkaŭ Suno.

– p.K. = Post-Kristo = Gregoria kalendaro komunuza de la nuntempo. Kie mi ne metas specialan signon, mi celas ĉi tiun daton.

Unua Parto: Prozo

1- Ábu Mánstur Moámmári

(mort. 961)

ابومنصور معمرى

Ábu Mánstur Mohámmád filo de Ábdollah Moámmári estis veziro de la tiama ĉefkomandanto de la provinco Ĥorasano. Oni mortigis lin en la jaro 961 p.K.

Kiam la ĉefkomandanto arigis historiistojn por verkigi libron pri la Prairano, li estrigis Moámmári-on al ili. Moámmári verkis antaŭparolon por la finita historilibro (957 p.K.), kiu el inter la ĝis nun trovitaj oldverkoj, kies verkodatoj estas konataj, estas la plej antikva.

En tiu antaŭparolo la arabaj vortoj estas malmultaj, kompare kun la nuntempa persa lingvo, en kiu troviĝas multaj arab(deven)-aj vortoj. La prozstilo estas facila kaj multaspekte simila al la lingvo “Páhlávi” (Laŭ PIV: Parsia. La oficiala lingvo de Persio antaŭ la atako de la araboj). Jen fragmento el tiu libro:

Fondo de Ŝahname (1)(37)

La antaŭparolo de “Ŝahname”, verkita de Ábu Mánstur Moámmári, la veziro:

Unue, tiel diras la aŭtoro en la verko: Ekde kiam ekestiĝis la mondo, la homoj serĉis la sciencon, estimis la parolon kaj konsideris ĝin kiel la plej valoran heredaĵon. Ĉar en tiu ĉi mondo la scienco igas la homojn pli respektindaj kaj pli valoraj.

Se oni konvinkiĝus ke restas nenio eterne, oni penus eternigisian bonfamoni kaj malhelpi ĝian pardonon per loĝebligado, konstruado, montrado de kuraĝaĵoj, saĝaĵoj kaj sindonado, ankaŭ instigus aliajn homojn al inventado de novaj aĵoj.

Kiel faris, ekzemple, la reĝo de baratanjoj; li verkigis la librojn “kálile kaj Demne (2)”, “Ŝanag (3)” kaj “Ram kaj Ramin”.

Alia (ekzemplo) estas Má'mun, filo de Harun-al-Raŝido (ambaŭ estis islamaj kalifoj), kiu havis dignon de la reĝoj kaj ambicion de la famuloj. Iun tagon, dum kunsido kun korteganoj, li diris:

– Oni devus, dum sia vivo, laŭpove strebi restigi ion de si mem, por eternigi sian nomon.

Ábdollah ben Moqáffá', lia sekretario (4), diris:

– El la ŝaho Ánuŝervan (el la Sasanida dinastio, 296–652) postrestis io, simile al kio postrestis el neniu alia reĝo!

Má'mun demandis: Kio estas tio? Li (Ben Moqáffá') respondis:

– Li (la ŝaho) ordonis importi libron (el Barato), kiun tradukis Borzuje (Borzuje La Kuracisto) en la Parsian lingvon. Tiu libro, por kiu la ŝaho elspezis 500 azenŝarĝojn (5) da arĝentmoneroj, memorigas la nomon de la ŝaho por ĉiam.

Má'mun postulis la libron kaj trafoluminte ĝin ordonis al sia sekretario arablingvigi ĝin el la persia lingvo.

Kiam Emiro Sáid Násr ben Áhmad (reĝo el la Samanida dinastio. 874–1004) aŭdis tion, ĝi plaĉis al li kaj li ordonis al sia veziro Ĥaĝe Bál'ámi ke li traduku la libron el la araba en la persan.

La libro eldoniĝis kaj fariĝis ĉies posedaĵo.

Li ankaŭ ordonis al Rudáki (persa poeto fama kiel “La patro de la persa poezio”) versigi la libron.

Tiel “Kálile kaj Demne” famiĝis ĉe la kleruloj kaj la nomo de li (Emiro Sáid) restis viva kaj la libro fariĝis lia memoraĵo.

Poste la ĉinoj aldonis pentraĵojn al la libro por plaĉi al la legantoj. Emiro Ábumánsur Ábdorrázzaq estis despota emiro, tamen digna kaj reĝaspekta kun liberalaj pensoj. Li devenas de granda kaj nobela familio, el iranaj militistoj.

Aŭdinte pri “Kálile kaj Demne” kaj pri la reĝo de Ĥorasano, li eksopiris postrestigi memorajon. Tial li ordonis al sia veziro Ábumánsur Ál-moámmári inviti la feŭdestrojn, klerulojn, vojaĝintojn kaj tiujn kiuj iarimede havas informojn pri la koncernaj libroj. La sekretario de Ábumánsur sendis leterojn al aliaj urboj de Ĥorasano kaj alvenigis multajn saĝulojn, inter tiuj: Maĥ la saĝulon de Ĥorasan, Ázhari Jázdandad filon de Ŝapur el Sistan, Mahovi Ĥorŝid filon de Báhram el Ŝapur, Ŝazan filon de Borzin el Tus...

Tiuj kunsidis por kolekti la skribaĵojn pri la reĝoj kaj biografiojn pri ilia vivo; ĉu ili estis justuloj aŭ male, ĉu ili faris militojn aŭ pacon, ktp.

La biografioj temis pri reĝoj de la periodo inter la Unua Reĝo (44) kiu inventis la hommanieran vivon, ĝis la reĝo Jázdgerd (la 3a), kiu estis la plej lasta reĝo de la persoj. (antaŭ la atako de la araboj). La dato (de la eklaboro) estis la monato Mohárrám (6), jaro 346 post la heĝiro de la plej bona homo en la mondo, Mahometo, al kiu estu la saluto de Alaho. (postheĝira luna= arab/islama kalendaro/ p.H.L.) (7)

La libron oni nomis Ŝahname. La kleruloj povas legi ĝin kaj sciiĝi pri la konduto de la ŝahoj, regantoj, famuloj, situacioj de la ŝahoj kaj iliaj kielfaradoj. (Oni povas legi kaj) lerni pri bonaj reguloj, justa juĝado, konsultiĝo, administrado, militaj aferoj, kiel venki super landoj, venĝmilitoj, atakado, sindetenado, kiel petadi ktp. Oni trovas tiajn ĉi aferojn en tiu ĉi libro.

Do, ili verkis la libron pri ŝahoj –Ŝahname– kaj raportis (la rezulton). Nun multaj homoj havas ekzempleron. En la libro legeblas mitaĵoj kiuj al (simpla) leganto ŝajnas troigoj. Tio ŝajnas alimaniere se oni scius la verajn signifojn de tiuj aferoj. (Aferoj) kiel la morto de Ĝámŝid fare de lia frato, la ruliĝanta ŝtono kiun Afáridun (Ferejdun) (43) haltigis per sia piedo, la serpentoj kiuj kreskis sur la ŝultroj de Záhhak...

Ĉiuj ĉi aferoj estus komprenataj ĉe edukitoj kaj saĝuloj. Eble nur la malamikoj fikritikus tiujn ĉi. Do, la saĝaj verkantoj devas zorgi pri sep aferoj de la verkado: 1– La esenco de la verko. 2–

La digno de la verko. 3– La arto kiel verki. 4– La alparolato de la verko. 5– La kvalito kaj la kvanto. 6– La respekto al la patrono/subtenanto. 7– Respekti la morallimojn.

Per la legado de Ŝahname, ni celas sciigi pri la agoj de la ŝahoj kaj la klopodoj de popoloj. Al ĉiu utilas la libro. Ĝi donas ĝojon kaj forigas la malĝojon. Ĝi montras vojon. Tiun libron, kaj la ŝahname-ojn ĝenerale, oni legas por du celoj, nome:

1– Sciigi kiel agis kaj kondukis la reĝoj; por lerni kiel agi ĉe aliuloj. 2– En ili troveblas rakontoj kiuj plaĉas al la oreloj kaj kiujn indas praktiki.

En ĝi troveblas belaĵoj kaj saĝaĵoj, kiel (la konvinko ke) kontraŭ ĉiu bona aŭ malbona faro, estos reago. La libro parolas ankaŭ pri perforto kaj afablo, seriozaĵoj kaj ŝercoj, sindetenoj, la ritoj pri eniĝo kaj eliĝo (vastasence povus signifi “komenci kaj fini” ajnan laboron), admonoj, esti kontenta kaj respektema pri la vivo/sorto...

2– Bál’ámi

(mort. 974?)

بلعمی

Ábu Áli Mohámmád filo de Ábolfázl Mohámmád Bál’ámi estis kaj veziro kaj verkisto en la kvara jarcento p.H. (10-a p.K.). Lia patro, Ábolfázl Bál’ámi (la patrono de Rudáki) longtempe estis la ĉefveziro de Esmail Áhmád Samani, Áhmád Esmail kaj Násr filo de Áhmád. Bál’ámi signifas bál’áman-anon kaj Bál’áman estis vilaĝo proksime de la urbo Márv (en la tiama Granda Ĥorasano).

Ábu Áli Bál’ámi kelkiom da tempo estis veziro de Ábolfávares Ábdolmálek filo de Nuh (954– 961) kaj Ábu Saleh filo de Mánstur filo de Nuh (961–976). Plenumante la ordonon de tiu ĉi lasta reĝo, li tradukis la libron “Tábári-Historio”. Lia morto okazis en la jaro 363 p.H. (974 p.K.).

Bál’ámi tradukis la verkon de Mohámmád Ĝárir Tábári (mort. 922 p.K.– la origina verko estas en la araba lingvo pri ĝenerala historio) sed multfoje li mallongigis la tekston kaj kelkfoje

li aldonis ion al la libro el aliaj verkoj. Tial lia traduko similas al memstara verko. Komence de la libro li parolis pri la ordono de Ābu Saleh Mānsur filo de Nuh Samani (Samanida dinastio) kaj sia eklaboro en la jaro 352 p.H. (963 p.K.).

El tiu libro troveblas multaj manskribitaj versioj. Jam ĝi estas presita foje en Barato kaj foje en Irano. Jen fragmento el tiu libro:

Ŝapur Zoláktaf شاپور ذوالاکتاف

Informiĝis la mondo pri Ŝapur (li naskiĝis). Persio fariĝis lia reĝlando. La regantojn de la turkoj, Romio kaj Barato atingis la raporto ke “la persoj estas malfortaj ĉar super ili reĝas bebo en lulilo, kiun oni reĝigis nur nome, sed anstataŭ li regas aliuloj, ĝis li adoltiĝos. Neniu certas ke la reĝido restos viva.”

El la regantoj de la turkoj kaj baratanoj multaj ekatakis Persion. Ĉiu najbaro okupis la plej proksiman teritorion. La araboj tamen estis pli avidaj ol aliaj ĉar ili estis pli proksimaj kaj pli malriĉaj. El la idoj de Ābdol Qejs, el Bahrejno, kaj aliaj triboj, kuniĝis granda amaso kaj atakis Persion. Ili perforte prenis de la homoj iliajn havaĵojn, forpelis la ŝafojn kaj uzurpis la terojn. Neniu povis bari la vojon al ili. Ili restis dum kelkaj jaroj. Ja la lando estis je la nomo de bebo (t.e. la reĝo de la lando estis nur bebo). Neniu alia havis sufiĉe timigan karismon. Nenia korpuso formiĝis ĝis Ŝapur fariĝis plenaĝa.

Li estis nur kvinjara kiam ekaperis el li saĝo kaj prudento. La unua saĝa eldiro de li okazis jene: Tranoktinte sur la tegmento de la palaco en Tisfun (Ktesifono/ Ctesiphon) li vekiĝis frumate pro bruado de homamaso. Demandinte la kialon li aŭdis ke tiu bruvo venas el la homoj frekventantaj la ponton. Iu volas iri, alia volas veni. Okazas kontaktoj. Leviĝas bruoj.

La postan tagon Ŝapur alvokis la veziron kaj diris al li: “Ordonu ke oni faru du paralelajn pontojn, unu tiudirekten, alian ĉi-direkten”. La popolo ĝojis trovinte lin inteligenta. Antaŭ la sunsubiro de la sama tago oni finkonstruis la kroman ponton. La homoj frekventis ambaŭ pontojn kaj okazis nenia homamasiĝo.

Ĉiu-tage, dum la kreskado de Ŝapur, la veziro plendis ĉe li pro iu el la landaj problemoj. Ŝapur proponis por ĉiu malfacilaĵo taŭgan solvorimedon. Iun tagon la veziro, eniĝinte, plendis ke la landlimaj soldatoj kaj militistoj kies devo estas reteni la malamikojn, kiel araboj, romianoj, turkoj ktp, estas maltrankvilaj kaj iafoje forlasas siajn lokojn. Tra tiaj ellasitaj lokoj malamikoj eniĝas la reĝlandon, okupas, ruinigas kaj ade proksimiĝas. Ŝapur respondis: “Ne zorgu, estas facile. Nome de mi, skribu leterojn al tiuj korpuseroj ke “Mi informiĝis pri vi. Jam de longe vi restadis ĉe la limoj. Mi permesas al tiu kiu volas, reveni al sia urbo. Sed kiu volas resti, tiun mi rekompencos”. La veziro kaj armeanoj ĝoje diris: “Se li multajn jarojn reĝos kaj akiros sperton, ne eblus pripensi pli bonan respondon”. Ili skribis la leterojn kaj tiuj militistoj honeste restis ĉe la limoj.

Ŝapur fariĝis 16-jaraĝa kaj ekscipovis rajdi kaj uzi armilojn. Li deklaris antaŭ la popolo, antaŭ granduloj kaj la armeanoj: “Mi kondutos kiel miaj patroj. Kun vi justema mi estos. La landon mi beligos kaj la malamikojn mi forpelos. Laŭ mi la plej malbonaj malamikoj estas la araboj. Ili envenis la persan reĝlandon, malbonfaris, maljuste murdis la homojn kaj rabis iliajn havaĵojn. Mi atakos ilin. El la tuta militistaro mi elektos mil virojn, kiel mi plej bone scipovas elekti, kaj kun ili mi iros reordigi la imperion. Ĝis mia reveno mi nomumos anstataŭanton”.

La ĉeestantoj ekstaris, benis lin kaj diris: “Por la reĝo ne taŭgas mem forveturi. Li havas multajn soldatojn kaj generalojn. El inter ili iun li nomumu kiel estron de la armeo kaj lin la reĝo alsendu reordigi la aferojn. La reĝo mem bonvolu resti”.

Li neis. Denove ili diris: “Do, la reĝo kunigu la tutan armeanon, ja ili utilos”. Nenion li respondis.

Elektis li mil virojn kiuj po unu povis batali kontraŭ cent malamikoj. Tiam la reĝo diris: “Tiuj ĉi estas cent mil viroj”. La reĝo parolis al la militontaj elektitoj: “Mi malpermesas al vi la havaĵojn de la malamikoj, escepte de tio kion mi donos al vi. Vi

nur batalu, venku kaj lasu neniun vivanta. Ne etendu viajn manojn al la havaĵoj.”

La araboj alproksimiĝinte la limajn urbojn tra la marbordo kaj Bahrejno, jam okupis tiujn urbojn de Persio. La ŝaho mortigis ĉiujn arabojn kaj lasis neniun viva. Poste tramare li iris en Bahrejnon kaj eniĝinte ĉiun urbon, unue li mortigis la estrojn. Ĉiun araban kiun li trovis li mortigis. Reveninte Háĝár-on (urbo en tiama Jemeno) li trovis tie arabojn el la triboj Bánitámim, Bákrin , Il kaj Ábdolqejs, kaj ĉiujn li mortigis. Tiel ke ekfluis riveretoj da sango. Neniu sukcesis eskapi. Escepte de tiuj kiuj fuĝis en kavernojn aŭ maron. Post tio li ekveturis en la landon de Ábdolqobejs-oj kaj ĉiun araban kiun li trovis tie, li mortigis. Tiuj kiuj fuĝis al sabloj de la dezerto, mem mortis tie. Neniu irana soldato etendis manon al varo por eviti kroman ŝarĝon.

Poste, la reĝo kun la militistoj ekveturis al la dezerto kaj persekutis la arabojn en Jemame kaj arabojn kiujn ili trovis ili masakris. Ĉiun puton en la arabaj landoj el kiu la araboj trinkis akvon, li detruis kaj kotoplenigis. Poste ili iris al Medino kaj mortigis aŭ sklavigis ĉiun araban kiun ili trovis tie. Reveninte el Medino ili trapasis Sirion (Ŝam kaj Háláb/ Alepo> levantenoj), Bákr-on, Táqláb-on kaj mortigis ĉiun kiun ili trovis.

Inter Sirio kaj Irako situas dezerto kies nomo estas la Araba Dezerto (Beduenujo), tie ili mortigis ĉiun araban kiun ili vidis. Reveninte, la reĝo regigis grupon el Báni-Táqláb en Bahrejno, el Ábol-qobejs kaj Bánitámim en Háĝár, el Bákr ebn Rael en Kerman (Bákraban).

Distrikte de Irano, li konstruis urbon kies nomo estis Bozorg-Ŝapur (Ŝapur la granda). Ĉirkaŭ Áhvaz li konstruis du urbojn: Iran-Ĥorre-Ŝapur kaj Ŝuŝ (Suzo/ Ŝuŝan).

Fine li atakis Sirion kaj faris masakrojn, rabojn kaj sklavigis multajn kiujn li loĝigis en Iran– Ĥorre– Ŝapur. Poste li revenis al Mádajen (8).

3- La Granda Komentario

تفسير بزرگ

“Tiu ĉi libro estas (traduko de) la granda komentario verkita de Mohámmád Ĝárir Tábári, tradukita en la puran persan (el la araba)”. (fragmento el la libro mem)

La Granda Komentario de Tábári, fama verko de Mohámmád Ĝárir Tábári (mort. 310 p.H. = 922 p.K.) nomita “Ĝame’ ol Bájan fi Táfsir Qoran” (kolekto de ĉiuj komentarioj pri la Nobla Korano), estas tradukita persan subtene de la Samanida reganto Mánsur filo de Nuh (961–976 p.K.) per grupo da transoksianaj (9) kaj Ĥorasanaĵ (10) ulemoj kaj scienculoj. Por komenci la tradukon (11), la Samanida reĝo unue petis la *Fetvon* (religian permeson) de la religiestroj Ábubákr filo de Áhmád Buĥarai kaj Ĥálil filo de Áhmád Sistani kaj Ábu Ĝá’fár filo de Mohámmád Bálĥi kaj Hásán filo de Áli Mándus kaj Ábolĝáhm Ĥaled filo de Hani el Bab-ol-Hend, ankaŭ de kelkiuj aliaj religiuloj. Kiam la religiestroj konsentis (kun la ektraduko de la sankta libro) “... tiam li diris al la grupo de la ulemoj kaj sciuloj, kiuj elektu el inter si la plej klerajn kaj plej sciajn homojn por traduki la libron. Oni tradukis la libron en la unuaj jaroj de la dua duono de la kvara postheĝira jarcento. Ĝin karakterizas multaj persdevenaj vortoj. La stilo estas tre flua, naturlingva kaj bela. Jen fragmento el tiu libro:

La naskiĝo de la profeto

Nun ni rakontas la naskiĝon de la profeto – al li saluton – kaj la aferon de Ánuŝervan (12) kaj tiujn signojn kiujn havis nia profeto – al li saluton. El inter tiuj ankaŭ la signojn de antaŭrevelacio kiujn havis la profeto ĝis tiu ĉi Korana versiklo kiun revelaciis la Granda Alaho:

– *Ho vi, homoj! Al vi vere venis sendito kun la vero de via Sinjoro, do kredu; tio estas pli bona por vi– (Korano 4/171).*

Kaj alian versiklon kiun diris la Granda Alaho:

– *Ho vi, homoj! Vere venis al vi de via Sinjoro evidenta pruvo kaj Ni sendis al vi helan lumon (Korano 4/175).*

La versiklojn kaj iliajn komentojn ni sufiĉe preparolos. Nia profeto – al li saluton – alvenis al la mondo je la tempo de Nuŝervan (12). Kiel li mem diris:

– Mi naskiĝis en la tempo de justa reĝo kaj li estas Ánuŝervan. Lin oni nomis *justulo* ĉar dum lia reĝdaŭro neniu kuraĝis esti maljusta kontraŭ alia. Ánuŝervan ordonis al la tuta sia reĝlando ke ĉiu samlandano laboru duonon de la tago kaj manĝu sian akiritajn dum la alia duono de la tago.

En la Ánuŝervan-a kortego estis du mil kurtenoj, kiujn prizorgis mil kurtengardistoj. Po du kurtenojn zorgis unu kurtengardisto. Unu kurteno estis ruĝa, sur kiu estis skribite per verda skribo: “Devas manĝi, devas labori”. Tiuj mil ruĝaj kurtenoj per verdaj skriboj pendis ĝis la tagmezo. Post la tagmezo oni eltiris tiujn kurtenojn kaj pendigis aliajn mil kurtenojn, kiuj estis verdaj kun ruĝaj skriboj: “Devas manĝi, devas morti”.

Tiam la reklamistoj reklamis ke lia reĝa moŝto diras: “Manĝu tion kion vi akiris ĝis nun”.

Se evidentiĝos al la reĝo ke iu civitano ne trovas ion por manĝi li donos el la ŝtata fisko ion al li. Ĉiukaze neniu kuraĝis labori posttagmeze. Eĉ metiistoj kaj manindustriistoj. Li iniciatis imposton je la agrogrundoj. Al neniu grupo estis peza ŝarĝo. La profeto naskiĝis en la tempo de Nuŝervan. Tuj post kiam la profeto naskiĝis, ĉiuj idoloj falis teren kaj ĉiuj sanktaj fajroj (simbolo de la zoroastrismo) estingiĝis.

La ŝaho Ánuŝervan ankoraŭ songis ke vento blovanta el la ĉielo detruas lian palacon. Restis nur dek kvar el la palacmura krenelaro. Poste fajro venis kaj lian palacon tute forbruligis. Matene, Ánuŝervan, konfuzita pro la songo, restis silenta kaj rakontis la songon al neniuj.

Alian nokton la estro de la *mubed*-oj (13) songis pri grupo da duĝibaj (iranaj) kameloj kiujn atakis grupo da arabaj kameloj. La arabaj kameloj forpelis la iranajn tra Tigriso.

Ankaŭ la *mubedar*-estro rakontis pri sia songo al neniuj.

Pasis kvin tagoj. Alvenis letero el la sankta fajrejo Pars, informanta ke tie la sankta fajro, kiu estis brulanta dum mil jaroj, jam mortis! (estingiĝis).

Ánuŝervan alvokis la *mubedar*-estron kaj al li rakontis sian sonĝon. Ankaŭ la *mubedar*-estro rakontis la sian. Ánuŝervan ekmalĝojis pro tiuj du sonĝoj. Li postulis sonĝinterpretistojn.

Delegiton oni sendis al No'man Monzár postulante alsendon de la plej lerta sonĝinterpretisto. No'man Monzár estis reganto de la arabaj landoj deflanke de Ánuŝervan.

Ricevinte la reĝan mesaĝon, No'man ordonis traserĉi en la tuta lando. Oni trovis la plej kleran kaj plej saĝan sonĝinterpretiston. Lia nomo estis Ábd-ol-Másih. No'man irigis Ábdolmásih-on al Ánuŝervan. Ánuŝervan rakontis ambaŭ sonĝojn al la ĵus alveninta Ábdolmásih. Sed li ne povis solvi la problemon kaj diris ke tiujn sonĝojn povas interpreti nur lia onklo koheno Satih kiu loĝas en Sirio.

Ábdolmásih volonte vojaĝis Sirien demandi sian onklon pri la afero. Kiam li atingis Sirion, Satih suferis agonion. Informiĝinte pri la alveno de Ábdolmásih, Satih malfermis siajn okulojn kaj ekparolis: “Ho Ábdolmásih, vin sendis la reĝo Ánuŝervan pro la sonĝo ke lia palaco detruigis kaj restis el ĝi nur 14 kreneloj. Kaj la sonĝo de la *mubedar*-estro ke la iranajn kamelojn venkis la arabaj. Kaj vi alvenis ricevi respondon al ambaŭ tiuj sonĝoj! La respondo kaj la interpreto estas ke: nova sendito, nova profeto naskiĝis. Tiu profeto venkos la tutan mondon. Ankaŭ la persa imperio pereos per li. Ekde hodiaŭ daŭre de 14 jaroj Persujon reĝos Ánuŝervan. Poste finiĝos lia erao. Post la adoltiĝo de la profeto, Perslando falos en la manojn de li kaj post li estos regata de liaj anstataŭuloj kaj restos en la manoj de muzulmanoj. Sed nun dum 14 jaroj restos en la manoj de Ánuŝervan”.

Reveninte Ábdolmásih transdiris la respondon de Satih. Aŭdinte la respondon Ánuŝervan diris: “14 jaroj estas sufiĉe longa periodo por ne scii kion fari”. Sed kiam pasis 14 jaroj finiĝis la vivo de Ánuŝervan. Anstataŭis lin lia filo Hormozd de Ánuŝervan. Li reĝis kelkajn jarojn. Post li lia filo Párviz de Hormozd ekreĝis. La mondo neniam vidis reĝon kiel Párviz. Dum la reĝdaŭro de Párviz revelaciigis al nia profeto – al li saluton – el la ĉielo ke li alsendu mesaĝleterojn al la ĉirkaŭaj regantoj kaj

komuniku la novan religion al ili. La profeto sendis leterojn al la ĉirkaŭaj reĝoj. En tiuj leteroj estis skribite:

“Fariĝu islamano kaj liberiĝu de la malbono. Se ne, pagu tributon. Se ankaŭ tio ne, pretigu vin por intermilito”.

La leterojn portis la kurieroj al la reĝoj de koptoj, abisenoj, turkoj. En tiuj leteroj estis skribite:

“Fariĝu islamano kaj liberiĝu el la Dia puno”. La menciitaj reĝoj estis afablaj al la kurieroj, donacis ion al ili kaj respondis al la leteroj.

La abisena reĝo sendis al la profeto multajn donacojn, inter ili du koptajn sklavinon, unu el kiuj la profeto alproprigis al si mem kaj la alian li pludonacis al Hásán filo de Sabet (Araba poeto, panegiristo de la profeto).

La reĝo de la turkoj kisis la leteron de la profeto kaj karigis ĝin.

Sed la persa ŝaho, Ĥosroŭ Párviz, ekvidinte la leteron, en kiu la nomo de nia profeto – al li saluton– estis skribita super lia nomo, kolere demandis:

“Kiu estas tiu viro kiu aŭdacis skribi sian nomon antaŭ la mian?”

La kuriero respondis: “Li diras ke li estas profeto de Dio”.

Párviz tuj sendis tiun leteron al Bazan. Bazan estis satrapo de Jemeno deflanke de Párviz. Al tiu letero aldonis Párviz: “Leginte tiun ĉi leteron tuj arestu tiun viron kiu nomas sin profeto kaj lin, ligita en ferĉenaro, sendu al mi”.

Ambaŭ leterojn li donis al siaj kurieroj kaj irigis ilin al Bazan, la satrapo de Jemeno.

Bazan jam informiĝis pri la nova profeto kiam la kurieroj de Párviz alvenis. Li jam sciis ke de la profeto oni vidis miraklajn signojn. Do li mem skribis leteron al la profeto kaj ĝin kune kun la kurieroj de Párviz sendis al la profeto.

Kiam la kurieroj kaj la leteroj atingis la profeton, li alvokis Sálman-on la persan (14) kiu estis tradukisto inter ili. La profeto ordonis gastigi la kurierojn. Li sendis al ili pistakojn kaj daktilojn. La profeto volis pripensi la aferon. Ambaŭ kurieroj estis razintaj siajn barbojn kaj lasintaj siajn lipharojn. La profeto – al

li Dian saluton– diris al Sálman: “Demandu ilin kial ili razis sian barbon”?

Sálman demandis kaj ili respondis: “Niaj superuloj diras tiel fari”.

La profeto – al li saluton– diris: “Mia Dio diras: “Lasu la barbon kaj tonda la liphararon je la liplinio”.

Pasis kelkaj tagoj. La kurieroj venis ĉe la profeton kaj insiste petis lian respondon. Ili timis esti pridemandataj de siaj estroj pro la prokrasto. Ili ne plu volis resti. En la sama momento, Gabrielo (15) – al li saluton– alvenis kaj diris al la profeto ke la armeanoj de Párviz kontraŭis lin unuiginte kun lia filo Ŝiru. Ili malliberigis Párviz-on kaj post kelkaj tagoj mortigos lin kaj lia afero finiĝos.

La profeto, informiĝinte pri la okazaĵo, diris al la kurieroj: “Ne hastu reveni. Io okazis al viaj superuloj! Paciencu kelkajn tagojn, ĝis ni vidos la rezulton”. Ili diris: “Ho viro, parolu sammezure de via buŝo. Tiu ĉi parolo via kaŭzos mortopunon káj al vi káj al ni! Tio ne estas taŭga parolo kiun vi diris”.

La profeto – al li saluton– diris: “Paciencu du-tri tagojn. Se dum tiuj tagoj ne evidentiĝos ĉio, mi donos la respondon”. Ili du diris: “Ni ne kuraĝas plu resti kaj aŭskulti tiajn parolojn”.

Do, tiuj du kurieroj ekrevenis murmurante: “Tiu viro parolas pri la morto de nia reĝo”!

Ili revenis al Jemeno, al Bazan kaj rakontis al li siajn travivaĵojn.

Al Párviz okazis ĝuste tio kion Gabrielo jam diris. La armeo nun estis sub regado de Ŝiru, kiu malliberigis sian patron. Post kelkaj tagoj la armeanoj minacis Ŝiru-on: “Ni ne bezonas du reĝojn. Se vi mortigos vian patron, ni obeos vin, ŝahigos vin, se ne, ni liberigos vian patron, reregigos lin kaj mortigos vin mem!”

Do, Ŝiru sendis iun mortigi lian patron. La persa armeo tiam obeis Ŝiru-on.

Kiam la du menciitaj kurieroj venis ĉe Bazan kaj rakontis pri la afero, li ankoraŭ nenion sciis pri la okazaĵoj, tamen li estis certa ke la profeto neniam mensogas. Bazan kaj lia popolo jam multon aŭdis pri la mirakloj de la profeto.

Bazan diris al la kurieroj: “Pacience restu kelkajn tagojn ĉe mi, ni vidu la rezulton. Ja tiu viro de Medino neniam mensogas.”

La novaĵoj dissendiĝis. Atingis letero de Ŝiru al Bazan, en kiu li skribis: “Vi devas obeigi viajn soldatojn kaj lasi tiun viron kiu sin nomas profeto. Ne ofendu lin. Mi mem poste zorgos pri la afero.

Alvenis la letero. Bazan ricevis kaj legis ĝin. La jemenanoj sciiĝis pri la novaĵoj. Ili akceptis la religion de nia profeto.

La jemenanoj sendis iun al la profeto – al li Dian saluton – kun la mesaĝo: “Evidentiĝis al ni ke vi estas profeto de Dio kaj kion vi antaŭvidis ĉe la kurieroj de Párviz, tio okazis nun. Bazan mem, la armeo kaj ĉiuj jemenanoj fariĝis muzulmanoj kaj akceptis la religion”.

La profeto sendis unue Mo’az Ĝábál, kiu instruu islamon al la jemenanoj. Post li, la profeto sendis iujn aliajn, ĝis la tuta Jemeno akceptis lian religion.

La persa reĝo, informiĝinte pri la jemenanoj, ĉesis persekuti la profeton kaj islamo en Jemeno profundiĝis. Tio estis unu el liaj profetaj mirakloj...

4– Bubákr Áhávájni

بوبكر اخويني

Bubákr (aŭ Ábuhákim) Rábi’, filo de Áhmád Áhávájni Ál-Boĥari– kies nomon en kelkaj aliaj libroj oni skribis nekonat-forme simile al “Áĝevejni”– kiel oni povas konstati el liaj verkoj, pro sia lerto kuraci melankolion estis fama je la nomo “La kuracisto de la frenezuloj”.

Li estis disĉiplo de Ábol-Qasem Moqanei, kaj tiu ĉi estis disĉiplo de Mohámmád Zákárja Razi (al-Razio, 854–925 p.K.).

Do ni povas konkludi ke li vivis en la jaroj de la dua duono de la 4-a jarcento p.H.

Li verkis sian libron “Enkonduko por la lernantoj de la medicino” en tiuj jaroj, por sia filo. Kiel rimarkis Nezami Áruzi, tiu libro konsideriĝis kiel mezranga kuracarta lernolibro studata post la baza libro “Moĝmálat”.

La prozstilon de Aĥavájni karakterizas ĉiuj apartaĵoj de la Samanid-tempa prozo. Ĝi entenas antikvajn terminojn kaj eksplikojn de la Persa Lingvo.

Jen fragmento el lia libro: **La medicino**

Vi, mia filo, jam petis de mi verkon facilan pri la medicino, ke tiu libro estu por vi propra memoraĵo kaj por aliaj homoj utiligebla. Mi respondis vin kaj petis helpon de Dio – La Glora kaj La Grandioza – finverki tion. Dio estas Malavara kaj Donema.

Sciu ke la medicinon kategoriis Ĝalinus (Galeno, helena kuracisto 131–210 p.K., tre fama en islamaj landoj) en tri jenaj branĉoj:

1. Kombino.
2. Analizo laŭ la kombinelementoj.
3. Analizo laŭ la finlimo.

Lerni la kombinon: Tio estas ke Dio – Pura kaj Alta Li estas – tiujn ĉi tri elementojn kreis el kvar aliaj elementoj: fajro, aero, akvo, tero.

Laŭ mi, en tiu ĉi libro, fajro estas la varmo elbrilanta el la suno. Ties ekzemplo estas ke la planto kreskas el tero, akvo, aero kaj la suno. Se ne partoprenus unu el tiuj kvar, planto ne kreskus. Tiakaze la semo difektiĝus.

Tio estas klara por tiu kiu pristudas la aferon. Ankaŭ la analizo laŭ la kombinelementoj estas ke iu dirus ke la homo konsistas el la manoj, piedoj kaj ventro. Ĉiu el tiuj organoj mem konsistas el aliaj suborganoj.

La suborganoj estas 13:

1– osto. 2– haŭto. 3– karno. 4– vejnoj. 5– arterioj. 6– nervoj. 7– kartilagoj. 8– ligamentoj, t.e. ligilo kiu ligas la artikojn. 9– membranoj, t.e. io simila al tuko streĉita, vestanta la ostojn aŭ renojn. 10– medolo. 11– vitrea akvo. 12– kristalina akvo. 13– testika akvo.

Ankaŭ estas dirite ke tiuj 13 suborganoj estas el 4 miksaĵoj: 1– galo. 2– atrabilo. 3– sango. 4– flegmo.

Ankaŭ estas dirite ke tiuj miksaĵoj estas el la gepatroj kaj el la nutraĵoj.

Ankaŭ la nutraĵoj venas el animalviandoj kaj plantoj. La plantoj konsistas el tero, akvo, aero kaj fajro. Fajro devenas de la sunradioj, kiel mi jam diris. Tio estas analizo laŭ la kombinelementoj.

La analizo laŭ la finlimo estas tio, ekzemple pri la homo, ke oni diras: “Li estas parolanta kaj mortonta vivaĵo”. Limo de la besto estas ke tio estas aĵo vivanta sen scipovo... . Se ni celus difini nur la beston ni povus diri ke ĝi havas senson kaj movon...

Difino de la medicino estas: La medicino estas profesio kiu protektas la sanon de la homoj. Kiam iu malsaniĝas, ĝi resanigas lin per scienco kaj sperto. Ĉiu profesio devas dependi de la scio kaj sperto.

Ankaŭ la medicino, kiu bezonas scion kaj sperton, estas dividita en tri sekcioj:

1. Sciiĝi pri naturaĵoj.
2. Scii la kialojn de la naturaj fenomenoj.
3. Diagnozi la signojn de la naturaj fenomenoj...

5- La libro “La limoj de la mondo”

حدود العالم

“La limoj de la mondo, el la oriento ĝis la okcidento” estas libro antikva en la Dari-Persa lingvo (Fin-kaj-iom post-Sasanida lingvo en Persujo) pri la geografio. Ĝi estas aŭtentika verko de la jaro 372 p.H. (ĉ. 982 p.K.) pri la cirkonstancoj de la planedo, ĝia geografia divido, loĝebligataj landoj kaj diversaj nacioj ktp. La aŭtoro(j)n oni ne konas.

La libro estas titolita laŭ Ábolhares Mohámmád filo de Áhmád la Fáriqun-a. Ábolqasem Mohámmád, samtempulo de Nuh filo de Mánstur Samani, estis el la dinastio Al-e Fariqun (Angle Farighunids, loĝantaj en Goŭzganen). Ili formis faman dinastion en Ĥorasano, kiun faligis la sultano Máhmud Qáznávi (La Gaznavida). Jen fragmento el tiu libro:

La karaktero de Tero

Tero estas globa, kiel pilko. Ĉirkaŭas Teron la firmamento. Tero rotacias sur akso inter du polusoj. Unu el tiuj polusoj estas la suda poluso kaj la alia, la norda poluso. Sur ĉiu ajn globo se oni desegnas du ĉirkaŭantajn cirklojn, kiel du cirkloj trairus el la mezo de la alia je 90-grada angulo, tiun globon tiaj cirkloj dividus en 4 egalajn pecojn.

Tiel ankaŭ Tero estas dividita per du ŝajnaj cirkloj. Unu el tiuj cirkloj nomiĝas “La cirklo de la horizontoj” kaj la alia “La ekvatoro”. La cirklo de la horizontoj trairas el la oriento ĝis la fino de la loĝeblaj limoj kaj atingas la sudan poluson kaj pasinte el tiu, ree atingas la orienton. Tiu cirklo dividas tiun ĉi konatan duonsferon de la terglobo el tiu ne konata duonsfero kiu estas sub ni.

La ekvatoro estas cirklo kiu ekiras el la oriento, pasas el la mezo de la terglobo ĝis la plej foraj lokoj disde ambaŭ polusoj kaj finfine trapasante la okcidenton ree atingas la orienton.

La loĝeblaj lokoj situas en la norda kvarono el tiu duonsfero kiu tanĝas la ekvatoron. La amplekso de la loĝeblaj lokoj en la nordo estas 63 gradoj larĝe kaj 180 gradoj longe. Tiu cirklo ĉirkaŭanta la terglobon estas 360 gradoj.

La amplekso de la loĝeblaj lokoj en la sudo estas dek sep kaj kelkono da gradoj oble 180 gradoj. La tuto de tiuj ambaŭ loĝeblaj lokoj estas 1/9 de la terglobo. Ĉiuj urboj, reĝlandoj, montoj, riveroj kaj ĉiuj lokoj kie troveblas bestoj, situas en tiu 1/9.

La plej fora konata orienta urbo estas la urbo Ĥámdan en Ĉinio, borde de la Verda Maro (Pacifiko). Tiun maron la Romanoj nomas “La orienta maro” kaj la araboj nomas ĝin “La verda maro”.

Aristotelo diris en sia libro “La meteorologio”: “Tiu maro cirkulas ĉirkaŭ Tero kaj ŝipo ne povas veturi sur ĝi”.

Neniu ĝis nun tuttransveturis ĝin. Neniu scias kie estas la fino de la maro. Kiom ajn oni veturas, oni ne povas finveturi ĝin. Oni povas ŝipveturi nur ĉe la bordoj.

La plej fora okcidenta urbo estas Sus-ol-Áqsa (Sus, la plej malproksima). Tiu urbo situas borde de maro kiun oni nomas “La Okcidenta Oceano”. La akvo de tiu oceano similas al la akvo de la “Orienta Oceano” kolore, odore kaj guste.

Tiu oceano tuŝas ĉiujn loĝeblolokojn, nordajn, okcidentajn kaj sudajn. Tiun ankoraŭ neniu transveturis. Oni ŝipis nur bordo-proksime. Do, analoge oni konkludis ke tiuj ambaŭ maroj estas samaj kiuj ĉirkaŭiras Terglobon, oriente kaj okcidente tuŝante ambaŭ polusojn.

Pro tiuj oceanoj ankoraŭ neniu sukcesis koni la alian duonsferon de nia planedo. Plejparto de la ekvatoro transpasas el “La Granda Oceano”. El la ekvatoro al la nordo estas 63 gradoj loĝeblaj. Post tio ĝis la norda poluso pro troa malvarmo ne povas vivi vivaĵo. En la suda parto de la ekvatoro troviĝas kelkaj maroj. Aliaj partoj estas tro varmaj. Tieaj homoj estas barbaroj. Kiel Zanzibaranoj, Abisenanoj kaj similaj. Post tiu, ĝis la suda poluso neniu loĝas pro tro da varmo.

Alia fragmento de la sama libro:

Egiptio kaj ĝiaj urboj

Estas regiono, oriente de ĝi situas partoj de Sirio kaj partoj de la Egipta Dezerto. En ĝia sudo situas partoj de Nubio. Okcidente ĝi najbaras kun partoj de dezerto kiun oni nomas “Álvahat”. La Roma Maro situas norde de ĝi.

Egiptio estas la plej riĉa regiono en la islamaj landoj. En ĝi estas multaj urboj loĝebligataj, freŝaj, riĉaj kaj havantaj diversspecajn varojn. El tie oni importas vestaĵojn, turbanojn, kiuj estas jam la plej multekostaj vestaĵoj. Elinter tiuj vestaĵoj ankaŭ: La egipta lanaĵo, la *dábiqi*—turbanoj, la peltoj. Famaj estas ankaŭ la egiptaj multekostaj azenoj.

Oriente de Nilo situas du urboj: Zemire kaj Denqora. Ambaŭ estas homplenaj kaj riĉaj. Tiuj urboj produktas multekostajn kotonajn vestaĵojn. Farama estas urbo borde de la maro Tennis, en la sablejo Qefar. La tombo de Galeno situas tie!

Tennis kaj Demjat estas du havenurboj ĉe la maro Tennis, situantaj sur du insuloj. Tie oni ne agrikulturas, sed produktas kolorajn ŝtofojn kaj kotonaĵojn. Aleksandrio estas urbo ĉe la bordoj de la Roma Maro kaj la maro Tennis. Tie situas lumturo kies alton oni taksas 200 arŝinojn. Ĝi konstruiĝis sur ŝtono en la akvo. Kiam blovas ventoj, la turo videble skuigās.

Submonte direkte de la urbo Fostat (16) estas konstruitaj du piramidoj, kies mortero estas substanco ege dura.

Ĉiu piramido havas egalajn longon, larĝon kaj alton ĉiu po 400 arŝinojn. La interna spaco de ĉiu piramido estas dividita en ĉambroj. La piramido havas mallarĝan pordon. Konstruis ilin Hermes antaŭ ol la Tajfuno (la legenda diluvo en la tempo de la profeto Noa).

Informiĝinte pri la Granda Tajfuno li faris tion cele savi sin el la ŝtormo. Sur la konstruaĵoj estas skribite: Ni konstruis ĝin perpotence; kiu volas scii kiel ni konstruis ĝin, do tiu ĝin malkonstruu.

Al la piramidoj estas surgravuritaj multaj sciencoj; medicino, astrologio, geometrio kaj filozofio.

Fion estas alia urbeto okcidente de Nilo. En ĝi fluas aliaj riveroj krom Nilo. Busejr estas urbo oriente de Nilo. La sorĉistoj de la Faraono, kiuj faris sorĉadojn kontraŭ Moseo, estis el tiu urbo. En Nilo vivas krokodiloj. Tiuj atakas homojn kaj bestojn. Sed sur la bordoj de Busejr ili fariĝas sendanĝeraj bestoj, pro la sorĉoj de sorĉistoj! Tiel ke la infanoj kaptas kaj surrajdas ilin en la akvo. Krom ĉe la bordoj de tiu urbo, la krokodiloj ree estas danĝeraj.

Eŝmonin, Aĥmim kaj Bolina estas aliaj urboj okcidente de Nilo. Homplenaj, freŝaj, plenaj de diversaj varoj ili estas. En tiuj urboj estas kultivataj ebonarboj.

Sovan (Asovan) estas la plej fora urbo de Egiptio flanke de Nubio, okcidente de Nilo. Ĝi estas riĉa urbo kaj ĝuas sian lertan militistaron.

En montoj de Ál-Vahat, proksime de Sovan troviĝas minoj de smeraldo kaj topazo, similaj al kiuj troveblas en neniu alia

loko. En la montoj de Ál-Vahat troviĝas sovaĝaj ŝafoj. Post Sovan, lime de Egiptio kaj Nubio loĝas sovaĝaj azenoj, kelkkoloraj, nigroflavaj, malgrandaj kiel ŝafoj, kiuj mortas se oni translokas ilin...

6- La Pura Komentario

تفسير پاک

“Komentario de la pura Korano” aŭ mallonge “La Pura Komentario” estas nomo donita al fragmento de komentario sennoma, kiu estas verkita en la finaj jaroj de la kvara p.H.-a j.c aŭ en la unuaj jaroj de la kvina.

La originala, sed ne la tuta, versio de la libro kuŝas en la biblioteko de la Lahora universitato (Pakistano). El la karakterizaĵoj de la skribmaniero kaj stilo de la skribo oni povas diveni ke la versio estis skribita en la jaro 450 p.H. (1058 p.K.) aŭ iom pli antaŭe. Tamen la ekverko certe okazis en pli antaŭaj jaroj, kaj ne pli postaj. Jen fragmento el tiu libro:

Harut kaj Marut

Laŭ la rakonto de Kálbi, en lia libro, ni diras ke Iam la ĉielaj anĝeloj rigardis al Tero kaj vidis ke homoj faras kulpojn kaj di-boĉojn. Ili plendis: Ho Dio nia, ĉu ni ne dirintis “ĉu Ci kreas ion kio faros malbonojn sur Tero”?! Jam ili faras!

Dio revelaciis al la anĝeloj: “Elektu el inter vi cent plej piajn kaj plej sinregantajn”.

Poste Li diris: “Nun elektu 90 el tiuj 100”. Poste 80 el 90... Ĝis restos nur tri, en kiujn Mi kreos samajn voluptojn kiujn Mi kreis en la naturon de la adamidoj (homoj). Poste Mi sendos ilin Teren. Se ili detenos sin el la kulpoj, tiam vi riproĉu la adamidojn.

La anĝeloj, el la tuta ĉielo elektis tri. Iliaj nomoj estis: Áza, Ázaja, Ázazil.

Dio – la plej Altranga Li estas – enmiksas en ilin volupton. Ázazil, rigardinte la volupton en si, eksciis ke lia temperamento emas ĝin. Do, honteme pro tiu volupto, li petis Dion depreni ĝin

el lia naturo kaj transformi lin en la originan anĝelecon. Dio konsentis kaj deprenis la volupton el lia naturo. Nun tiu anĝelo estas kapklinata (obeo/hontema). Oni diras ke li restos en tia formo ĝis la Lasta Tago. Sed tiujn du aliajn anĝelojn, Áza (Harut) kaj Ázaja (Marut), Dio sendis Teren ordonante:

– Vi devas iri al Tero tage, prijuĝi inter la adamidoj iliajn interkverelojn. Ne manĝu, nek dormu, kaj vespere ĉielen revenu.

Ili faris tiele kelkiam. Sed iam okazis kverelo inter geedzoj. La nomo de la edzino estis Zohre arablingve, Bidoĥt perslingve kaj Anahid hebree (17).

Tiuj geedzoj venis ĉe ilin. Vidinte tiun belegan virinon, ambaŭ anĝeloj falis en ŝian amon. Ĉiu unuo el tiuj du aparte pensis ŝin akiri kaŝinte sian penson for de la alia. Ĉiu el tiuj du aparte de la alia, petis la virinon pri rendezuo, subaĉetante ŝin per falsaj diroj: mi helpos vin kontraŭ via edzo.

La alian tagon ĉiu el tiuj du, aparte, ĉeestis la rendezuon. Sed hazarde ambaŭ jam elektis la saman lokon. Do, ili malkaŝis siajn sekretojn unu al la alia. Dum la intervizito la virino evitis sin prezenti, demandante la anĝelojn pri La Plej Granda Nomo, per kiu ili frekventas inter Tero kaj la ĉielo. Ili, sklaviĝinte de la volupto, lernigis al ŝi La Nomon. La virino petis ilin ankaŭ pri aliaj aferoj, pri kiuj mi silentas pro honto!

En tiu momento, Dio ordonis, ke malfermiĝu la ĉielaj pordoj, dirante al la anĝeloj: Malsupren rigardu, vidu viajn elektitojn kie ili sidas?!

Ekde tiu tago la anĝeloj mem estas propetantaj Dion pardoni la homojn kredantajn. Ĉar ili eksciis ke homoj kun tiom da voluptoj apenaŭ povas savi sin, dum iliaj elektitaj anĝeloj ne sukcesis savi sin.

Tiu virino prononcinte la Nomon ascendis al la ĉielo. Dio ŝin transformis en fajron. Oni diras ke ŝi estas nun Venuso en la ĉielo.

La du anĝeloj, malgraŭ la elparolo de la Granda Nomo de Dio, ne sukcesis plu ascendi la ĉielon. Ili ne plu estas anĝeloj. Ili ekloĝis sur Tero. Ili interkuradas de la okcidento al la oriento ploregante.

Harut kaj Marut, rememorinte pri Edris – al li Dian saluton – la profeto, amata de Dio, el kiu ĉiu-tage la anĝeloj suprenportas tiom da bonfaroj kiom ili alportas el la tuta alia homaro (18), ambaŭ rapidis al li kaj diris ke ili kulpas. Ili petis Edrison propeti ilian pardonon ĉe Dio.

Edris demandis: Ĉu vi jam vidis ke iu Terano propetas ĉielanon? Ili jesis: Ni vidis vian rangon en la ĉielo.

– Se mi propetos pri vi, mi ne certas ĉu ĝi estos akceptata.

– Preĝu Dion, metante vian frunton al la tero, levinte vian kapon se vi vidis nin, do sciu ke via propeto estas akceptita, sed se vi ne vidis nin, sciu ke oni nin jam portis kaj via propeto ne estas akceptita.

Edris – al li saluton – metis sian frunton sur teron kaj preĝis. La profeto levinte la kapon ne vidis ilin. Ili estis forigitaj. Atingis ilin Dia ordono: Kion vi preferas, la punon en la mondo aŭ la punon en la Lasta Tago? Kaj en la lasta tago Mi mem decidis kion fari pri vi.

La anĝelo Gabrielo – al li saluton – rekomendis al ili la elekton de la monda puno. Ili elektis la mondan punon. Jam, de tiam, ili ambaŭ estas pendigitaj en la Babela Puto. Ĉiu-tage ili estas punataj de la frumateno ĝis la sunleviĝo kaj de la posttagmezo ĝis la sunsubiro. Ili ade ripetas vortojn. Iuj diras ke ili ripetas tiujn vortojn por plipezigi la punon, sed iuj aliaj diras ke ili ripetas tiujn vortojn por malplipezigi la turmentojn.

Judoj, gebroj, kaj tiuj kiuj kredas je sorĉo, iras tien priatenti tiujn vortojn. La du anĝeloj unue admonas ilin: Ne lernu tiujn ĉi vortojn. Kiu lernas tiujn ĉi vortojn, tiu fariĝas senkredulo kaj al li oni ne permesos eniĝi la paradizon.

Se la ĉeestantoj ne reiras kaj ankoraŭ emas lerni tiujn vortojn, la du anĝeloj elparolas la vortojn kaj la ĉeestantoj lernas. Se iu elparolas tiujn vortojn ĉe problemoj, ĝi solviĝas.

Laŭ la plej multaj komentariistoj, la rakonto estas tia kian ni rakontis, sed iuj aliaj opinias ke tiuj du ne estis anĝeloj, sed du gebroj kiuj instruis al homoj sorĉarton en Babelo...

7-Ābolhásán Ĥáráqani

(959–1033)

ابوالحسن خرقانی

Ŝejko (19) Ābolhásán Āli filo de Ĝá'fár Ĥáráqani estis unu el la plej grandaj piuloj, mistikuloj kaj instruistoj de sufiismo (20). Li estas instruita de posteuloj de Ba-Jázid Bástami, fama mistikulo.

Ĥáráqani naskiĝis en 348 p.H. (959 p.K.) en Ĥáráqan, distrikto de Bástam, kaj mortis en 425 p.H. (1033 p.K.).

Nur-ol-Olum (la lumo de la sciencoj) estas libro kiun verkis lia disĉiplo pri li kaj liaj pensoj, helpe de liaj prelegoj. La libron eldonis la disĉiplo post la morto de la majstro en dek ĉapitroj. La unika ekzemplero de la libro estas en la biblioteko de la Brita Muzeo. El tiu ekzemplero Bertles, rusa orientalista, presis en la rusa revuo "Irano" tekstojn en 1929.

La prozstilo de la libro estas tre simpla kaj facila. Ĝi havas ĝeneralajn karakterojn de la prozo de la kvara p.H-a j.c kaj la unuaj jardekoj de la kvina jarcento p.H. Jen fragmento el tiu libro:

Demandoj kaj respondoj

Oni demandis: Kio estas la derviŝeco (20)?

– Estas maro el tri fontoj: 1-Pio. 2– Malavaro. 3– Bezoni nenion.

Ŝejko demandis sufion (20): Kiun vi nomas derviŝo?

– Tiun kiu priokupiĝas pri nenio de la mondo.

– Ne, sed la derviŝo estas tiu en kies sino estas nenia pripenso, li diras sed ne havante parolon, li manĝas sed ne havante guston. Ĉe li mankas movo, halto, ĉagreno, ĝojo. La derviŝo estas tia!

Ŝejko demandis disĉiplon: Ĉu vi ĝis nun englutis venenon?

– Ne, kiu englutas venenon, tiu mortas!

– Do, vi ne manĝis licaĵon (*halalan* manĝaĵon) ĝis nun! Kiu manĝas panon kaj ne konsideras ĝin veneno, tiu ne manĝas lican manĝon! (vera sufio devas ĉiam priatenti sian manĝon ĉu ĝi venas de pura kaj lica fonto)

Oni demandis: Kiu estas fremdulo?

– Fremdulo ne estas tiu kies korpo estas fremda en la mondo, sed tiu kies koro estas fremda en lia korpo kaj kies mistero estas fremda en lia koro!

Oni demandis: kiajn signojn havas Liaj (Diaj) amikoj?

– El iliaj koroj estas for la amikeco de la mondo.

– Kion ni faru por esti viglaj?

– Forprenu vian vivon. Supozu ke alvenis la plej lasta elspiro kaj ĝi atendas inter la du lipoj foriri!

Grandulo diris al la ŝejko: Primeditu mian aferon, ĉar miaj verkoj senordiĝis.

– Ankaŭ vi primeditu ke mi elparolu unu fojon la nomon de La Amiko (Dio) kiel indas, aŭ preĝetu mi al Li kiel Li instruis al mi.

Oni demandis lin: Kio kaŭzas la korokupiĝon?

– Korokupiĝon kaŭzas la tri jenoj: La okuloj, la oreloj, la manĝo. Vi vidas kion vi ne devas vidi, tio tentas la koron. Vi aŭdas kion vi ne devas aŭdi, tio tentas la koron. Vi manĝas mallican manĝaĵon, tio malpurigas la koron kaj tentas ĝin.

La ŝejko iam demandis sufion: Ĉu vi ŝatas amikiĝi kun Ĥezr?(21)

– Jes, mi ŝatas.

– Kiom aĝas vi?

– Naŭdek sep.

– Redonu la panojn de Dio kiujn vi manĝis dum 97 jaroj. Ne estas dece ke vi manĝu panon de Dio kaj estu amiko de Ĥezr!

Oni demandis la ŝejkon: Kiu estas vera adepto?

– Tiu, ĉe kies enveno la majstro ne priatentas lin. Vera adepto estas tiu kiu sidante ĉie ajn, eĉ ĉe ŝu-ejo (tie en moskeoj oni konservas demetitajn ŝuojn= malaltranga loko), estas ĝoja. Tiu ne estas vera adepto kiun oni devas trompi kiel patrino trompas bebon donante al li flanon oleumitan.

La ŝejko diris: Por la kredanto ĉie estas preĝejo, ĉiu tago estas sankta tago kaj ĉiu monato estas ramadano. Kie ajn li loĝas, li kondutas kiel en preĝejo kaj ĉiujn monatojn li tiel estimas kiel ra-

madanon. En ĉiu ajn tago li tiel bonfaras kiel en la sanktaj tagoj.

Lin oni demandis pri la Sama-danco (22).

– La danco (en sufiaj ceremonioj) taŭgas nur por tiu kiu frapante piedojn sur teron vidas la fundon kaj etendante la manojn al ĉielo vidas la empireon. Kiu ne estas tia, tiu fuŝas la reputacion de Bajázid, Ĝonejd kaj Ŝebli (23).

Bigoto demandis la ŝejkon: kio estas admono senperfida?

– Ke vi admonu iun sed ne estu fiera ke vi estas pli bona ol li, kaj avidu nenion (de li pro via admono).

Alia demandis lin: kiu estas mistikulo?

– Mistikulo estas kiel birdo kiu celante grenojn elnestiĝas. Ne trovinte manĝaĵon: denove volas reveni al sia nesto sed perdas la vojon. Li mirege vojserĉas sed ne povas veni hejmen.

Oni demandis lin: kio estas la signo de tiu en kies koro regas la Dia esto?

– De la piedo ĝis la kapo li konfesas la eston de Dio. Liaj manoj, piedoj kaj

okuloj ne povas sidi, iri aŭ vidi ĝis la vento kiu estas en lia nazo (firo) eliĝos. Li ade ripetas la nomon de Dio, same kiel Máĝnun (24), kiu alparole al kiu aŭ kio ajn, eĉ al la tero, al la maro, al la muro, aŭ al la ŝafaro, ripetis nur la nomon de Lejli (24). Pli ol tio, li eĉ diris: “Mi mem estas Lejli kaj Lejli estas mi”.

El la instruoj de la ŝejko: Ekzistas lamentuloj, ekzistas pezŝarĝuloj. La lamentuloj estas vunditaj kaj la pezŝarĝuloj estas majstroj de “la momento”. Kiu vundiĝis tiu resaniĝas, sed kiu restas en la momento tiu indas kompaton.

Tio kio okazis al la profetoj, se okazus al Diamikoj, ne restus eĉ unu homo diranta “ne ekzistas dio krom Alaho”. Kiu vojaĝas sur tero ties plando abscesas, sed kiu vojaĝas ĉielen ties koro abscesas.

Oni demandis la ŝejkon pri la vira paŝo.

– La unua paŝo estas tio ke oni diru: “krom Dio, nenio”. La dua paŝo estas fajro! La tria estas ekbruliĝo!

– Ĉu vi vidis vian sangon tie kie oni mortigis vin?

– Demandu: “ĉu ia kreitaĵo ĉeestis tie kie oni mortigis min?”.

– Kiu rajtas paroli pri *neniiĝo* kaj *estiĝo* (25)?

– Tiu kiu pendas en ĉielo per silka fadeno, blovas ventego kiu elŝiras arbojn, detruas konstruaĵojn, deprenas montojn, pleniĝas marojn, sed ne kapablas skui lin. Tia viro rajtas paroli pri *neniiĝo* kaj *estiĝo*.

– Kiel oni povas scii ke ies vero egalas al ties ŝajno?

– Sciu ke lia lango diras samon kion li havas en la sino (= koro, kapo). Kiu havas diversparolantan langon, tiu havas diverskoloran koron. Granduloj diris ke la koro estas pototo kaj la lango estas kulerego; kio en pototo, tio en kulerego. La koro estas maro kaj la lango estas bordo. Kiam de ondoj, la maro elĵetas borden tion kion ĝi havas en si.

Li ankaŭ diris: La finceloj de la viroj (Viro samsignifas homon, kaj en tiu ĉi kunteksto signifas veran homon aŭ veran sufion. Mi ne tuŝas tiajn antikvajn uzojn) estas tri: 1– Sciu ke Dio konas vin. Tiajn virojn mi renkontas malmulte. 2– Estas vi kaj estas Li. 3– Ĉio estas Li kaj vi ne estas! Se la tutan mondon oni igus unu manĝunuoj kaj tion metus en la buŝon de kredanto, oni ankoraŭ ne rekompencintus lin. Se de la oriento ĝis la okcidento oni irus serĉi Dian amikecon, oni ankoraŭ ne irintus tiom longe!...

8– Mováffáq Herávi

موفق هروی

Ábu Mánstur Mováffáq filo de Áli Herávi estis kuracisto kaj apotekisto en la finaj jaroj de la kvara jarcento kaj komencaj jaroj de la kvina (p.H.). Pri li ni ne scias multon. La stilo de lia verko montras ke ĝi devas esti verkita je la komencaj jaroj de la kvina p.H-a jarcento. La unika ekzemplero de lia libro, trovebla en la biblioteko de Vieno, estas skribita de Ásádi Tusi, fama irana poeto. La dato de la skribfino estas 477 p.H. (1084 p.K.). La verkisto penis arigi la nomojn de ĉiuj ĝis tiam konataj medikamentoj. La stilo de la libro estas, laŭ la kutimo de la tempo, tre facila kaj celdirektita. Jen fragmento el lia libro:

La rubeno

El la rubenoj la plej bona estas la ruĝa, kiu ankaŭ estas la plej bona juvelo, precipe la *Rommani*-rubeno. La plej malbona estas la blanka. La meza estas la blua. Ĉiuj specoj de ĝi estingas la soifon. Se ĝin oni muelas kaj donas al venenito, ĝi helpas lin resaniĝi. Nenio efikas pli bone ol ĝi al tiu kiu iĝis venenita. Alie, ĝi ĝojigas la koron. Gemo de rubeno donas ĝojon al sia havanto eĉ se li estas malĝoja. Kiu ĵetas ĝin en kruĉon kaj trinkas akvon de tia kruĉo, tiu ne malsaniĝas je hidropso. Signo por koni rube non estas ke ĝi neniam varmiĝas. La fajro estas senefika sur ĝin.

Ĝi ne difektiĝas pro fajro, se ĝin oni kelkajn tagojn metas en la fajro. Nenio povas skrapi ĝin krom diamanto...

La vino

Galeno diris ke la celoj de la vintrinko estas du: ĝojo de la koro, sano de la korpo! Vino estas la plej proksima aĵo al la sano, kondiĉe ke oni modere uzu ĝin. Ĝi fortigas la instinktan varmon kaj ĝin fluigas en ĉiujn korpomembrojn.

Ĝi fortigas la korpon kaj kaŭzas ĝojon kaj gajon. Ĝi forigas melankolion varmigante kaj humidigante la korpon. Ĝi havas molan naturon kaj moligas la korpon. Ĝi grasigas la sekkorpu lojn.

La vino neniigas la troan lacon kaj rapidigas pliboniĝon ĉe ĵusresaniĝinto. La vino pliigas manĝemon kaj helpas digestadon. Ĝi kaŭzas ke trinkita akvo kaj digestita manĝaĵo atingu ĉiujn korpomembrojn.

Tamen oni ne devas ebriiĝi, ĉar ebriiĝo ege malutilas al la korpo. Ĝi difektas la menson kaj malfortigas la saĝon. Korpan forton ĝi malfortigas pro plenigo de la vejnoj kaj la cerbo.

La ebriiĝo venigas la instinktan varmon en la kapon kaj malvarmigas ĝin. Ada ebrio kaŭzas apopleksion, paralizon, korp malfor ton, dormemon, epilepsion, spasmon kaj svenon.

Krom la supre diritaj, la vino efikas sur la korpon diversmaniere, ĉar la naturo de la homoj estas diversa. Eĉ la naturo de

la vinoj mem estas diversa pro iliaj koloroj, odoroj kaj gustoj. Kiom da utilo ĝi havas, tiom da malutilo eblas, depende de la trinkanto.

Kiu alkutimiĝas al trinkado, ties karno kaj sango kreskas laŭ ĝi. Rata (26) diris: “mi miras pro tiu kies trinko estas vino kaj kies manĝo estas viando, sed modere, aliokaze ankoraŭ li malsaniĝas”. La vino varmigas la stomakon kaj la hepaton, digestigas la manĝaĵojn kaj multigas la karnon, la sangon kaj la instinktan varmon. Ĝi plipovigas la naturon de la homaj organoj por plenumi siajn devojn, do tial ĝi estas bona...

9– La komentario de Korano

(Kembriĝa Komentario)

تفسير قرآن نسخه كمبريج

En la biblioteko de la Kembriĝ-Universitato troviĝas ekzemplero de la tria volumo de antikva komentario de Korano kiun ni ofte nomas “La Kembriĝa Komentario”. Tiu komentario estas antikva perslingva verko kaj ĝustadivene de la 4-a p.H-a j.c (10-a p.K.) ĉar la aŭtoro skribis nenion pri la konatoj vivintaj post la jaro 400 p.H. (1009 p.K.).

La prozstilo estas tre flua kaj elokventa. La tradukitaj versikloj de Korano, kvankam ili restas fidelaj al la originalo, la beletra aspekto bone videblas en ili. La sugestoj de prof. Edward. G. Browne pri la libro, legeblaj en la indekso de la Kembriĝa biblioteko, povas utili. Jen fragmento el la libro:

La profeto Davido

Al Davido – al li saluton – okazis, ke kiam pliiĝis lia preĝado ol la preĝoj de la ceteraj homoj, la anĝeloj kuniĝis ĉe la adorado kaj preĝado. Kiam li ekstaris por preĝi, la anĝeloj ekstaris kun li. Kiam li kliniĝis por adori, ankaŭ la anĝeloj ekkliniĝis.

Kaj kiam li preĝfrotis sian frunton sur la teron, la anĝeloj faris la samon. Tiele estis ke la anĝeloj prenis lian manon, parolis kun li kaj amikiĝis kun li. Do, Davido – al li saluton – kuraĝis la

anĝelojn demandi: “Kiujn farojn miajn vi zorgas?”. Ili respondis: “Ni ne skribas kulpon al vi, ni tenas vin sur la rektan vojon, ni forigas malbonojn el vi kaj montras la vojon de la bono al vi, kaj tion diris al ni Dio por ke vi restu ekster la kulpoj kaj restu akorda kun bonoj”.

Tiam Davido diris al si mem: “Do, kian rekompencan mi mem gajnas pro tiuj bonfaroj kaj kiaj aplaŭdoj estas vere por mi mem, se anĝeloj detenas min de la kulpoj? Estus bone se mi sciis kio okazus, se la anĝeloj ne zorgus pri mi”.

Fariĝis al Davido sopiro ke anĝeloj ne plu zorgu pri li por ke ĉiuj sciu ke li mem faros bonon. (liaj bonfaroj ne estas pro la helpo de la anĝeloj, sed li mem faras ilin sen helpo de la anĝeloj)

Dio –Granda kaj Glora li estas– volis ke Davido eksciu ke Li tenas lin kaj li neniam malbezonas Dion.

Kiam Davido vidis ke la anĝeloj foriris, li ekkomprenis ke li estas forlasita. Li komencis preĝi kaj adori, ne dormi noktojn, fasti tagojn, eĉ pli ol pasinteco. Daŭre de tridek jaroj Davido estis tia en adorado kaj preĝado, li parolis kun neniu kaj neniu sukcesis paroli kun li pro tro da preĝado, ĝis eksĝajnis al li ke li regas sin mem. Tiam Dio – Granda kaj Glora Li estas– volis montri al Davido lian malforton.

Davido estis preĝanta en absido. Dio – Granda kaj Glora Li estas– alsendis birdon el la paradizaj birdoj. Ĝi sidis ĉe la lukon de la absido. Pleniĝis ĉie je ĝiaodoro moska. Lumiĝis la tuta absido pro la koloroj de la birdo, ruĝe, blanke, flave, blue kaj je aliaj koloroj. Davido vidinte tiun birdon emis ĉasi ĝin. Dum la preĝo lia koro okupiĝis pri tiu birdo. Li pensis ke li kaptos la birdon post la preĝo.

Davido, pensante pri tiu birdo, vidis ke ĝi malsupren flugas kaj eksidas ĉe lin sur la teron. Li ne plu povis pacienci. Li ĉesigis la preĝon por ĉasi la birdon!

La birdo supren flugis kaj eksidis sur la lukon. Davido – al li saluton– postsekvante la birdon iris al la tegmento. La birdo pli foren flugis. Davido pli foren iris. Subite li ekvidis la edzinon de Urija. Ŝi estis nuda kaj lavis sin ĉe baseno en sia hejmo. Ili inter-

rigardis. Ombro ĉirkaŭis David-on kaj kovris lian tutan korpon. La tuta hejmo pleniĝis je lia impono. Ja Davido estis tre impona. La nomo de tiu virino estis Bat-Ŝeba (Bolŝaje).

Post tio, Davido diris al siaj virinoj ke ili devas esti pli afa-blaj ol antaŭe kontraŭ la edzino de Urija. Davido parolis kun Batŝeba kaj ŝi eksciis kio okazis al Davido.

Ŝi diris al Davido: “Ho profeto de Dio, estas malbone ke mi eliĝu el mia domo. Tio kaŭzos al mi akuzon inter la Izraelidoj. Tiukaze mi ne havos ian ajn pardonrimedon. Estus pli bone ke mia edzo revenu kaj estu kun mi”.

Urija estis for por sankta milito. Davido tuj skribis leteron al sia generalo ordonante pri reveno de Urija.

Ricevinte la leteron, la generalo tuj alsendis Urija-n. Urija, tuj post reveno, tranoktante sonĝis ke virleono sidas inter du branĉoj de palmarbo. Li mem estis sonĝinterpretisto.

Mirante pro la sonĝo, li eksciis ke la palmo estas virino kaj la leono estas la reĝo. Eble Davido havas aferon kun lia edzino. Li ankaŭ miris ke Davido el inter tiom da soldatoj alvokis nur lin. Meditante pri la afero li ekkomprenis ke Davido havas emon al lia edzino.

Atinginte sian domon, li evitis sian edzinon. Li fastis dum-tage kaj preĝis dumnokte. Nenian emon li montris al sia edzino. La edzino petis permeson eniĝi lian liton. Urija ne permesis, tamen la edzino senpermeso ekkuŝis ĉe lin. Urija evitis ŝin. Ju pli la edzino persistis, des pli Urija evitis. Batŝeba informis Davidon pri la afero.

Iutage, dum interparolo, Davido diris al Urija: “Virinoj diras al mi ke via edzino plendas pri vi, ĉar vi ne kundormas kun ŝi. Kial vi faras tion? Mi alvokis vin pro rajto kiun vi havas ĉe mi pro la najbareco. Ja inter najbaroj estas rajtoj. Dumlonge vi ne ĉeestis. Mi volis ke vi alvenu kaj estu kun via familio, ĉar viaj familianoj diris al la miaj ke vi mankas al ili”.

Urija respondis: “Graco de Dio al vi kaj al viaj familianoj. Estas inde ke dum mia foresto vi estis bonvolema al mi kaj forigis neindaĵojn el mi kaj miaj familianoj”.

Dirinte tiujn vortojn Urija ektimis ke Davido komprenos kion li celas diri, tial li miksis la parolon kun la militaj aferoj:

“Mi estis en milito por Dia afero kune kun viroj kiuj tagnokte batalas por Dio, kaj dumlonge ne estas informiĝintaj pri siaj virinoj kaj infanoj. Ili ne havas ian voluptan emon al virinoj aŭ aliaj. Mi estas kun ili kaj, ĉiuokaze, kunulo de ili. En tago kiam ni celis ataki densvice al malamikoj de Dio por ricevi la Dian rekompencon, atingis via letero. Vi estas profeto kaj anstataŭulo de Dio. Mi obeis vian ordonon reveni. Revenante mi votis al Dio ne preni el ĝojoj kaj voluptaĵoj ĝis mia rekuniĝo kun la batalantoj. Mi volas esti kiel ili por esti egala kun ili je la rekompencoj. Tial mi ne kundormas kun mia edzino”.

Davido diris: “Vi faris bone, mi esperas ke Dio rekompencos vin, tamen la edzino havas rajtojn ĉe vi”.

Urija respondis: “La rajto de Dio estas pli granda”.

Alvenis la fratoj de Batŝeba. Ili plendis pri Urija kaj parolis ne konkrete, kvankam ili estis elokventaj. Ili parolis metafore: “Ho profeto de Dio, ni havis grundon kiun ni ne povis kultivi. Timante difektiĝon, ni donis tiun grundon al tiu ĉi viro kondiĉe ke li kultivu ĝin, akvumu ĝin kaj forigu la sovaĝajn birdojn kaj bestojn el ĝi. Nia kondiĉo estis ke se li ne faros tiele, li ne rajtos posedi la grundon. Nun li forlasis la grundon difektita. Li nek akvumas ĝin, nek ĉirkaŭmarŝas ĝin. Jam la sovaĝaj bestoj loĝas tie”.

Urija diris: “Ho profeto de Dio, ili pravas! Ĝis nun laŭpove mi kultivis la teron, akvumis ĝin, forigis la sovaĝbestojn, sed nun leono venis, pli granda ol ĉiuj aliaj leonoj, kaj ekloĝis tie! Tiun leonon mi ne egalas! Mi timas batali kontraŭ tiu leono ĉar ĝi murdos min. Tial mi forlasis tiun teron al tiu leono”.

Davido, kompreninte kion ili celas diri, jesis: “Jes, mi informiĝis ke tiu leono preterpasis la grundon sed ne faris difekton tie. Dio estas pova reteni tiun leonon ke ĝi ne plu marŝu ĉirkaŭ via tereno. Vi, la fratoj, revenu”.

Davido diris al Urija: “Revenu kaj kultivu vian grundon kaj ne plu timu tiun leonon”.

Urija petis permeson reveni al la militkampo. Davido permesis.

Urija revenis al la batakampo. La soldatoj volis ataki. Urija partoprenis kaj dum certa daŭro bone kaj kuraĝe militis. Malamikoj ĵetis ŝtonegon el la fortikaĵo kaj ĝi trafis lian kapon kaj ŝprucigis lian cerbon. Urija martiriĝis kaj eterniĝis en la paradizo.

Informiĝinte pri la morto de Urija, Davido diris al lia edzino singardi tagcenton (27). Post la tempo li edzinigis ŝin. Kaj ŝi estis la patrino de Salomono – al li saluton...

10– Aviceno

(980–1037)

ابن سینا/ پور سینا

Lia nomo estis Hosejn kaj lia kromnomo estis Ábu Áli. La nomo de lia patro estis Ábdollah kaj tiu de lia avo estis Sina. Tial oni perse ofte nomas lin Pur-Sina/ Pursina (Filo de Sina), kaj arabe: Ebn-e Sina. En Esperanto (finfine de latinidaj lingvoj) ĝi fariĝis Aviceno. Liaj epitetoj estas Ŝejĥ-or-Ráis (estrar-estro/ majstrar-majstro), Hoĝĝát-ol-Háq (signo de Dio), Emam-ol-Hokáma (Imamo de polimatoj/saĝuloj). En multaj tekstoj ankaŭ: Ábu-Áli Sina, Ebne Sina...

Li estis fama filozofo, kuracisto, verkisto kaj la plej grava filozofo de la peripatetisma skolo. (Esence ĝi sekvis la instruojn de Aristotelo, ĝia fondinto. Ĝiaj sekvantoj ricevis la nomon de peripatetistoj (περιπατητικοί) = promenantoj – Vikipedio)

En la islamaj landoj neniu egalas lin laŭ la pensamplekso.

Li naskiĝis en la jaro 370 p.H. (980 p.K.) en Ĥovármájsán, distrikto de la urbo Buĥara.

Kuraĝigite de sia ismailana patro, studinte la rudimentojn de literaturaj kaj religiaj sciencoj, li ekis lerni ĉe Ábu-Ábdollah Nateli, scienculo de la kvara p.H-a jarcento, logikon, eŭklidan geometrion, almageston, kaj pli poste li komencis siajn proprajn studojn pri la filozofio.

Li studis tiom diligente la ĝistiamajn sciencojn ke jam ĉe sia 18-jariĝo li finstudis ilin. La unua verko de li estas “Ĥek-

mát-ol-Áruzijjá = scioj pri la metriko”, kiun li verkis en sia 21-a jaraĝo.

Kelke da tempo post la verkado de tiu libro, Aviceno ankoraŭ loĝis en Buĥara, sed poste pro ŝanĝoj en la situacio de la Samanida dinastio, li iris al Ĥarázmi (29) kie li ekloĝis ĉe la dinastio Al-e Má'mun.

En la jaro 403 p.H.(1012 p.K.), timante la invadon de Máhmud Qáznávi (en Vikipedio; Mahmud de Gazni), kiu celis konkeri la regionon, Aviceno foriris al la urbo Gorgan, poste al la urbo Rej (405 p.H.(1014 p.K.), poste al Qázvin kaj Hámádan (urboj en Irano).

Antaŭ la jaro 411 p.H.(1020 p.K.), li fariĝis veziro de Ŝáms-od-Doŭle Ábu-Taĥer Ŝah Ĥosroŭ, la Dejlaman-a reganto de Hámádan kaj Ĝeĥal (997–1021 p.K.). Post la morto de Ŝáms-od-Doŭle, Aviceno pasigis tempon en la prizono Fárdáĝan. Post la liberiĝo li iris ĉe Ala-od-Doŭle Kakuje en Isfahano. La ceteran vivon li pasigis kun tiu reganto, jen kunvojaĝe jen en la kortego.

Survoje inter Isfahano kaj Hámádan li forpasis en la jaro 428 p.H.(1037 p.K.) Lia tombo nun situas en Hámádan, kie li enteriĝis.

Aviceno verkis kaj perse kaj arabe. Li verkis multajn librojn pri diversaj temoj: filozofio, medicino, psikologio, farmakologio, matematiko ktp. La plej famaj libroj de li estas: Ŝáfa (resaniĝo), Ál ešarat vát-Tánbihat (la aludoj kaj la rememorigoj), Neĝat (la savo), Ensaf (justo), Ál Hekmát-ol-Mášráqijjá (la filozofio orientata), Qanun (leĝo), Daneŝname-je Álai (*Álai-enciklopedio. Ĝin li verkis responde al la peto de Ála-od-Doŭle Kakuje, la reganto de Isfahano. Laŭ la antaŭparolo, li celis priserĉi la logikon, fizikon, astrologion, muzikon kaj metafizikon, sed li ne sukcesis finverki krom ĉapitrojn pri logiko, metafiziko kaj fiziko. La ceteron plenumis lia disĉiplo Ábu Obejd Ĝoŭzĝani. La libro gravas pro tio ke ĝi estas la unua enciklopedio pri la peripatetisma filozofio en la persa lingvo.*)

Jen fragmento el tiu libro:

La plej granda feliĉo

La plej ĝoja ĝojo kaj la plej grandaj feliĉo kaj bono estas la kuniĝo kun La Ekzistendulo (tiu kiu filozofie devas ekzisti = Vaĝebolvoĝud = Ekzistideva = la kialo de kialoj = Dio), kvankam plimulto de la homaro supozas ke aliaj ĝojoj pli gravas.

Unue oni devas scii kio estas ĝojo kaj kio estas malĝojo. Laŭ ni, kie ne estas percepto, tie ne estas (mal)ĝojo. Do, unue necesas perceptado. La perceptoj havas du tipojn: 1– sensa, kiu estas ekstera, kaj 2– imaga kaj intelekta, kiuj estas internaj. Por ĉiuj, ili havas po tri genrojn: 1– percepti ion kio estas akorda kaj laŭpova de la perceptanto. 2– ne akorda, malutila kaj ne inda. 3– meza, nek tia, nek tia ĉi.

Do, la ĝojo estas percepto de indaĵo kaj la malĝojo estas percepto de ne-indaĵo. La percepto “meza” estas nek ĝojo nek malĝojo. Al ĉiu perceptkapablo plaĉas faro komplete akorda kun ĝi. Al kolero; venko, al volupto; laŭgustaĵo, al revkapablo; espero kaj tiel plu, al tuŝkapablo, flarkapablo kaj vidkapablo tiuj kiuj plaĉas al ili.

Saĝuloj preferas la internajn ĝojojn. Malgrandanimuloj kaj malaltniveluloj pli volas la eksterajn ĝojojn. Se oni proponas al iu: “ĉu vi volas dolĉan kaj plaĉan manĝaĵon aŭ rangon, venkon, grandiozon...?” se li estas kiel infano, besto aŭ malgrandanima homo, li volas dolĉaĵon. Sed se li estas grandanima, li neniam preferas dolĉaĵon.

Malgrandanima homo estas tiu kies internaj perceptkapabloj/ internaj sensoj estas neniigintaj aŭ difektitaj, sed kiu mem ne scias. Por ĉiu homa kapablo, la ĝojo estas tio kion ĝi povas percepti kaj tio akordas kun ĝia sistemo. Tie ĉi, tamen, estas tri diferencoj:

1– Diferenco inter kapablofortoj. Ju pli la kapablo estas forta kaj alta, des pli la faro estos forta kaj alta.

2– Kvantoj de distingo kaj percepto. Ju pli la kapablo perceptas, des pli ĝi komprenas (mal)ĝojon. Se troviĝas du samspecaj kapabloj, kiu estas pli akra tiu perceptas pli da (mal)ĝojo.

3– Diferenco inter perceptitaĵoj. Ju pli la subjekto estas forta je (mal)ĝojo, des pli forta estas la kapablo percepti (mal)ĝojon. Ju malpli difektita kaj malbona la perceptaĵo, des pli ĝoja ĝi estas.

Do, kiel eblas kompari (eksteran) sensaĵon (kiel dolĉeco k.s. kiu estas ordinara kaj malaltvalora) kun tiu (interna sensaĵo) kiu venas de la Ekzistendulo (Dio) kaj eniras nian racion? (respondklara demando: do, ili ne estas kompareblaj). Tiu (Di-percepto) estas la plej bona perceptaĵo, kiu aktualigas la potencialon de la racio. Ĝi estas la plej bona imago. Ĝi kaŭzas la funkcion de la racio.

Se oni nomus “kapablo” (la senskapablojn), (mi dirus) la kapablo sensi estas malaltranga, malforta kaj aposteriora. Ĝi estas ento kies esto-porcio estas malgranda. Ĝi estas dependa de la korpo. Se ĝi akiras grandan porcion de la respektiva ĝojo, ĝi mem malfortiĝas. Ekzemple, la ĝojo de la okulo estas lumo kaj ĝia malĝojo estas mallumo, tamen forta lumo blindigas ĝin. Ĉiuokaze la forta perceptaĵo difektas la sensokapablon, sed la fortaj internaj perceptaĵoj (raci-perceptaĵoj) plibonigas, plifortigas la racion. La raciaj kapabloj estas memstaraj, ne dependaj de cirkonstancoj. Tion ni klarigos poste. La raci-kapabloj estas plej proksimaj al la Enda Ento (Vaĝebolvoĝud= Ento/ekzisto kiu nepre/ende devas ekzisti= Ekzistendulo. Aviceno tiele nomas Dion kompare kun Ebla Ento, ekzisto kiu eblas/povas ekzisti= kreitaĵoj de Dio). Ni klarigos ankaŭ tion poste.

Do, la sensokapablo ne estas komparebla kun la racikapablo. Percepto de la racio kaj percepto de la sensoj, diverstipe diferencas:

1– La racio perceptas enton kiel ĝi mem estas, sed la senso perceptas nenion kiel ĝi mem estas. Se okulo vidas la blankon, kune kun la blanko, la okulo vidas ankaŭ la longon, larĝon, formon, movon aŭ inercion. Do ĝi neniam povas vidi la blankon mem. Eblas ke senso perceptus ion ne tiel kiel ĝi vere estas, eĉ tute alie.

La racio vidas la aferojn abstrakte. Ĝi vidas ilin kiel ili estas, aŭ absolute ne vidas, sed ne vidas en alia formo. La senso

perceptas la akcidencon/atributon, dum la racio/menso/intelekto perceptas la esencon/substancon. La racio perceptas aferojn el kiuj devenas bonoj, ordoj kaj ĝojoj.

Do, kiel povus esti la ĝoja sento kaŭzata pro racia percepto de la Unua Pravo (Dio. Klarresponda demando: do, nepriskribebila), el Kiu venas ĉiuj belecoj, ordoj kaj valoroj? Tian ĝojon oni ne povas kompari kun la ĝojo kaŭzata de sensa percepto.

Okazas ofte ke homkapablo preterpasas ĝojon, ne perceptante ĝin, eble pro okupiĝo pri alia afero. Ekzemple, iu estas ĉe bela kanto sed ne estas konscia pri ĝi kaj ĝia ĝojo. Tio povas okazi ankaŭ pro malsano. Ekzemple, al malsanulo kiu emas manĝi teron kaj konsekvence acidgustaĵojn aŭ amaraĵojn, ne plaĉas dolĉaĵo. Aŭ pro alcutimiĝo kaj dependiĝo/ manio. Se iu alcutimiĝis manĝi ion malbonan, al li ne plu plaĉas vere bona manĝaĵo. Aŭ pro malfortiĝo de la perceptanto mem. Ekzemple, al la malforta okulo ne plaĉas lumo. Aŭ al la malforta orelo ne plaĉas forta bela muziko. Oftas ankaŭ ke ni estas malkonsciaj pri raciaj ĝojoj ĉefe pro la malforto de nia racio en la komencaj paŝoj.

Dum ni estas en la korpo kaj kutimas senseblaĵojn, eblas ke ni erare ĝojon perceptas kiel malĝojon...

Oftas ankaŭ ke iu senso trovas ion sed, pro malordo, ne perceptas ĝian ĝojon. Ekzemplo estas malsano kiun kuracistoj nomas “Bulimus” (bulimio). Pro tiu malsano la tuta korpo estas malsata kaj malfortiĝas, sed la stomako scias nenion!

Tia estas nia spirito en tiu ĉi mondo. Ĝi estas malperfekta. Ĉar ĝi ne trovas perfektajn raciperceptaĵojn, tial ĝi malĝojas, tamen pro sia perfektema naturo, ĝi serĉas ĝojon. La spirito, dum ĝi estas en la korpo, okupas sin pri (mal)ĝojo, sed kiam ĝi disiĝos de la korpo, nur tiam ĝi ekscios (la veron).

Do, la plej granda perceptanto estas La Enda Ento (Ekzistendulo, Dio) mem kiu perceptas la plej grandan perceptaĵon, t.e. Sin mem. Valorega, grandega, grandiozega kaj la plej kompleta percepto!

Do la plej ĝoja ĝojo estas Lia ĝojo pro Si mem, ĉar Li bezonas nenion ekster Si mem, kio povus pligrandigi, plibeligi Lin.

La unua kreaĵo de Dio, kiun Li kreis perfekte, estas Pura Racio. Ĝi ne estas kiel ni. Ni ĉiam bezonas ion. Ni okupas nin pri malgrandaj aferoj...

Pri la novelo “Hájj-ebn-e Jáqzan”

La novelo “Hájj-ebn-e Jáqzan” estas mistikisma-simbolisma rakonto de Aviceno. La libreton li verkis en la kastelo Fárdáĝan, kie li estis malliberigita.

Temas pri biografio de majstro el Jerusalemo, nome Hájj (viva/vivanta) filo de Jáqzan (vekiĝanta/vekita).

Hájj estas simbolo de la homa spirito. Jáqzan estas simbolo de la aganta racio, kiu administras la sferon sub Luno kaj helpas sufion atingi Dion.

La aganta racio ĉe iranaj antikvaj filozofoj estas la deka el la dek racioj. Eble pli-malpli komparebla kun la Demiurgo (aŭ *Yalda Baoth* aŭ *Rex Mundi*).

Hájj filo de Jáqzan, laŭ la testamento de la patro, kiu donis la ŝlosilon de sciencoj al la filo, ekvojaĝas tra landoj.

Hájj kunvojaĝigas la aŭtoron; unue irigas lin al stranga fonto, samkiel la fonto de la vivo pri kiu oni legas en la legendoj pri Aleksandro la Granda en islamaj rakontoj. Kiu trinkas el tiu fonto, tiu povas trapasi sovaĝajn dezertojn kaj altajn montarojn.

La fonto situas trans mallumoj (ne-scio) en la lando de la lumo (saĝo kaj filozofio).

Poste, la verko parolas simbole pri la du partoj de la mondo, materia kaj spirita, pri la kielirado sur la vojo al Dio kaj pri la kielatingo al Dio.

La verko finiĝas per paragrafoj pri La Enda Ento/Ekzistendulo (Dio). Jam ekde la tempo de Aviceno, la verko estas fama. Oni tradukis ĝin en multajn lingvojn. (elinter ili: Henry Corbin; *Avicenne et le récit visionnaire*, 2 volumoj. Tehrano 1954) (jen fragmento el la libro de Corbin):

Korpo kaj spirito

Diras Aviceno: “Dum promenado kun amikoj en promenejo ĉirkaŭ la urbo, kiam mi loĝis en mia urbo, mi vidis maljunulon

defore. Li estis bela, grandioza, sed el lia vizaĝo divenebliis paso de multaj jaroj, tamen li ŝajnis freŝa, kiel junuloj. Neniu osto de li malfortis (=li ŝajnis forta). Neniu korpomembro de li ŝajnis difektita. Nenia maljunaĝa signo akompanis lin, krom la pompo de oldo.

La komento: Oni sciu ke Dio –Granda kaj Glora Li estas– kreis la homojn el du substancoj: la korpo kaj la spirito. La spirito estas la vero de la homo. La perceptanto de la principaj scioj kaj la aperiganto de metioj kaj agoj estas la spirito. La spiriton tiel kreis Dio –Granda kaj Glora Li estas– ke ĝi postulas sciojn se ne estas baroj. Ĝi estas direktita al la konscio, al Dio kaj al la anĝeloj. Ĝi volas kogni ilian pozicion, la interrilaton de ili kaj la rilaton de ili al Dio La Alta. Ĝi volas kogni la postmortan mondon.

Sciindas ke korpokapabloj kiel voluptoj, kolerkapablo, imagkapablo ktp. malhelpas la spiriton al ĝia vera funkcio. Ni pli poste parolos pri ili.

Alia baro de la spirito estas ĝia okupiĝo pri la korpo. Kiam tiuj kapabloj altiras la spiriton al si kaj okupas ĝin, ĝi malfunkcias kaj ne plu okupiĝas pri tio por kio oni ĝin kreis, t.e. percepti la alimondajn aferojn kaj sciiĝi pri la vero de estaĵoj. Tiam la spirito akordiĝas kun tiuj ĉi kapabloj. Se la spirito obeigas la korpokapablojn kaj tiuj ĉi agos laŭ la postuloj de la spirito, tiam ili ne povas bari la spiriton. Ĉi-okaze la spirito agas laŭ sia naturo, estas kun si mem, t.e. ‘*en sia urbo*’, kie ĝi faras tion por kio ĝi estas kreita”.

Tial Aviceno diras “kiam li loĝis en sia urbo...”

Oni devas scii ke la promenado de la spirito estas *la pensado* pri scioj. La promenado de la spirito en la promenejo estas *serĉo de argumentoj*. Tial diras Aviceno “mi promenis en promenejo ĉirkaŭ la urbo”. Tiuj scio kaj penso similas al lia cirkonstanco.

Indas scii ke tiuj kapabloj, kiujn havas la homoj, estas kreitaj denaske kun ili kaj ne estas apartigeblaj. Ili estas bezonataj por administri la korpon. La voluptokapablon oni bezonas por serĉi la utilajn aĵojn, la kolerkapablon oni bezonas por forigi la malutilaĵojn, la imagkapablon oni bezonas por distingi verajn sciojn

disde iluzioj. Precipe en nia tempo la spirito bezonas tiajn kapablojn kaj plie, la imagkapablon, pri kiu ni poste preparolos...

Tial diras Aviceno: “mi eliĝis kun miaj amikoj...”....

11- Ābu Jā'qub Sāgāzi

ابويعقوب سگزی

Ābu Jā'qub Eshaq filo de Āhmād Sāgāzi estas grandulo de la ismailanoj. Li vivis en la finaj jaroj de la 4a p.H-a jarcento. Li verkis libron pri filozofio kaj religio de ismailismo. Ĝia nomo estas “Kāšf-ol-Māhĝub” (Malkovro de kaŝito). La libro estas dividita en 7 eseojn/principojn. La numeralo 7 estas sankta en la ismaila religio.

La stilo de la libro similas al la traduko. Eble samtempe de la aŭtoro aŭ iom pli poste, maksimume je la unuaj jaroj de la 5a p.H-a jarcento, ĝi estis tradukita el la araba en la persan. La vortoj kaj la kombinaĵoj montras ĝian antikvecon.

Jen fragmento el la libro:

Malkovro de misteroj

Sciu ke la vero de la scio/scienco estas kaŝita por la satano kaj liaj idoj, tamen malkovrita por la amikoj kaj elektitoj de Dio. La vero de la scio estas la sekreto de Dio. Dio donas ĝin al tiu kiun li ŝatas. La scio/scienco estas en la trezorejo de Dio, per kiu Li dankemigas iun ajn el siaj kreitaĵoj al kiu Li emas.

Al kiuj mankas la scio/scienco, tiuj iros al perdiĝo kaj blindiĝo. Iliaj koroj estas ŝlositaj per seruroj kiujn neniu povas malfermi, nek ilia racio.

Diamikoj paŝtas sin en ĝardenoj de la paradizo, plukas fruktojn de paradizaj arboj, naĝas en paradizaj riveroj, sed neniam satiĝas. Ili konas sian Adoraton (Dion), sanktigas Lian nomon kaj malatribuas ajnan signon/econ de kreito al Li. Sed la vojperdintoj similigas sian dion al kreitaĵo/homo, limigas lin, supozas ke li havas (homajn) ecojn, por povi doni nomojn al li. Ili estas malsciantoj. Ili scias nenion pri anĝeloj kaj pri gradoj de la kreado. Ili neis la sciatan scion kaj jesis la nesciatan novaĵon. La

sciuloj kredas je anĝeloj kaj gradoj de la kreado. Ili atendas la aperon de anĝeloj. Ili ne suferas pro tenado de la scio.

La interpretarto estas gravurita sur ilian spiriton kaj iĝis esenco de ilia spiritsubstanco kaj neniam apartiĝas de ili, kiel fajromovo kiu neniam apartiĝas de la fajro mem. (Ismailanoj interpretas esotere Koranon kaj kredas ke ĉiu religiaĵo havas du facojn: internan/veran/esoteran kaj eksteran/ekzoteran/ simplan).

Dio gardu nin kaj vin kontraŭ la ligiloj de la malscio kaj donu al ni kaj al vi la konon de la veroj kaj postulon de plua scio...

(alia fragmento el la sama libro:)

Racio, ovo de la du mondoj (ovo tie ĉi signifas devenon)

Tiuj kiuj pensas ke la racio estas memstara substanco kaj ĝi ekzistis antaŭ ol ekzistis aliaj aĵoj, ĉu korpo ĉu spirito ĉu aĵoj, ili eraras. Tiu ĉi teorio foras de logika argumentaro kaj proksimas al imago kiu deviigas la popolon.

Sed se oni kredas ke la racio estas graco de Dio sobverŝita al la genezo por ke ĉiu prenu sian porcion el la lumo de La Unua Racio laŭ sia indo, tiam oni pravas.

Do, la racio estas lumo sobverŝita al la kreado. Ĝi brilas en la aĵoj. Ĝia brilo dependas de la substanco kaj (mal)amplekso de ĉiu aĵo. Se la akceptanto de la racilumo estas solspirito (abstrakta spirito), ilia interrilato estas amika. Se la akceptanto estas kombinaĵo (de kelkaj substancoj), do la rezulto estos estiĝo kaj malestiĝo, apero kaj malapero ktp., kio estas rezulto de la kombinovo...

Se la akceptanto de la racio estas homoj, la rezulto estas emo al daŭra ekzistado, eterna vivo. Tial oni kovas la ovon de la du mondoj en la racio.

“Kovi la ovon de la du mondoj en la racio” signifas akordiĝon inter la du mondoj. Ĉiu parto iĝas pli forta per alia parto por ke la utilo de ĉio aperu. Por ke la mondo estu en la unueco de Dio, kiu unuecas kun la racio. Se la ovo de la du mondoj ne estus kovita en la racio, partoj de la du mondoj ne estus akordaj unu kun la alia...

12– Eshaq ben Ebrahim

اسحق بن ابراهيم

Eshaq filo de Ebrahim filo de Háláf Nejšaburi verkis la faman libron “qesás-ol-ánbia” (rakontoj pri profetoj). Li vivis meze de la 5a p.H-a jarcento (10–11a p.K.).

Jen fragmento el tiu libro:

Elmigro de Márjám (Maria)

Post unu monato de la naskiĝo de Jesuo –al li saluton– Márjám iris kun Jesuo al Egiptio. Oni diras ke ŝi restis tie 30 jarojn, ĝis Jesuo plenaĝiĝis kaj fariĝis profeto. Estis revelaciite al Jesuo ke li revenu al Jerusalemo. Li revenis kaj lernigis la Evangelion kaj ĝiajn regulojn.

La kialo de la elmigro estis tio ke grupo en Sirio aŭdis pri filo sen patro. Ili legintis en libroj ke en tiu jaro naskiĝos filo kiu resanigos malsanulojn, pro lia beno reviviĝos mortintoj, li venkos judojn kaj poste li supreniros ĉielen, sed je la Lasta Tago li malsuprenvenos al Tero. Kiam ili informiĝis pri lia naskiĝo, ili alvenis forporti lin. La reĝo, informiĝinte pri la afero, intencis mortigi lin. La nomo de la reĝo estis Ohnus filo de Mirius.

Márjám, eksciinte tion, elmigris. Iuj diras ke Dio La Granda inspiris al ŝi, aliaj diras ke Gabrielo (Ĝábráil= anĝelo kiu alportas la revelaciojn de Dio) informis ŝin, ke ŝi elmigru.

Márjám pretigis sin ekmigri. Ŝi luis azenon. Brakumis Jesuon kaj ambaŭ rajdis sur la azeno. Ŝi kunportis ankaŭ Jozefon la ĉarpentiston. En Egiptio ŝi atingis vilaĝon kie troviĝis multaj varoj. Ili faris loĝejon sur ŝtonego. Dumtage Márjám akompanis Jesuon ĉie. Ŝi fidis neniun.

Kiam Jesuo pli kreskis, ŝi donis lin al instruisto rekomendante: “al li instruu sed ne batu lin!”

La instruisto alvokis Jesuon kaj diris al li: “diru A B C D...”.

Jesuo demandis: “Kio estas ABCD”?

– Vi lernu kaj ne demandu la signifon.

– Kial mi lernu ion kies signifon mi ne scias?

La instruisto batis lin kaj postulis: “diru ABCD”.

– Ĝis vi diros la signifon, mi ne ripetos.

La instruisto persistis. Jesuo diris nenion.

Kiam la patrino alvenis preni lin, Jesuo diris: “Ho patrino, vi rekomendis al li multan instruon kaj malmultajn batojn sed li multe batis kaj malmulte lernigis”.

Poste li turnis sin al la instruisto kaj diris: “Ho instruisto, ĉu vi volas ke mi instruu al vi la signifojn de ABCD?”

– Jes, diru.

– A estas Adorendo Lia, B estas Benaĵoj de Li, C estas Certo de Lia pardonemo, D estas Digno Lia... (29)

– Ho virino, via filo ne estas tiu kiu devas lerni ion, li estas tiu de kiu la mondo devos lerni...

Oni rakontas ke en tiu vilaĝo loĝis riĉa vilaĝano kiu estis tre afabla al malriĉuloj. Li favoris Jesuon kaj Márjám. Ĉiuj malriĉuloj, kiam ajn ili volis, povis gastigi ĉe li. Iunokte iu ŝtelis ion de lia domo. La viro iĝis malĝoja. Jesuo demandis lin:

– Kio okazis al vi? Vi estas ĉagrena kaj maltrankvila.

La vilaĝano rakontis pri la afero al Jesuo. Jesuo diris:

– Tion faris la kriplulo kaj la blindulo kiuj estis lastvespere viaj gastoj. La kriplulon surŝultrigis la blindulo kaj tiu vojmontris al tiu ĉi...

Oni trovis ilin ambaŭ kaj pridemandis ilin. Ambaŭ konfesis kaj estis devigataj redoni la ŝtelitaĵojn. La vilaĝano ĝojis kaj proponis doni tiujn varojn al Jesuo kaj Márjám. Al ili ambaŭ salutis. Ili rifuzis.

Oni diras ke tio estis la unua miraklo de Jesuo...

13– Bu-Násr Moŝkan

(mort. 1039)

بُونَصْر مَشْكَان

Ábu Násr Mánсур filo de Moŝkan, estis estro de la “Divano de Leteroj” (= Skribejo. Oficejo kie oni verkis/skribis ŝtatajn leterojn, dokumentojn ktp), en la kortegoj de Máhmud kaj Más’ud la Gaznavidoj (*Vikipedie: Mahmud de Gazni*).

Li estis unu el la plej lertaj leterverkistoj. Li mortis en la jaro 1039 p.K.

Jen letero verkita de li:

Letero de la sultano Más'ud al Ĥarázm-ŝah Altuntaŝ

Je la nomo de Dio, la Donema, la Pardonema.

(Post la antaŭparolo kaj benoj:) Ni elkore trovas la kleran altrangulon kaj la onklon Ĥarázm-ŝahon en la sama rango kie trovis lin nia patro, la forpasinta emiro.

De nia infanaĝo ĝis nun li estas afabla al ni, tiel kiel patroj afablas al siaj gefiloj. Tiam kiam nia patro ekintencis elekti kronprincon kaj pri tio konsultis lin kaj aliajn grandulojn de la ŝtato, li multe penis por ni, ĝis tiu granda afero (*kronprinciĝo de Más'ud fare de lia patro Sultan-Máhmud*) fariĝis je nia nomo.

Kaj post tio, ĵaluzaj malamikoj malafabligis lian koron kontraŭ ni, pro kio li sendis nin al Multan kaj decidis neniigi nian kronprincecon. Li (*Altuntaŝ— en tiu epoko estis kutimo uzi LI/ŜI anstataŭ VI por montri superan respekton*) tiom penis ruzetrimede por ke nia bonstato (kronprinceco) ne ŝanĝiĝus. Li (Altuntaŝ= la alparolato) tiom gvatis la tempon kaj tiom ruzetis ĉe la eksa reĝo kaj tiom favorigis la amikojn (por nia afero) ke finfine la eksreĝo fariĝis kontenta kaj afabla al ni kaj nin alvokis el Multan al Herat.

Kiam li (Máhmud) atakis la urbon Rej, ni estis kun li. Alvenis altranga ŝtatoficiro el Gorganĝ al Gorgan kaj pri ni du fratoj kaj pri la kronprinceco oni interparolis. Li kaŝe sendis mesaĝon al ni, (= vi, Altuntaŝ sendis al mi) ke: “Hodiaŭ ni certe ne devas protesti. Ni devas obei kion ajn la reĝo diras”.

Ni akceptis tiun patran admonon, kaj la rezulto estas la hodiaŭa aperaĵo (mia reĝeco).

Kiam nia patro forpasis kaj la altranguloj invitis nian fraton (Mohámmád, kiu ankaŭ kiel Más'ud celis reĝiĝi anstataŭ la patro Máhmud) al Qáznin/Gazni (la ĉefurbo de la Gaznvida dinastio), li (Altuntaŝ, subŝaho de Ĥarázm, alparolato de Más'ud. De la letertono klaras ke Altuntaŝ ribeletis) skribis leteron, admonis afable, detenis sin de la kontraŭa flanko kaj parolis pri ni kiel

parolas saĝaj kaj veraj amikoj. Tiajn aferojn oni raportis al ni komplete. Por ni lia situacio estas tute klara.

Kiu estas tia, tiu nepre estas honesta en amikeco kaj obeemo. Ni ankaŭ, pro tiom da sincero kaj honesto kiujn ni vidis de li, certe respektos lin, donos taŭgan postenon al li, eĉ plialtigos lian rangon kaj donos taŭgajn titolojn al liaj filoj.

Estante en Herat, ni alvokis lin karesi. Sed antaŭ ol nia leteroj atingas lin, li jam estis forveturinta por daŭrigi sian servadon al ni en Ĥarázmlando (30). Ni intencis kunporti lin al Báhl, por konsulti liajn klarajn opiniojn pri gravaj aferoj kiel korespondado kun la turkaj ĥanoj kaj alianculoj ktp...

14-Hoĝviri

هجویری

Ábol-Hásán Áli filo de Osman Ĝollabi Hoĝviri estis mistikulo, sufio kaj verkisto (ankaŭ poeto, kies versoj perdiĝis). Li estis disĉiplo de la ŝejko Ábol-Fázl Ĥottáli en sufiismo, tamen li vizitis multajn aliajn ŝejkojn, el kiuj li citis en sia verko “Káŝfol-Máhĝub” (malkovro de la kovrito), unu el la plej gravaj kaj antikvaj sufiakaj kaj mistikismaj/ teozofiaj libroj.

La verkstilo estas pli-malpli simpla, sed kompare kun liaj samtempuloj, Hoĝviri uzis pli da arabaj vortoj kaj kunmetaĵoj, ĉefe ĉe sufiismaj terminoj.

Krom la persaj ekzempleroj, troviĝas ankaŭ rusa traduko de la libro, kiun presigis Valentin Ĵukovskij (*Валентин Алексеевич Жуковский*) en la jaro 1905.

Jen fragmento el tiu libro:

La momento

“La momento” estas tio per kio la sufio liberiĝas de la pasinteco kaj de la venonteco, tiel ke Dia envenanto venas en lian koron kaj koncentras liajn internaĵojn.

(sufioj kredas ke ĉiu fenomeno havas du flankojn: eksteran, ŝajnan, sensopercepteblan... kaj internan, veran, kernan esencon...)

En tiu momento li scias nenion pri pasinteco aŭ venonteco. Ne ĉiu povas atingi tiun nivelon. Kiu atingas, tiu scias nenion pri pasinteco kaj venonteco.

La moment-akirantoj diras: “Nia scio ne perceptas la venontecon kaj la pasintecon. Ni ĝuas la momenton kun Dio. Se ni okupas nin pri estinteco aŭ pri estonteco, ni forgesas la momenton, do, ni mem fariĝas vualo inter ni kaj la momento, kaj la vualo estas kaŭzo de la interna diseriĝo. Kio ne estas akirebla, tio ne estas pripensebla”.

Bu Sáid Hárroz – Dio gracu lin – diras: “Ne okupu vian karan momenton krom pri la plej kara aĵo. Kaj la plej kara aĵo estas via priokupiĝo inter la pasinteco kaj la venonteco”.

La profeto – al li saluton – diras: “Estas momento inter mi kaj Dio –Granda kaj Glora estas Li– kiam ne intervenas anĝelo Diproksimula, nek profeto Disendita, nek la 18000 mondoj dumsekunde okupas mian koron, nek ili havas valoron en miaj okuloj (por mi senvaloras ĉio tiu Momente)”.

Tial en la nokto de la ascendo(31) kiam oni montris la pompon de Tero kaj pompon de ĉielo al li, li rigardis al nenio. Ĉar li estas amanto kaj la amanton oni povas priokupigi nur per la amato.

Al la monoteisto okazas du momentoj: kiamo de perdo, kiamo de trovo. La unua: kiamo de disiĝo kaj la dua kiamo de atingo. Ambaŭmomente li estas venkita, ĉar en la kiamo de la kuniĝo li kuniĝas kun Dio kaj en la kiamo de disiĝo, li disiĝas de Dio. Liaj volo kaj peno ne havas daŭron, tial estas nepriskribeblaj.

Se la homo – en La Momento – estas sen libera volo, do kion li faras kaj kion li vidas, tio estas faro de Dio kaj vido de Dio.

Ĝonejd – Dio estu kontenta de li – diras:

– Mi vizitis en dezerto derviŝon, kiu sidis sub kamel-dorno (32), malkomforta kaj suferiga loko. Mi demandis: Ho frato mia, kio sidigis vin tie ĉi?

– Mi havis Momenton, ĝi perdiĝis tie ĉi. Nun tie ĉi mi sidas kaj suferas.

– Kiom da jaroj?

– Dek du jarojn! Nun, ho ŝejko, benu min, eble mi retrovos La Momenton!

Ĝonejd diris: Mi iris al Mekko, faris haĝon kaj benis lin. Alvenis respondo: “Ni jam plenumis lian peton!”.

Reveninte mi vidis lin en la sama loko.

– Ho viro, vi ja retrovis vian Momenton, kial do vi ne iras al alia loko?

– Ho ŝejko, mi estis en loko kie mi perdis mian havaĵon, kie mi maltrankviliĝis... ĉu indas ke mi, retrovinte mian havaĵon tie ĉi, retranskiviligi tie ĉi, forlasu la lokon? La ŝejko daŭrigu sian vojaĝon adiaŭite de mi. Mi faros de tiu ĉi tero mian tomboteron kaj en la Lasta Tago, mi releviĝos (reviviĝos) el tiu ĉi tero, kie mi trovis trankvilon...

15– Ābolfāzl Bejhāqi (385–470 p.H. = 995–1077 p.K.)

ابوالفضل بيهقي

(La olda formo estas Bājhāqi. Mi preferis la pli modernan prononcon Bejhāqi)

Ābolfāzl Mohāmmād filo de Hosejn Bejhāqi, naskiĝis en Haresabad, distrikto de la urbo Bājhāq/Bejhāq en la provinco Ĥorasano. Li instruiĝis en Nejšābur.

Fariĝinte disĉiplo de Bu-nāsr Moŝkan, li ekis ofici en la Skribejo (Divano de Leteroj= Oficejo kie oni verkis/skribis ŝtatajn leterojn, dokumentojn ktp) de la sultano Māhmud Gaznavi (da), la tiama turka reganto de orientaj teritorioj de Irano.

Post la morto de Moŝkan, Bejhāqi ankoraŭ oficis sub la nova estro de la Skribejo, Bu-sāhl Zuzāni, kaj daŭrigis sian servadon ĉe tiu divano en la tempoj de la anstataŭantoj de Māhmud: Mās’ud, Moŭdud kaj Abd-ol Rāsīd.

Eble en la tempo de ĉi-lasta reĝo (440–444 p.H.) Bejhāqi fariĝis divanestro, sed post mallonga tempo oni eksigis kaj mal-liberigis lin. Kiam Toqrol la Selĝukida (Sālĝuqi) venkis la Gaznavidojn, Bejhāqi ankoraŭ estis en la prizono.

Ŝajnas ke post sia liberiĝo li vivis izole en la urbo Qáznin ĝis sia morto.

La plej fama verko de Bejháqi estas lia historilibro, pri la reĝado de la Gaznavidoj, en 30 volumoj, el kiuj restis nur parto kiu parolas pri Más'ud Gaznavida kaj iomete pri ŝahoj de (la regiono) Ĥarázm (el la ekdisfalo de la Mamunidaj Ĥarázmŝahoj ĝis la konkero de la Selĝukidoj).

La libro, fama sub la nomo “Tariĥ-e Bejháqi = la histori(libro) o de Bejháqi” estas unu el la plej gravaj perslingvaj klasikaĵoj, ĉu el la vidpunkto de la fidindaj historiaj rakontoj, ĉu el la vidpunkto de la elokventa persa lingvo. La libro estas plurfoje (re)presita. Jen fragmento el tiu libro:

Rakonto pri Násr-e Áhmád (Násr filo de Áhmád)

Mi legis en la rakontoj pri la Samanida dinastio ke Násr-e Áhmád-e Samani estis ok-jara kiam oni mortigis lian patron en ĉasejo. Tagon poste oni reĝigis lin.

Tiu leonido fariĝis lerta princo, ekregante ĉiujn reĝajn tas-kojn. Tamen en li ekzistis tro da malbono, perfortemo kaj malico. Li donis tre severajn ordonojn kiam li estis kolera. La homoj abomenis lin.

Finfine li konsultis sian saĝon. Ja li eksciis ke liaj faroj ne estas belaj.

Iun tagon li kunsidis kun sia ĉefveziro Bál'ámi kaj sia Skrib-divan-estro Bu-Tájjeb Mos'ábi. Tiuj ranguloj ambaŭ estis unikaj kleruloj.

La reĝo klarigis sian problemon: Mi scias ke tiuj faroj miaj estas grandaj eraroj. Mi ne povas regi mian koleron. Kiam la fajro de la kolero estingiĝas, tiam mi pentas, sed jam kia utilo? Eble tiam oni, laŭ mia ordono, jam senkapigis iun, detruis familion aŭ punis iun. Kion vi proponas pri tio?

– Eble estus utile se la reĝa moŝto starigus ĉe si saĝajn kunulojn kiuj krom saĝon havu ankaŭ paciencon kaj afablon. La reĝa moŝto permesu ke ili sentime intervenu kiam la reĝo koleriĝas kaj se la reĝo donas bonan ordonon, ili grandigu tiun bonfaron en la okuloj de la reĝo, ...ĝis la reĝo al kutimiĝos daŭre

fari tiajn ordonojn. Ni pensas ke se la reĝa moŝto akceptos, la aferoj iros pli facile.

Násr akceptis ilian proponon kaj diris: Mi aldonas ion alian por fini la aferon. Mi ĵuras per fortaj ĵuroj: pri kio ajn mi ordonos, oni ne plenumu tion ĝis post tri tagoj, ĝis mia kolerfajro estingiĝos kaj la intervenantoj diros siajn vortojn. Post tio, mi re-rigardos la aferon. Se mi pravos, oni punu per malpli ol cent ver-gobatoj, se mi malpravos mi nuligos la ordonon kaj kompensas al la koncerna homo. Ĉiuokaze oni plenumu la punon laŭ la ŝario.

Bál'ámi kaj Bu-Tájjeb diris ke post kelke da tempo la aferoj enordiĝis...

Kaj la reĝo ordonis (al tiuj du menciitaj saĝuloj): Serĉu en mia lando la plej saĝajn homojn kaj alvenigu ilin al mia kortego. Tiam mi diros kion mi devos diri.

Ili ambaŭ fariĝis ege ĝojaj ĉar la plej granda danĝero antaŭ ol ĉiun minacis ilin mem. Ili ekserĉis en la lando kaj trovis sep-dek kelkajn saĝulojn el grandaj familioj kiuj estis famaj en la ĉefurbo Buĥara.

La reĝo ordonis testi ilin dum jaro kaj elekti el inter ili nur la tri plej saĝajn.

La tri plej saĝajn oni invitis ĉe la reĝon. La reĝo mem testis ilin dum semajno.

Trovinte ilin taŭgaj, la reĝo malkaŝis sian sekreton al ili kaj ĵuris per fortaj ĵuroj buŝe kaj skribe ke li permesas al ili propeti ĉiun akuziton kaj paroli pri ĉiu afero sentime kaj senzorge.

Pasis jaro kaj la reĝo fariĝis alia Ahnaf-e Qejs. (Ahnaf ben/filo Qejs Támimi, ĉe la araboj estas fama pro saĝo kaj pacienco).

Tiele foriris la malbona konduto de la reĝo ke la homoj faris lin proverbo.

16– Naser Ĥosro

(394–481 p.H = 1003–1088 p.K)

ناصر خسرو

Hákim (polimato) Ábu Moin Naser filo de Hares Qábadiani Bálĥi, konata ankaŭ sub la kromnomo Hoĝĝát, estas fama poeto

kaj lerta verkisto perslingva. Li estas unu el la plej kleraj filozoj de Ismailismo (en PIV; ismailanoj. Sep-imamaj ŝijaistoj. Nuntempa reganta religio en Irano estas 12-imama ŝijaismo).

Junaĝe li estis oficisto ĉe regantoj de Ĥorasano. Poste pro interna ŝanĝiĝo li komencis vojaĝi. Kvar fojojn li faris haĝon, vojaĝis al Egiptio kaj fariĝis adepto de Ál Mostánsir Bellah (Vikipedie: Al-Mustansir Billah), la 8-a Fatimida kalifo, de kiu Naser ricevis la kromnomon Hoĝĝát (signo de Dio, rango el la Ismailana hierarkio) por la *insulo* Ĥorasano.

Ĥorasano geografie ne estas insulo. La ismailanoj dividis la mondon en 12 administrajn insulojn kaj por ĉiu insulo elektis estron kiun oni nomis Hoĝĝát.

Post 7-jara vojaĝo, en la jaro 444 p.H. (1052 p.K), li revenis al la patrujo.

Sed post mallonga restado en Ĥorasano kaj Mazándáran, li foriris al Bádáĥŝan (nuntempe urbo en Afganio) pro politika kaj religia kialoj. Tie, li ekloĝis en la kastelo Jomgan kaj propagandis sian novan religion, verkis, versis kaj tie li ankaŭ mortis.

De Naser restas multaj prozaj kaj poeziaj verkoj. La prozaj ofte estas en konversacia filozofia lingvo. Lia libro *Zad-ol-Mosaferin* (provianto de pasaĝeroj), verkita en la jaro 453 p.H. (1061 p.K.), estas unu el la bazaj filozofiaj libroj por ismailanoj kaj ankaŭ unu el la gravaj libroj por perslingvaj lingvistoj kaj literaturistoj.

Jen fragmento el tiu libro, eldonita en la jaro 1341 p.H. (1922 p.K) en Berlino.

Vortoj pri paroloj de Mohámmád Zákárja (pri Hjulo)

(*Hjulo*: la eterna baza materio. Mi ne trovis Esperantan ekvivalenton por la filozofia termino هیولی Perslingve / *Hyle* anglalingve / *Hylé* franclingve, do portempe mi uzas *Hjulo*. Said)

La kredantoj de la hjulo, kiel Iranŝáhri (en la anglalingva Vikipedio: Abu al-Abbas Iransahri) kaj Zákárja Razi (Vikipedie: al-Razio 854–925 p.K.) kaj aliaj, diras ke la hjulo estas *senkomenta* substanco. (*ázál* estas eterna sed de ĝia komenca

flanko, *ábád* estas eterna sed de ĝia fina flanko, *sármád* estas eterna dekomence kaj ĝisfine).

Razi konstatis kvin eternajn substancojn: Hjulo, Tempo, Spaco, Spirito, Dio.

Li (Naser, same kiel Majmonido, ne ŝatis Razi-on) diris ke la absoluta hjulo estas nedivideblaj eroj (atomoj?), tamen ĉiu hjul-ero havas dimension, ĉar se ĝi ne havus dimension, el ĝi ne povus estiĝi dimensihava objekto. Ĉiu ero de la hjulo estas plej eble malgranda, ĉar se la hjul-ero estus dividebla, ĝi ne plu estus simpla nedividebla ero, sed ja estus kunmetito. Hjulo, kiu estas la materio de la objektoj, ne povas esti kunmetito, ĝi estas simpla (ne-komponaĵo).

Li (Razi) ankaŭ diris pri la hjulo; la objektoj konsistas el tiuj ne divideblaj eroj kaj en la fino de la mondo ĉiuj objektoj malmultiĝas en tiujn erojn, tio estas la absoluta hjulo.

Li ankaŭ diris ke la hjulo estas eterna, (Naser kritikis Razi-on ke Razi kredas je kvin eternuloj/nekreitaĵoj kaj tio estas kontraŭ la kredo de Naser) ĉar ne eblas ke ĝi (hjulo) estu kreita dum el ĝi estiĝis aliaj aĵoj. (kreanto mem ne povas esti kreita). La racio ne akceptas tion.

Li ankaŭ diris ke el tiuj eroj de la hjulo kiuj kuniĝis pli forte, estiĝis la esenco de la tero. El tiuj eroj kiuj kuniĝis pli leĝere, estiĝis la esenco de la akvo. Tiuj kiuj kuniĝis pli maldense, estigis la esencon de la aero, kaj tiu kiu estas pli maldensa ol la aero, estas fajro.

Kaj li diris ke el (tiuj eroj de la esenco de) la akvo, tiuj kiuj ankoraŭ pli densiĝas, faras la teron, kaj tiuj kiuj ankoraŭ pli maldensiĝas ol ilia (akva) substanco, fariĝas aero.

Kaj el la aero, tiuj kiuj pli densiĝas ol ili estas, fariĝas akvo kaj tiuj kiuj pli maldensiĝas ol ili jam estas, fariĝas fajro.

Tial estas ke se oni batas feron al ŝtono, kreiĝas fajreroj, ĉar la aero kiu estas inter la fero kaj la ŝtono, liberiĝas. La nesciulo pensas ke el la fero kaj ŝtono kreiĝas fajro. Se fajro estus en la ŝtono kaj fero, ĝi farus ilin kiel ĝi mem varma kaj luma, ĉar la karaktero de la fajro estas fari ĉion, kio estas en ĝi, kiel ĝi mem...

17- Onsor-ol-Máali Kejkavus

عنصر المعالی کیکاوس

(1021–1087 p.K. La antikva prononco estas Káj-Kavus. *Káj* signifas “reĝo”)

Filo de Eskándár (Aleksandro) filo de Šáms-ol-Máali Qabus
filo de Voŝmgir (Voŝum-gir / Uŝum-gir = Koturno-ĉasisto) filo de
Zijar Dejlámi.

Li estis unu el la plej kleraj emiroj de la Zijarida dinastio. Li
vivis en la tempo kiam la selĝukidaj turkoj invadis Iranon.

Li verkis la libron *Qabusname* en la jaro 475 p.H. (1082
p.K.) por admone eduki sian filon Gilanŝah. La libro enhavas
utilajn informojn pri la antaŭmongola kulturo en Irano menciante
pri diversaj metioj, ceremonioj, militarangĝoj, regadmanieroj, so-
ciaj aferoj, tiutempaj sciencoj kaj teknikoj ktp.

La stilo de Emiro Kejkavus en tiu ĉi libro estas simpla, kiel
aliaj tiutempaj verkaĵoj, dum la kvara kaj kvina p.H-aj jarcentoj.
Jen fragmento el tiu libro:

La rajtoj de la infano

Vi devas instrui al via(j) infano(j) ĉion kion vi kapablas el
sciencoj kaj artoj. Tio estas via patra devo se vi estas afabla patro.
Neniu estas imuna kontraŭ la okazaĵoj de la vivo. Neniu scias kio
okazos al ni. Ĉiu scio, ĉiu arto, ĉiu metio iam utilos. Do, oni ne
estu maldiligenta lern(ig)i sciencojn kaj teknikojn.

Se la instruisto de via infano edukvergos lin, ne tiom emociigu!
Lasu lin vergi, ĉar la infanoj edukiĝas per vergoj pli bone
ol propravole.

Se via infano faros malĝentilaĵon kaj kolerigos vin, ne batu
lin per viaj propraj manoj. Timigu lin per liaj instruistoj. Permesu
ke la instruistoj faru tion. Tiamaniere la infano ne pensos venĝi
kontraŭ vi. Estu kun li ĉiam pacienca se vi volas ke li ne malrespek-
tu vin kaj restu timema antaŭ vi.

Se li bezonas monon, donu al li por ke li ne sopiru vian morton
por mono kaj heredaĵoj.

La pano de la infano estas lin eduki kaj kulturi. Eĉ se li ne estas talenta, vi ne atentu tion kaj faru vian plej-eblon. Se vi instruos aŭ ne, la vivo mem edukos lin, do vi faru vian patran devon. Li vivos tiele kiel li estos provizita.

Alia fragmento el tiu libro:

Moroj de gastado kaj gastigado

Ne gastigu ĉiu-tage nekonatajn homojn ĉar vi ne povos dece fari la devojn de gastiganto. Pensu kiom da fojoj vi emas gastigi. Se ekzemple tri fojojn monate, do faru nur unu fojon sed elspezu la koston de tri festenoj en unu festeno. Tiele via manĝotablo estos senmanka kaj la buŝoj de la riproĉantoj estos fermitaj.

Kiam la gastoj envenas, vi iru akcepti ilin. Bonvenigu ĉiun gaston laŭ lia rango.

Antaŭ ol la ĉefmanĝaĵo, proponu sezonfruktojn. Donu iom da tempo kaj poste invitu ilin al la ĉefmanĝaĵo. Vi ne sidiĝu ĝis viaj gastoj invitos vin eksidi. Se por la unua fojo la gastoj invitos vin eksidi kaj kunmanĝi kun ili, vi respondu: Ĉu mi sidu? Mi volas zorgi pri via bonfarto... Se plian fojon oni petos vin eksidi kaj kunmanĝi, vi sidiĝu kaj kunmanĝu...

Ne pardonpetu de la gastoj, ĉar pardonpetado estas kutimo de la bazaruloj. Ĉiu-momente ne ripetu: ho vi amiko, manĝu, vi manĝas nenion, bonvolu manĝi, mi ne sukcesis prepari ion decan, espereble alifoj mi faros pli bone ktp. ktp. Tiuj ĉi vortoj ne estas vortoj de eminenta gastiganto, sed estas vortoj de tiuj kiuj unufoje jare gastigas, kiel bazaruloj. Pro tiuj vortoj la gastoj ne povos bone manĝi kaj ekstaros duonsate.

Ni, en Gilan (33), havas bonan kutimon: Se envenas gasto, la gastiganto metas trinkaĵojn kaj manĝaĵojn sur la manĝotablon kaj mem kun siaj familianoj foriras, krom unu persono kiu zorgas la manĝilaron. Tiele la gastoj komforte manĝas. Fine, la gastiganto revenas. Ankaŭ la kutimo de araboj estas sama...

Kaj la servistojn, lakeojn kaj grumojn de la gastoj respektu kaj regalu bone, ĉar la onidirojn ili faras... . Kaj ordonu ke oni metu sufiĉe da floroj kaj frandaĵoj. Kaj ordonu inviton de bonaj

muzikistoj. Se vi ne havas bonan vinon, ne invitu iun, ĉar panon ĉiu havas por manĝi en sia hejmo. Bona *Sejeki* (irana arako) kaj bona muziko kovras la mankojn de la manĝotablo. Kvankam *Sejeki*-drinkado estas delikto, tamen se vi volas fari delikton, ne faru sen delikataĵo. Se vi drinkos *sejeki*, drinku la plej bonan kaj se vi aŭskultos al muziko, aŭskultu al la plej bela. Se vi faros pekon, faru kun bona homo, ĉar en la postmorta vivo oni pride- mandos vin pro viaj pekoj, almenaŭ en tiu ĉi vivo oni ne riproĉu vin (pro malaltrangaj kamaradoj)...

Ne estu gasto de ĉiu ajn. Tio damaĝos vian dignon. Se vi iras ien gasti, ne iru malsata nek tiom sata ke vi ne povos manĝi. Tio ofendos la gastiganton. Enirinte la domon de la gastiganto, eksidu en loko kie taŭgas al vi. Se la gastiganto estas el intimaj konatoj, ne obligu ĝenon postuli tiun aŭ tiun ĉi trinkaĵon aŭ manĝaĵon. Ne ordonu al la lakeoj de la gastiganto ke tiu ĉi pleto tie pli bonas aŭ metu tiun tason tie ĉi, ktp. por montri ke vi havas hegemonion en tiu domo...

Ne fariĝu ebria. Trinku tiom ke revenante hejmen survoje oni ne rimarku la efikon de la ebrieco en via vizaĝo. Se vi volas plenebriiĝi, faru en via propra domo. Se vi trinkis eĉ unu pokalon kaj viaj subuloj faras cent malbonaĵojn, ne punu iun ajn, eĉ se tiu estas puninda, ĉar se trinkinte vi punas iun, oni diras ke vi ebrias. Plenumu viajn decidojn kiam vi estas sobra...

18- Ĥaĝe Ábdollah Ánsari (396 p.H / 1006 p.K, Herat – 481/1088)

خواجہ عبداللہ انصاری

Ŝejko de Islamo, Ábu Ismail Ábdollah filo de Mohámmád, Ál Ánsari Ál Herávi estas fama sufio (ano de sufismo), verkisto kaj poeto de la persa lingvo. Li studis religiajn kaj literaturajn aferojn. Li versis perse kaj arabe ofte en la paronomazia stilo kaj rimohava prozo. En la sufismo, li estas adepto de la ŝejko Ábolhásán Ĥáráqani kaj fariĝis lia anstataŭulo. Jen fragmento el lia libro *Kenz-os-Salekin*:

Saĝo kaj Amo

Derviŝo demandis tiun ĉi fakiron (T.e. min! Sufioj nomas sin Derviŝo, Fakiro ktp.): Kiel mi serĉu Dion? Ĉu per la amo aŭ per la saĝo? Kiu pli bonas, la amulo aŭ la saĝulo?

Mi respondis: Iun tagon venis en mian kapon tia penso. Subite mi falis en fifieron: kiom pia mi estas kaj kiom grava pro mia preĝado...

Mi vidis mian animon dancanta kaj intencanta levi la velon ĝis stelo.

Diris mi: For de la rigarderoj, antaŭ vi la danĝeroj, naĝis mi en varmaj larmoj kaj lamentadis. Neniigis ĉe mi la adorado, kiel ĉe Adamo, kaj pro ŝvitmalsekiĝo dum vekigo, mi endormiĝis. Mi vidis min rajdanta sur ĉevalo, ĉe monto kaj ĉe valo, per skurĝo favora, mi iris al la urbo Hera. Ĝi havis fortan kastelon, skrapantan stelojn...ĝia rivero el la larmoj kaj ĝia turo el la lumo. Mi eniĝis la urbon paradizan kaj vidis homojn en domoj, kaj du personojn kiuj celis regadi. Unu estis la saĝo kaj alia la amo. Mi observis kiun atingos la krono kaj kiun favoros la trono.

La saĝo diris: Mi estas la kaŭzo de la evoluo.

La amo respondis: Mi ne estas fantazio de revulo.

- Mi estas granda urbo plena de loĝantoj.
- Mi estas papilio freneza kiel vinpostulantoj.
- Mi estingas la flamon de la doloro.
- Mi trinkas la pokalon de la malkoloro.
- Mi estas Jona se temas pri sinsavo.
- Mi estas Jozefo se temas pri riproĉo.
- Mi estas saĝa Aleksandro.
- Mi estas kanta kalandro.
- Mi estas estro de la urbo de l' kreitaĵoj.
- Mi estas pli bona ol ĉiuj kreitaĵoj.
- Mi estas titristo de la kondukt-argento.
- Mi estas haremano de la am-haremo.
- Mi respektas pion.
- Mi aŭdis nenion...

19– Nezam-ol-Molk Tusi

(1019 – 1092)

En Vikipedio: Abu Ali al-Hasan at-Tusi Nizam al-Mulk.

نظام الملک

Li naskiĝis en la vilaĝo Noŭqan apud Radákan apud Tus (nuntempe Máshád-Irano). Lia patro havis ŝtatan rangon en Tus. Nezam edukiĝis en la urboj Tus, Márv kaj Nejŝabur. Li studis ŝafeisman teologion kaj juron. Pli poste li vojaĝis al Bálf kaj ĉe Ábu Áli Ŝazan komencis labori kiel oficisto. Post la konkero de la Selĝukidoj, Ŝazan fariĝis veziro de Ĉaqri Bej(k) kaj lasis Nezam-on en sia servo kaj igis lin sekretario de Alp Arslan (filo de Ĉaqri).

Kiam Alp Arslan anstataŭis sian patron kaj fariĝis la reganto de Ĥorasano, li elektis Nezam-on ministro de si (451 p.H./1059 p.K.) kaj post kvar jaroj, kiam li fariĝis reĝo de la tuta lando, li eksigis la ĉefveziron de la lando Ámid-ol Molk kaj elektis Nezam-on anstataŭ Ámid. Nezam fariĝis Nezam-ol Molk, la ĉefveziro de la lando. (455 p.H./1063 p.K.).

Nezam restis veziro dum 30 jaroj de Alp Arslan kaj Málekŝah la selĝukidaj.

Pro lia kompetento la irana regno atingis sian plejan disvastiĝon dum la islama periodo.

En la jaro 485 p.H./ 1092 p.K. dum li vojaĝis kune kun Málekŝah al Bagdado, iu *Asasino* (el la adeptoj de Hásán Sábbah la ismailana) atakis lin kaj mortigis lin.

Pri la spertoj de sia longdaŭra vezireco li verkis la libron *Siasátname* (Politiklibro – alinome *Sijár-ál Moluk= Trajtoj de l' reĝoj*).

Ĝi estas unu el la plej bonaj klasikaĵoj de la persa lingvo, preskaŭ unika pro siaj stilo, klaraj frazoj kaj abundaj temoj.

En la libro troviĝas multaj informoj pri politikaj, sociaj kaj religiaj demandoj, kvankam la celo de la aŭtoro ne estis kolekti tiajn informojn. Nur laŭbezone li citadis rakontojn pri antaŭaj politikaj aŭ sociaj problemoj, celante doni taŭgajn instruojn por bona regado.

Verŝajne li havis aliajn verkojn, kiujn oni ne trovis. Krom lia supremenciita libro, oni trovis testamenton de li en la biblioteko Nafiz Paŝa en Istanbulo.

Jen fragmento el lia testamento:

Vásijátname (testamento)

Tiele diras mi Ábu Áli...(li nomas sin ne per siaj honornomoj) per mia sana saĝo kaj konfesraĵto dum mia konscio sane funkcias kaj mia kredo estas plena ke,...en la vivomaro mi atingis la bordon kaj ankoraŭ antaŭen iras...mia frato, ĥaĝe Fâqih, ple-numu mian testamenton. Kion mi havas, el la mondaj havaĵoj, estu traktita laŭ la leĝoj de Alaho.

La infanojn ilia patrino edz(in)igu, subtenu ilin kaj prizorgu ilian edukadon.

Se atingos al ŝi (mia edzino) la informo pri mia morto, ŝi funebru dece kaj konsolu la postrestantojn, ĉefe la knabinojn. Ŝi iru al la reĝa kortego, vizitu miajn amikojn, ĉu turkojn ĉu irananojn, kaj helpe de ili sciigu la reĝan moŝton ke tiu ĉi maljunulo diris: “Mi faris decajn servojn al la ŝtato, kiuj restas bonfamaj. Riĉuloj estu al mi dankemaj. Neniam mi faris malbonon nek perfideton. Mia zorgemo estis plena. La fisko kaj la popolo ambaŭ estis kultivataj. Mi malaperigis la oponantojn de la ŝtato kaj sekurigis la mondon per justeco. Eble post mia morto, kiam oni donos mian respondecon al alia homo, tiam pli klariĝos tio kion mi faris por la bonfarto de la ŝtato kaj la popolo. Mi eĉ supozas ke post mi neniu povos por eĉ unu monato teni la mondon (landojn de la regno) en la sama ordo. (Neniu povos kiel mi administri la landon).

Mi iras (al la morto) kaj lasas amason da homoj, junaj kaj aĝaj, multe pli ol miajn proprajn infanojn, al la graco de Alaho kaj poste al la bonvolemo de la sultano...

Miaj enspezoj ne estis kaŝitaj. Mi pasigis la vivon kelkri-mede. Ŝajne mi vivis en lukso kaj havis rajdĉevalojn, domojn, servistojn ktp. kiujn mi ne povis ne havi, sed en mia koro estis kaj estas nenio! (Tiu lukso ne devoĵigis min)...

20– Surabadi

(mort. 1100)

سورآبادی

Ábubákr Átiq filo de Mohámmád Herávi Surabadi, samtempulo de Alp Arslan la selĝukida, estas unu el la gravaj perslingvaj ekzegezistoj de Korano. Li mortis en la jaro 494 p.H./ 1100 p.K. Li verkis sian libron *Táfsir-e Surabadi* (ekzegezo de Surabadi) en la jaro 480 p.H.

La prozstilo estas tre elokventa, plenplena de malnovpersaj vortoj kaj bele simplaj tradukoj de koranaj versoj al la persa lingvo.

Jen fragmento el lia libro.

Persoj kaj Romianoj

(komentario pri la surao *Ar-Rum* kaj rakonto pri venko de la persoj super la romianoj kaj venko de romianoj al la persoj).

Antaŭ la tempo de nia profeto – Dian saluton al li – inter Persio kaj Romio estis militoj kaj multaj konfliktoj.

Kiam la profeto – Dian saluton al li – en Mekko pretendis profetecon, samtempe la persoj grave venkobatis la romianojn tiele ke Romio perdis Levantenion (Sirion), Jemenon kaj arabajn insulojn. Ne-islamanoj, ĉefe la Kurajŝoj, fariĝis gajaj kaj ekiproĉis la islamanojn: Vi diradis ke la kredantoj de la sanktaj libroj venkos! La persoj ne estas kredantoj de la sankta libro sed romianoj jes! Kial venkis la persoj la romianojn?

Obájje Ĥáláf diris al Bubákr (Mallonga formo de Ábubákr, la unua kalifo): Evidentiĝis la mensogo de via amiko (la profeto) kiu diris ke la kredantoj al la Libro venkos. Bubákr diris: Vi vidis ke tre baldaŭ la romianoj venkos denove. Obájj demandis: Ĉu vi volas veti? Bubákr jesis. Ili vetis je kvin kameloj. Se dum kvin jaroj Romio ne venkos Persion, Bubákr donu kvin kamelojn al Obájj, se jes, li ricevu!

Ábubákr, jam vetinte, informis la profeton pri sia veto. La profeto diris: Pliigu la kamelojn je sep, kaj la jarojn ankaŭ! Ábubákr tiel faris. En la sepa jaro venis la novaĵo ke la romianoj

venkis la persojn. Ábubákr estis en Medino. Li skribis leteron al sia filo Ábdorráhman en Mekko, kiu ricevu sep kamelojn de la filo de Obájj.

Kaj la kialo de la venko de la romianoj – diras Ibn Ábbas (Allah estu kontenta pri li) – estis tio ke la profeto – Dian saluton al li – sendis kvar leterojn el Mekko al kvar reĝoj kaj invitis ilin al Islamo: unu al la Cezaro de Romio, unu al Neĝaŝi (Armah) la reĝo de Hábaŝe (Nuna Etiopio, tiama Aksuma Reĝlando), la trian al Máquqes la reganto de Aleksandrio (Ciro de Aleksandrio) kaj la kvaran al Ĥosroŭ la ŝaho de Persio. Ĥosroŭ disŝiris la leteron kaj revenigis la kurieron kunsendante kun li sakon da tero signe de humiligo.

Kiam oni informis la profeton, li diris: (Ĥosroŭ) disŝiris mian leteron, Allah disŝiru lian regnon!...

21- Algazelo

(1058– 1111)

غزالي

Ábu Hamed Mohámmád filo de Mohámmád Qázzali Tusi naskiĝis en la urbo Taberan en Tus, Ĥorasano, en la jaro 450 p.H./1058 p.K. Lia patro, Mohámmád, estis teksisto kaj la vorto Qázzali devenas de lia metio kaj absolute ne rilatas al gazelo.

Ábu Hamed Mohámmád kaj lia frato Áhmád, post la forpaso de la patro, iom da tempo loĝis ĉe Radkani, unu el la lokaj ulemoj, el kiu ili lernis la bazajn lecionojn pri la religio kaj literaturo.

Mohámmád Qázzali (Algazelo) post iom da tempo iris al Nejŝabur kaj ekstudis ĉe Imam-ol-Hárámájn Ábu-ál-Máali Ĝovejni, imamo de la Ŝafiismo (mort. 478 p.H./ 1085 p.K.) dialektikon kaj diskutarton, Kálam-on (islaman filozofiumadon) kaj rudimenton de la filozofio.

Apenaŭ 28-jara li jam estis majstro de siatempaj literaturo, ŝario, Hadis (Hadith/Hadiz...studoj pri paroloj kaj faroj de la profeto kaj liaj proksimuloj), dialektiko, Kálam, ktp. Post la morto de sia majstro, Algazelo fariĝis la granda majstro kaj ek-

oficis ĉe Nezam-ol-Molk Tusi. Nezam respektis lin kaj en la jaro 484 p.H./1091 p.K. donis al li katedron en Nezamije, la plej fama universitato tiutempe en Bagdado.

En la jaro 488/1095, t.e. en lia 39a jaraĝo, komenciĝis interna revolucio en li. Sekve, li substituis sian fraton Áhmád Qázzali (en la angla Vikipedio: Ahmad Ghazali) en sia instruista posteno kaj forlasis Bagdadon al Heĝazo, Levantenio kaj Jerusalemo kaj pasigis dek jarojn en tiuj lokoj. Li revenis al Tus en la jaro 498/1104. Jaron poste li iris al Nezamije Nejšabur por instrui sed post mallonga tempo revenis al Tus kaj komencis instrui en sia Ĥanqah (34) apud sia hejmo. Ekde tiam li ne plu akceptis la invitojn de la sultanoj kaj politikistoj por partopreni la politikajn aferojn.

Li verkis multajn librojn en la persa kaj araba lingvoj. Jen fragmento el lia libro *Násihát-ol Moluk* (Admonoj al regantoj):

Debir-eco kaj moroj de Debir-oj (35)

Saĝuloj diris ke nenio estas pli kara ol la kalamo (literasence skribilo/plumo— figurasence skribi/ verki), ĉar pro ĝi oni povas studi pri pasintaj aferoj, ĉar Dio —la granda— ĵuris per ĝi: “(mi ĵuras) per la inkujo kaj per la kalamo/plumo kaj per tio kion oni skribas.” (Korano 68/2).

Kaj aliloke diris Dio: “Legu/proklamu! Via Sinjoro estas (pli) Granda (Grandanima)— Tiu kiu instruis per la kalamo/plumo.” (Korano— 96/ 3 kaj 4). Ankaŭ la profeto de Dio diris: “Alaho— granda Li estas— kreis la kalamon plej unue”. Tio signifas ke la kalamo estas la unua kreitaĵo per kiu Dio difinis la aferojn ĝis la lasta tago.

Oni citas ke Ábdollah ben Ábbas interpretis tiujn ĉi versiklojn jene: Dio la granda informis pri Jozefo ke li petis Dion doni al li la trezorojn de Tero ĉar li estas Debito kaj kontisto...

Unu el la regantoj de Grekio diris: “Oni administras la mondon per du aĵoj, unu el kiuj estas sub la alia: glavo kaj kalamo! Kaj la glavo estas sub la kalamo. Per la kalamo oni lernas, pro la kalamo ni scias la opiniojn de aliaj homoj, ĉu proksimaj ĉu mal-

proksimaj. Kvankam la vivspertoj estas gravaj, tamen ne studinte librojn oni ne povas saĝiĝi...”.

Debiro devas scipovi, krom verkarton, multajn aliajn aferojn. Scipovi trovi akvon sub la tero por fari *karizon* (36), scii mezuradon de tagoj kaj noktoj en vintro kaj somero, scii pri la revoluoj de Luno kaj steloj kaj Suno, scipovi sufiĉe pri matematiko kaj geometrio, scii pri agrikulturo, medicino kaj medikamentoj, nordaj kaj sudaj ventoj, poezio kaj rimoj, kaj krom ĉio ĉi, la debiro devas esti facilanima kaj bonaspekta...

22- Omar Ĥajam (Ĥájjam)

(1048? – 1132?)

عمر خیام

Hákim (polimato) Ábolfáth Omar ben Ebrahim Ĥájjami, konata sub la nomo Ĥájjam (en okcidentaj lingvoj Kajjam, Chayyām, Khayyam, Jayam...), estas granda filozofo, matematikisto, astronomo, verkisto kaj poeto irana. Liaj samtempuloj nomis lin “la dua Aviceno” kaj laŭ ili la opinioj de Ĥajam pri astronomio kaj tempomezurado estis aŭtentikaj kaj fidindaj. Li estis astronomo, matematikisto kaj kuracisto en la kortego de Málekŝah.

Kunlabore kun Ábolábbas Lokári kaj Ábolfáth Ĥazeni, li starigis observatorion en la jaro 467 p.H., kiu funkciis ĝis la jaro 485 p.H. t.e. la mortojaro de Málekŝah.

Li verkis eseojn perslingve kaj arablingve, ekzemple pri algebro, konstruado, la metodo distingi la kvanton de oro aŭ arĝento en aloj, klarigi malfacilaĵojn de la Eŭklida geometrio, la ekzisto, la ĉieliro de la profeto, eseon pri ĝeneralaj scioj (por la filo de Nezam), perslingvigo de la Avicena libro Elokventa Parolado, kaj la faman perslingvan libron Noŭruzname (37), eseon pri Noŭruz (38).

Noŭruzname, per klara kaj elokventa prozstilo, klarigas pri Noŭruz, ĝia deveno, ritoj pri ĝi kaj reĝoj kiuj prilaboris tiajn ritojn.

Pri la rubaioj de Ĥajam alipaĝe ni skribos. Jen fragmento el lia libro Noŭrurname:

Noŭruz (38)

Pasis 421 jaroj de la reĝado de Ĝámŝid-ŝaho (41)... Suno revenis en sian zodiakan konstelacion, en Ŝafon, kaj la mondo estis en ordo...en la menciita tago li festis kaj nomis la tagon “Noŭruz”, kaj diris al sia popolo ke ili festu ĉiun (unuon tagon de) Fárvárdin (la unua monato laŭ la irana kalendaro kaj la unua monato de la printempo) kaj nomu ĝin Noŭruz.

Ĝámŝid estis tre pia kaj justa en la unuaj jaroj de sia regado. La mondanoj amis lin kaj estis ĝojaj pro li. Dio donis al li grandiozon, karismon kaj saĝon. Li malkovris la oron, juvelŝtonojn, silkon, bonodoraĵojn, kieluzon de kvarpieduloj...

Post kvarcent kelkaj jaroj da raĝado, la Arimano (39) eniĝis lian koron kaj dolĉigis la mondon al li. Kaj al neniu la mondo estu dolĉa! Li ekfieriĝis, egoisme faris maljustaĵojn kaj komencis kolekti trezorojn por si mem el la riĉaĵoj de la popolo.

La mondanoj eksuferis pro li kaj preĝpostulis de Dio lian falon. Foriris de li Dia Farho (40) kaj li ekeraris en ĉiuj siaj agoj.

Ekribelis Bivárásp – kies alia nomo estas Záhhak (42) – kaj venkis super Ĝámŝid. La popolo ne helpis al Ĝámŝid ĉar ili estis suferintoj de li. Li forfuĝis al Barato. Bivárásp (Záhhak) reĝiĝis kaj finfine trovinte Ĝámŝid-on duonigis lin per segilo.

Bivárásp reĝadis mil jarojn. Dum unuaj jaroj li estis justa sed pli poste li fariĝis maljusta. Pro arimanaj eldiroj kaj elfaroj, li devojiĝis kaj suferigis la homojn.

Ferejdun (43) venis el Barato, mortigis lin (Záhhak-on) kaj ekreĝis. Ferejdun estis el la sango de Ĝámŝid. Li reĝis 500 jarojn.

Kiam pasis 164 jaroj de la ekreĝado de Ferejdun, finiĝis la dua erao de la Kejumársa (44) Kalendaro.

Ferejdun akceptis la religion de Abrahamo – al li saluton. Li malsovaĝigis leonon, gepardon, elefanton, konstruis domojn, semis plantojn, fruktoarbojn, kortoflorojn ktp.

Aldono de kvar roboioj de Ĥájam/ Ĥájjam

En la poezia parto de la libro kiu estas mia fonto por elekti tradukaĵojn, ne estas roboioj de Ĥájjam. Kaj ne surprizas min, ĉar la verko estis celita esti universitata lernolibro kaj en nuntempaj iranaj universitatoj, Ĥájam, kiel poeto, ne estas bonvena, kvankam la mondfamo de li ne estas pro lia preciza kalendaro, liaj sciencaj kaj matematikaj kapabloj, sed pro liaj multlingve tradukitaj roboioj. Do mi elektis kvar liajn roboiojn el alia libro. Pliaj roboioj de Ĥájjam legeblas en Esperanto en la libro “La Robaioj de Umar Kajjam” de Gaston Waringhien.

Áz di ke gozášt hiĉ ázu jad mákon
Fárda ke nájamádást fájrad mákon
Bár namáde o gozášte bonjad mákon
Hali hoŝ baŝ omr bár bad mákon

Pri la pasinta hieraŭo ne plu rememoru
Pro la neveninta morgaŭo ne kriploru
Ne bazu vin sur la neveninto aŭ pasinto
La momenton ĝoju, vian vivon ne oferu

Ĥájjam ágár ze bade másti hoŝ baŝ
Ba lale-roĥi ágar neŝásti hoŝ baŝ
Ĉon aqebáte kare ĝáhan nisti ást
Engar ke nisti, ĉo hásti hoŝ baŝ

Ĥájjam, se vi ebrias pro la vino, ĝoju
Se vi sidas kun tulip-vang-ulino, ĝoju
Ĉar la fino de la mondafero estas neesto
Supozu ke vi ne estas, se jam vi estas, ĝoju

In kuze ĉo mán aŝeqe zari budást
Dár bándé sáre zolfe negari budást
In dáste ke bár gárdáne u mibini
Dástist ke bár gárdáne jari budást

Ĉi kruĉo estis kiel mi amanto plora
Interplektita en amatina reto harara
Ĉi anso sur la kolo de la kruĉo
Mano estis ĉirkaŭ la kolo de amatino kara

Ta Zohre o Mah dár aseman gášt pádid
Behtár ze meje nab kási hiĉ nádid
Mán dár áĝábám ze mej-foruŝan kiŝan
Beh zanke foruŝánd ĉe ĥáhánd hárid

De kiam ekaperis sur la ĉielo Venuso kaj Luno
Neniu vidis ion pli bonan ol puran vinon
Mi miras pri la vin-vendistoj; ĉu ili
aĉetos pli bonan ion, per la vinmono?

23– Ejn ol Qozat

(1098–1131)

عين القضاة

Ejn ol Qozat (arabe: Ájn ol Qozat), Ábol Máali, Ábdollah, filo de Mohámmád Mijaneĝi Hámádani, estas ŝejko de iranaj sufiroj en la komenco de la 6-a p.H-a jarcento.

Ŝajnas ke li pasigis iom da tempo en Ĥorasano. Tial iuj supozis ke li estas ĥorasanano.

Li disĉiplis ĉe Ĥájjam, Imamo Áhmád Qázali (Gazali), ŝejko Mohámmád Hámávi kaj lertiĝis pri teologio, filozofio, sufiismo, persa kaj araba literaturoj. Inter li kaj Áhmád Gazali estiĝis sincera amikeco. Gazali en siaj verkoj nomis lin “La lumo de miaj okuloj= mia plej kara”.

Liaj memstudoj estas vastaj. Lia talento estas miriga. Pro superrego de sufiisma ekstazo kaj mistikisma emociŝaŭmado, li deklaris malkaŝe kaj sen-time siajn travidaĵojn. Kiam li malkovris sian kredon, ian panteismon, li vekis la venĝemon de fanatikuloj. Oni finfine pendmortigis lin en la jaro 525 p.H./1131 p.K. en lia 33-a jaraĝo.

Liaj verkoj estas diversaj, ĉiuj klaraj, celdirektitaj, plenaj de mistikaj sopiroj, kun bonegaj filozofiaj, teozofiaj kaj altaj panteism-ekstazaj demandoj.

Jen fragmento el lia libro *Támhidat*:

La vero de la amo kaj ĝiaj statoj

Ho kara, aŭskultu ĉi tiun parolon de la profeto – al Li saluton – : “Kiu enamiĝas kaj kaŝas sian amon kaj mortas pro la amo, tiu estas martiro”.

Tiele mi antaŭpreparas la disvastigon de la amo. Ju pli mi penas eviti la amon, des pli ĝi pasiigas min. Ĉiu-okaze ĝi estas venkanto kaj mi estas venkato. Ĉu eblas batali kun la amo?

Versoj:

Ĉe la amo malfaciliĝas mia afero
La familio kaj mi neniĝas pro la koro
Se mi ekpensas forkuri el la amo
La amo antaŭ mi eniras la domon

Ho ve, la amo fariĝis ĉies devaĵo de la vojo. Ho ve, se vi ne havas amon al la kreinto, almenaŭ enamiĝu al kreito por ke vi komprenu la valoron de ĉi tiuj vortoj. Ho ve, kion oni povas diri pri la amo kaj kian signon oni povas montri pri ĝi? Paŝi en

la amon rajtas nur tiu kiu ne estu kun si mem, tiu kiu forlasu sin, oferu sin al la amo. La amo estas fajro. Kie ĝi ĉeestas, tie troviĝas nenio alia. Kie ĝi estas, tie ĝi bruligas ĉion, fajrigas ĉion. Ĝi igas ĉion kiel ĝi mem.

Versoj:

Tiu iras al la amo, kiu animon ne havas
Havi animon kaj ami? Ne eblas
Amsuferanton tial ne eblas kuraci
Ĉar kion palpas la fingro, amo ĝi ne estas

Ho kara, estas devo atingi Dion. Do, ajna rimedo bezonata por atingi Dion estas devo. La amo atingigas la kreiton al Dio, do la amo estas devaĵo de la vojo.

Ho kara, oni devas esti kiel Máĝnun (24) kiu kapablas morti aŭdinte la nomon de Lejli (24). Neamanto kion scias pri Lejli kaj ŝia amo? Tiu kiu ne amas Lejli-on, al li ne necesas tio kio necesas al la amanto. Ne ĉiuj havas tiajn okulojn kiuj vidante la vizaĝon de Lejli tuj devas fali en ŝian amon...

Versoj:

Tagojn du kiam mi vivas en la mondo
Se mi anime vivas, al mi la honto
Tiam mi estas viva kiam ĉe vi mi mortas
Kaj tiam mi estas morta kiam sen vi mi vivas

La frenezo de la amo estas pli bona ol la saĝoj de multaj homoj. Kiu ne havas amon, tiu estas freneza kaj senutila. Kiu ne amas, tiu estas egoisto, despoto kaj venĝema.

Ho ve, se nur eblus ke ĉiuj mondanoj estus amantoj! Tiam ĉiuj estus vivaj...

24– Násrollah Monši

نصر الله منشى

Ábolmáli Násrollah filo de Ábdolhámid Monši (sekretario) vivis en la tempo de Báhram-ŝah Qáznávi (Gaznavida) (512–547 p.H.) kaj Ĥosroŭ-ŝah (547–555 p.H.). En la tempo de tiu ĉi reĝo,

li fariĝis sekretario de la gaznavidoj kaj poste en la tempo de Ĥosroŭ, li fariĝis veziro. Pli poste oni malliberigis lin. La kialo kaj la preciza dato ne estas konataj al ni. Iam inter 555 p.H./1160 p.K. kaj 583 p.H./1188 p.K. la dato de la falo de Ĥosroŭ-ŝah, oni mortigis Násrollah-on.

La fama verko de li estas lia traduko el la libro Kálilá kaj Demná (2). La precizan traduk-daton ni ne scias, sed ĉar li faris ĝin je la nomo de Báhram-ŝah, tial temas pri antaŭ 547 p.H./1152 p.K. t.e. la fino de tiu ŝaho.

La traduko, pro sia elokventa sekretarieca prozo, referencoj, subtilaj alegorioj kaj literaturaj esprimoj, jam de longe estas atentata de epistolitoj kaj oficialaj verkistoj.

Bona redakto, bela kompono, artaj esprimoj kiel duonrimoj inter la frazoj, oftaj paralelismoj inter fraz-paroj, sinonimaj vortoj, enigo de arabaj, persaj kaj Koranaj versoj ktp. karakterizas la libron kiel unu el la fruaj belartaj prozverkoj de la persa literaturo.

Jen fragmento el tiu libro:

Ĉapitro “Borzuje la kuracisto”

Tiele diras Borzujе, la ĉefo de la persaj kuracistoj: Mia patro estis armeano kaj mia patrino el maga familio. La unua graco kiun donacis Dio –Alta kaj Sankta Li estas– (45) al mi, estis la amikeco de la gepatroj kaj ilia favoro al mi, kaj tiel mi estis aparte edukita.

Kiam la jaroj de la vivo atingis la sepan, ili kuraĝigis min ekstudu la medicinon. Post mallonga pripensado mi ekkonis la valoron de tiu scienco kaj per vera volo kaj klara avido mi klopodis lerni ĝin. Baldaŭ mi famiĝis kaj komencis kuraci malsanulojn.

Poste mi devis elekti unu el jenaj kvar neeviteblaĵoj: La multon de la riĉaĵoj, la ĝojon de la momentoj, la famon aŭ la eternan rekompenco!

Estas evidente ke la kuracarto estas admirata kaj laŭdata. Kaj oni rakontis en la medicinaj libroj ke la plej kleraj kuracistoj estas tiuj kiuj kuracas la malsanulojn ne por mono sed por rekompenco en la alia mondo. Tiele oni povus akiri kaj la mondan rekompenco-

con kaj la postmortan. Tio similas al la celo de kamparano kiu semas por rikolti grajnoj sed konsekvence produktiĝas ankaŭ pajlo kiu estas manĝaĵo de brutoj. Do mi strebis al tiu profesio. Informiĝinte pri malsanulo, kie ajn li estis, mi iris kuraci lin, se li estis kuracebla. Tion mi faris nur por kontentigi Dion.

Sed post iom da tempo, vidinte aron da samprofesiaj kolegoj, pli riĉaj kaj pli altrangaj ol mi, mi inkliniĝis al tiaj aĵoj kaj la deziro de ĉi-mondaj vantaĵoj ektentis min. Estis proksime ke miaj piedoj devojiĝu. Mi diris al mi mem: ĉu vi ne konas la diferencon inter tio kio bonas kaj tio kio malbonas? Kial la saĝulo enkorigu la amon de la vantaĵoj kies sufero estas multe pli? Kaj ĝia utilo estas tre malmulta. Se vi sufiĉe pripensus la finon de la aferoj kaj ankaŭ pri la morto kaj postmorto, elĉerpiĝus via avido al tiuj ĉi neniigontaj mondaĵoj.

Kaj la plej forta kialo por forlasi la mondon estas tiuj ĉi kelkaj fiaĉaj homoj kiujn trompis la mondo. Evitu tiun malbonan penson kaj strebu akiri Dikompaton, ĉar la vojo estas danĝera kaj la amikoj ne tiom intimaj! Kaj la morto estas proksima kaj la dato de la ekvojaĝo ne difinita...

25- Nezami Āruzi

نظامی عروضی

Ābolhásán Nezamoddin Áhmád filo de Omár filo de Āli Sámárqāndi, aŭtornome Nezami Āruzi, estas poeto kaj verkisto de la sesa jarcento p.H. Li estis kortega poeto de la Ŝánsábāni-reĝoj. Li kelkfoje vojaĝis al Ĥorasano kaj tie vizitis Omár Ĥájjam (506) kaj Moezzi (510).

Lia fama verko Mágma-on-Návader (kolekto da raraĵoj), ofte fama sub la nomo Ĉáhar Máqale (kvar eseoj), priskribas kvar grupojn de la proksimuloj de reĝoj: sekretarioj, poetoj, astrologoj kaj kuracistoj.

Komence de ĉiu eseo la aŭtoro per beletra prozo skribas pri la kondiĉoj kaj bezonaĵoj de la profesio. Dum la priskribo li citas biografietojn pri la sciencistoj kaj literatoroj. Tial la libro “Kvar eseoj” krom sia kritika aliro al la kvar profesioj estas grava libro ankaŭ pro tiuj biografioj.

La dato de la verko eventuale estas ĉirkaŭ 551–552 p.H./1156–1157 p.K.

La stilo de Nezami estas bona kaj plaĉa. Li estas unu el la unuarangaj perslingvaj verkistoj.

Kvankam komence de ĉiu eseo Nezami emas uzi pezan, ornaman, artaĵplenan stilon, tamen pli poste en la eseo li esprimas sin pli simple kaj sen superfluaĵoj.

Jen fragmento el lia libro:

Pri la sekretari-arto

La sekretariarto estas artprofesio kiu enhavante oratorajn kaj elokventecajn analogiaĵojn utilas al interparolado, konversacioj, konsilado, polemikoj, panegiroj, mallaŭdoj, ironioj, troigoj ktp.

Do, la sekretario devas esti el bona familio, el bona kredo, havi klaran penson kaj profundan konon. Li devas esti sufiĉe edukita kaj bone koni la lingvon kaj literaturon. Pri logikaj dilemoj li devas scii sufiĉe. Li devas koni la famulojn kaj iliajn veraĵajn rangojn. La sekretario ne devas okupiĝi pri riĉaĵoj. Laŭdoj kaj kritikoj ne devas povi ŝanĝi lin.

En la verkstilo lia maniero devas esti tiele ke la vortoj sekvu la signifon (ne vortludu) kaj li verku mallonge. Se la signifo sekvu la vortojn (se oni multe vortludas), la frazoj longiĝas kaj tiam oni nomas la sekretarion “multparolulo” kaj “multparolulo estas vanparolulo”...

Kaj la parolo de la sekretario ne atingas tiun nivelon se li ne lernas de ĉiu scienco iom kaj de ĉiu instruisto ion.

Li devas al kutimiĝi al la studado de Korano kaj paroloj de la profeto kaj liaj apostoloj, arabaj kaj iranaj tekstoj...

26-Áttar (mort. 1221?) عطار

Ŝejko Fárid-od-din, Ábu-Hamed Mohámmád filo de Ábu-Bákr Ebrahim Áttar Kádákáni Nejšaburi, estas fama poeto, verkisto kaj sufio de la sesa j.c. p.H. kaj la komencaĵ jaroj de la sepa.

En tiu epoko oni vendis spicojn, drogojn, herbajn medikamentojn k.s. en sama vendejo kiu nomiĝis “Áttari” kaj Áttar estas tia vendisto. La vorto venas de la vorto Átr=parfumo.

Áttar havis tian vendejon kaj verŝajne ankaŭ kuracis malsanulojn per tiaj aĵoj. Li bone konis la persajn poezion kaj prozon.

En iu momento, pri kies dato ni scias nenion, okazis interna ŝanĝo en li. Oni diras ke venis derviŝo en lian magazemon kaj mire demandis lin:

– Kun tiom da riĉaĵo kiel vi povos facile morti?

Áttar koleriĝis kaj demandis la derviŝon: Kiel vi mem povos morti?

La derviŝo ekkuŝis, metis sian lignan tason sub sian kapon kaj tuj mortis! Tre facile!

La okazaĵo profunde ŝanĝis Áttar-on. Li lasis la magazemon, kuracadon, komercon, kaj ekermitiĝis.

Dum la ermita vivo li komencis poemumi. Liaj tre subtilaj poemoj estas en la formo de versduo. Li verkis ankaŭ libron proze: Tázkáretoloŭlia (Biografio de Diamikoj).

Lia libro enhavas la biografiojn de 96 sufioj kaj derviŝoj kaj laŭeble citaĵojn de iliaj verkoj aŭ eldiroj.

La libro havas klaran, simplan kaj flue legeblan stilon krom komence de ĉiu biografio, kie troveblas iom da plaĉaj vortludoj.

Onidire Áttar estis mortigita fare de mongoloj en la jaro 617 aŭ 618 p.H. (1221? P.K.)

Jen specimeno el lia libro pri iu sufio:

Ábdollah Mobarák

Tiu epoka gloro kaj sekura kolono, tiu imamo religia kaj vojo privilegia, tiu emiro de la lango kaj sango, havis la nomon La Ŝaharŝaho de la Ulemoj. Pro siaj scio kaj kuraĝo, li estis unika...

Mi rakontu lian unuan penton: Li falis en la amon de servistino. La amo estis arda kaj maltrankviliga. Iun vintran nokton li staris ĝis la mateno sub la muro de la domo de sia amatino. Neĝis la tutan nokton. Kiam muezino azanis (47) pri la matenpreĝo,

Ábdollah supozis ke temas pri la noktoreĝo! Sed kiam li vidis la tagiĝon, li komprenis ke li estis tiom profunde okupita pri sia amatino ke li ne rimarkis la pason de la nokto. Li murmuris al si mem: “Honton al vi ho filo de Mobarák! En nokto tiom beata (Mobarák=Beata) vi restis ĝis la mateno sur viaj piedoj, nur pro via amo, dum se la imamo en la preĝo iom pli longigas la preĝon, vi protestas...

Tuj sentis li doloron en sia koro kaj pentis.

Post tiu okazaĵo, Ábdollah dediĉis sin al kultoj kaj piaĵoj kaj atingis miraklan gradon de pieco. Lia patrino rakontis ke ŝi vidis lin en la ĝardeno. Li dormis trankvile sub rozujo. Serpento tenis narcisbranceton en sia buŝo kaj per ĝi forigis la muŝojn ĉirkaŭ lia vizaĝo!

Alie, oni diras ke li ripete dediĉis unu jaron nur al haĝo, unu jaron al ĝihado kaj unu jaron al la komerco. El la profito de la komerco li multe donacadis al malriĉuloj. Li kutimis aĉeti daktilojn kaj regali per ili la derviŝojn. Post la manĝado li petis la kernojn kaj por kerno donis po unu draĥmon, al tiu kiu jam manĝis pli ol aliaj gastoj.

Iun tagon liasantis vojon. Blindulo vokis lin: Haltu ho Ábdollah! Ábdollah haltis. La blindulo petis lian benon por resaniĝo. Ábdollah benis. Dio resanigis la blindulon kaj li ekvidis.

Oni diras: Ábdollah iun jaron iris al la haĝo. Dum la rito venkis lin dormo. En la dormo li sonĝis pri du anĝeloj kiuj mal-supren venis de la ĉielo. Unu el tiuj du diris al la alia:

– Kiom da homoj ĉi-jare venis fari haĝon?

– 600 000.

– La haĝon de kiom da homoj Oni akceptos?

– Nenius!

Ábdollah diras: Aŭdinte tion, ankoraŭ en la dormo, mi sentis, ke ekaperas maltrankvilo en mi. Mi diris al la anĝeloj: La penado de tiom da homoj, kiuj alvenis el la proksimaj kaj malproksimaj landoj, tra tiom da dezertoj, ĉu ne estas rekompencata?

– (Respondis unu el tiuj anĝeloj:– En Damasko loĝas ŝuis-to. Lia nomo estas Áli ben Moŭáffaq. Li ne alvenis ĉi-jare al la

haĝo. Tamen nur lian haĝon oni akceptis kaj vin aliajn oni pardonis nur pro li.

Ábdollah diras: Vekiĝinte el tiu dormo, mi ekintencis vojaĝi al Damasko kaj viziti tiun viron. Mi vojaĝis. Mi trovis lian domon en Damasko kaj vokis lin. Iu eliĝis el la domo. Mi demandis: Kio estas via nomo? Li diris: Áli ben Mouáffáq.

– Mi volas paroli kun vi.

– Diru.

Mi rakontis la tutan okazaĵon. Áli ekkriis, svenis kaj falis teren.

Kiam li vekiĝis, mi petis de li pliajn detalojn. Li rakontis:

– Tridek jarojn mi sopiris iri al haĝo. Mi ŝparis tiucele 350 draĥmojn. Ĉi-jare mi volis plenumi tion. Iun tagon la kaptukulino (lia edzino!) graveda, flarinte odoron de manĝaĵo kiu venis el la domo de la najbaro, petis min pri iom de tiu manĝaĵo. Mi iris al la najbaro kaj petis lin pri iom de lia manĝaĵo. Li ekploris kaj diris: Dum tri pasintaj tagnoktoj miaj infanoj manĝis nenion. Hodiaŭ mi trovis kadavron de mortinta azeno. Mi disigis pecon de ĝi kaj faris manĝaĵon. Ĝi ne estas *halala* (ŝarie lica) al vi.

Áli daŭrigis: Ĉe ekscio pri la povro de la najbaro, fajro kuris en min. La 350 draĥmojn mi donacis al la najbaro. Jen mia haĝo!

Ábdollah diris: Pravis la anĝeloj en mia sonĝo...

27– Ĥaĝe Násir Tusi

(1200–1276)

خواجه نصير

Ĥaĝe Ábu-Ĝá'fár Násir-od-din Mohámmád Tusi (597–672 np.H = 1200–1276 p.K) estas fama filozofo, scienculo kaj matematikisto irana.

Dum kelkaj jaroj li loĝis en la fortikaĵoj de la ismailanoj en Qohestan (en Ĥorasano) laŭ ilia invito. En la jaro 654 p.H. post la invado de la mongola Holagu-Ĥano, Násir aliĝis al tiu ĥano. Poste li estis kun la mongoloj kaj eble partoprenis la invadon de Bagdado fare de la mongoloj. En tiu invado oni mortigis la kalifon Ál Mostá'sám Bellah (656 p.H.).

Post la okazaĵo de Bagdado, Ĥaĝe Násir fariĝis la respondeculo pri la Vakfo (48) en la teritorioj konkeritaj de mongoloj. Li establis bibliotekon kaj observatorion en la urbo Máraqe, kie li arigis multajn scienculojn. Tie li okupiĝis pri sciencaj aferoj kaj verkis librojn ĝis sia morto en la jaro 672 p.H. Krom liaj arablingvaj famaj libroj, restas de li kelkaj perslingvaj libroj kaj eseoj. Jen fragmento el lia perslingva libro “Áhlaq-e Naseri”:

Pri Bono kaj Feliĉo

Ĉiu ago havas sian finon kaj celon. Ankaŭ la homa spirito povas havi celon en sia evoluo. La celo de la homa spirito estas ĝia feliĉo. Do, unue ni devas klarigi la Bonon kaj la Feliĉon, por ke ne-matura serĉanto, eksciinte pri tio, volu pli vigle perfektigi sin. Ankaŭ al la matura spirito, plia scio kaŭzos pli ĝojan atingon al la celo. La komenco de la penso estas fino de la ago kaj la fino de la penso estas komenco de la ago. Tiel estas en ĉiuj metioj kaj profesioj.

La ĉarpentisto, ekzemple, unue pripensas la utilon de la farota tablo en sia kapo. Pripensinte la kielfaron li ekagas. Nur post la finiĝo de la ago aperas la utilo de la tablo, kiu estis unue pensita.

Same, se la homo, per sia racio, ne pripensas bonon kaj feliĉon – kiuj estas la finceloj de la spirita evoluo – la destino de la evoluo ne lokas sin en lian kapon kaj se tia proceso ne realiĝas, ankaŭ la akiro de bono kaj feliĉo ne eblas...

Tiun ĉi ĉapitron mi ne verkis por ke junuloj (pense ankoraŭ ne maturaj) leginte ĝin en mia libro *La Etiko* akiru bonon aŭ feliĉon, sed por ke tiurimede trafu iliajn orelojn tiaj vortoj kaj ili eksci ke iuj homoj atingis tiujn nivelojn kaj ke ankaŭ ili povos fariĝi tiaj. Tiele aperos entuziasmo en ili, kaj se helpas la fortuna, ili povos atingi altajn nivelojn.

La pasinttempaj saĝuloj diris ke la bono havas du specojn: absolutan kaj relativan. La absoluta bono estas tio kio estas la celo de la estaĵoj kaj la fino de la finoj. La relativa bono estas fino al kiu utilas atingi.

La feliĉo similas al la bono sed aparte rilate al ĉiu persono. Tio estas lia evoluo laŭ lia propra vojo al sinperfektigo spirita.

Tial la feliĉo diferencas de unu al alia homo. Sed la bono samas ĉe ĉiuj.

Luj uzas la vorton “feliĉo” ankaŭ por bestoj. Verdire tio estas metafora parolo, ĉar la besta evoluo estas nek mempripensita nek memdecidita. Tio estas pro la eblo donita de la naturo al ili. Do ĝi ne estas vera feliĉo. Tio kion akiras la bestoj, kiel manĝaĵoj, trinkaĵoj, vestaĵoj aŭ komfortaĵoj, ne estas feliĉo, sed fortuna...

28-Moŭlávi/ Moŭlana/ Rumi

(1207–1273)

مولوی

Lia nomo estas Ĝálaloddin Mohámmád filo de Báhaoddin Mohámmád Báľhi. En orientaj lingvoj oni ofte nomas lin Moŭlávi aŭ Moŭlana. En okcidentaj lingvoj – ankaŭ en Esperanto – oni nomas lin Rumi (48).

Li estas granda perslingva poeto, aŭtoro, sufiisto, teologo, teozofo kaj filozofo. Lia intervizito kun Ŝams Tabrizi, granda sufio, kaŭzis gravan ŝanĝiĝon en li, el teologo al sufio.

Krom la unikaj versoj de lia poemlibro Málnávi (=distiko, versdua poemaro), li verkis ankaŭ proze. Lia prozstilo, simile al liaj versoj, estas simpla, kortuŝa kaj laŭ la stilo de iranaj sufioj, entenanta multajn proverbojn, versiklojn de Korano kaj rakontojn de la Sunao.

Rumi, pro sia profunda teologia scio, iom troige uzas religiaĵojn en siaj prozo kaj poezio. Lia stilo estas longigema, precipa en liaj leteroj. Lia verkaro estas multfoje presita kaj eldonita en Irano, Turkio, Barato kaj aliaj landoj. Pri liaj poemoj mi parolos en la poema parto. Jen fragmento el letero lia:

Letero al reĝo

{Moŝtaj salutoj kaj} mirakloj, puraĵoj kaj ĉielaj feliĉoj – kiuj estas celoj de homoj kaj akiroj de profetoj kaj elito, kaj nur tio valoras la alstrebon– al la pura animo de la reĝo mondfama, justaga, nobla, anĝeleca, saĝa, Diadoranta, bonfara, honoro de reĝoj kaj honoro de Davudidoj (49). La beno “*Dio longigu ilian*

altrangecon” estu kun lia moŝto kaj Dio – Granda kaj Kara – pli-
fortigu la kolonojn de liaj regado kaj sukcesoj, atingitaj aŭ here-
ditaj, per eterna konfirmo. Dio pliigu Sian gracon kaj favoron al
lia moŝto pro liaj reĝaj bonfaroj, helpo al malriĉuloj kaj defendo
de la subprematoj.

{Mi petas la reĝon kiu} legu miajn milojn da salutoj, bonde-
ziroj, benoj, servodeklaroj kaj dankoj pro liaj komplezoj, favoroj
kaj helpoj, kiujn mi ne povas bone esprimi per parolo kaj skribo.

Mi petas Dion kiu kaŭzu mian renkonton kun la reĝo kie mi
povu ĉee danki lian moŝton. Mi sopiras ke La Absoluta Riĉulo
kaj Prava Kreanto (Dio) rekompencu tion (akcepton de mia vizit-
peto) el Sia senlima, senfina trezorejo.

Mi volus informi lian moŝton ke la kara frato, erudita kaj
Dikreda ulemo, Ŝamsoddin kaj lia filo, lumo de okuloj, Nurod-
din, ekde kiam {ili} revenis el la kortego de via granda moŝto, ne
trankvile pasigis tagon, eĉ horon. Kiu al kutimiĝis al la servado
de tiu kara reĝo kaj vivis sub lia ombro kaj vidis liajn komplezo-
jn, ne plu povas vivi ĉe aliaj reĝoj. Ili tre volas reveni al via moŝ-
to sed hontas peti tion. Kiam la tranĉilo trafis la oston (=pacienco
finiĝis kaj netolereblo komenciĝis) kaj la foresto de vi– kio estas
la plej malbona doloro– ekstreme ekdolorigis ilin, ili petis mian
intervenon, ĉar ili certas pri la pardonemo de tiu reĝo kaj kredas
je mia sincero. Ili fidas min ke mia interveno estos akceptita de
via reĝa moŝto kaj iliaj kulpoj – kio ajn – estos pardonitaj de
via reĝa moŝto kaj ne plu memorigotaj. Eble la reĝo etendos la
antaŭan favoron ombron al ili kaj tiele estos via reĝa degno sur
mi, el Tero ĝis ĉielo (multege). (Se vi eĉ degne pardonos ilin, mi
estos tre dankema). Mi ankoraŭ pli dankos vian reĝan moŝton se
vi aldonos tiun ĉi komplezon al viaj antaŭaj komplezoj. Ili estas
malnovaj amikoj de tiu ĉi petanto. Mi esperas ke tiu reĝo karigos
min akceptante tiun ĉi peton...

Viaj servistinoj kaj servistoj (miaj gefiloj), grandaj kaj
malgrandaj (pli aĝaj kaj malpli aĝaj), sopiras viziti vian reĝan
moŝton kaj tagnokte preĝas ke la Kaŭzanto de la Sunleviĝo kaj
Sunsubiro (Dio) kaŭzu nian interviziton...

29- Āta Málek Ĝovejni

(1226-1282)

عظاملك جوینی

Ālaoddin Ābolmozáfár Āta Málek filo de Báhaoddin Mo-hámmád Ĝovejni estas granda historiisto kaj verkisto de la 7a jarcento p.H.

Li apartenas al la granda familio Ĝovejni, multaj el kiuj fariĝis ŝtataj altranguloj. La graviĝo de la familio komenciĝis en la kvina kaj sesa jarcentoj (p.H.) kaj daŭris ĝis la sepa, tempo de mongolaj kaj Ilĥanaj (postmongolaj mongolidaj) regantoj. Tiu familio malaperis post la morto de Ŝámsoddin Mohámmád Ĝovejni, la tiama familiestro.

Āta Málek naskiĝis en la jaro 623 p.H. (=1226 p.K.). Junaĝe li oficis ĉe la emiro Argun Agao, mongola reganto en Irano. Li kelkfoje vojaĝis al Karakurum, tiama ĉefurbo de la mongoloj, akompane de la mongola emiro. Dum tiuj vojaĝoj li sufiĉe informiĝis pri mongoloj.

En la jaro 654 p.H. dum Hulagu-Ĥĥano li estis en Ĥorasano, la emiro Argun Agao prezentis Āta Málek al li. Post tio li ĉie kaj ĉiam estis kun Hulagu-Ĥĥano, eĉ dum la invado de ismailanaj fortikaĵoj kaj dum la atako al Bagdado.

Unu jaron post la venko al Bagdado (657 p.H.), la mongoloj regantigis lin al Bagdado, Irako kaj Ĥuzestano (nuntempe provinco en la sudo de Irano). Li estis en tiu posteno dum 24 jaroj kaj farigis multajn infrastrukturojn kaj konstruaĵojn. Li mortis en la jaro 681 p.H. (1282 p.K.).

Postrestis de Āta Málek lia fama detala historilibro Ĝáhangoŝa (Mondkonkerinto, alude al Ĝingis-Ĥĥano) kaj lia eseo nomata “Kondolencon al la fratoj”.

Ĝáhangoŝa {de Ĝovejni}, en tri volumoj, priskribas la mongolan historion, ekde Ĝingis-Ĥĥano ĝis Hulagu-Ĥĥano, la konkero de Irano kaj de la ismailanaj fortikaĵoj en Irano. La libro, krome, enhavas tre utilajn informojn pri Ĥaráz-m-Ŝahoj, Kara-Ĥĥitana Ĥĥanato (50) kaj pri Sabahije-Ismailanoj. Ĝi estas fidinda perslingva historilibro.

Jen fragmento el tiu libro:

Sultano Ĝálaloddin Ĥaráz-m-Ŝah

La diablo deloganta tiom kaj tiel regigis timon kaj tremon en la internon de lia patro, Sultano Mohámád (Angle: Muhammad II of Khwarazm, patro de Ĝálaloddin) ke li ade serĉis truon en la tero aŭ eskalon al la ĉielo por fuĝi el la sennombraj (mongolaj) invadistoj.

Jam deantaŭe, de sia elfuĝo el la tataroj al Samarkando, li enlokis kompetentajn militistojn en konvenaj lokoj por gvati tie kaj laŭnecese helpi.

El liaj filoj, la pli aĝa kaj kuraĝa, la krono de la ŝaha kapo, la lumo de la Dia kredo, Sultano Ĝálaloddin, estis kun li. Neniu alia. Aliaj filoj estis nur ornamaĵoj de la monda vivo.

Li (la filo) persistis en sia erara kaj celfora opinio ke “disloki la soldatojn en diversajn lokojn kaj forfuĝi el la ankoraŭ ne atakanta, eĉ ne alveninta malamiko estas malkuraĝo, eĉ honto por iu ajn nobelo. Se la patrosultano ne volas batali kaj lia moŝto insistas forkuri, li transdonu la militaferon al mi, antaŭ ol la perdo de la tempo. Ni devas fari ion antaŭ ol niaj piedoj eniĝu en la koton de la konsterno kaj timo, kaj antaŭ ol la popolo ekkonsideru nin kiel maĉitan gumon de laiproĉa buŝo”.

*Se ne dormas nia brila sorto
L' afero ne havas tiom da forto*

Lia patro akvoflue respondis: Bono kaj Malbono estas antaŭdestinitaj. La limoj de la aferoj estas difinitaj en La Unua Tago kaj jam skribitaj en la sortolibro. Ili daŭros ĝis siaj ekstremoj kaj neniu baro malhelpas ilian finiĝon kaj plenumiĝon... ĉiu komenco havas sian finon kaj ĉiu emersio iros al imersio...

Kiam la patrosultano (Sultano Mohámád Ĥaráz-mŝah), el la olddomo de ĉi-mondo foriris al la eterna mondo kaj el la polva dezerto iris al la pura ĝardeno (mortis), lia filo, Sultano Ĝálaloddin, kun sia plej juna frato kaj kelkaj aliaj, el insulo de Kaspia Maro albordiĝis...

30– Sadio (Perse: Sá'di)

(1184–1281)

سعدی

Ŝejk' Moŝref filo de Mosleh Ŝirazi, kromnome Sá'di (Esperante: Sadio) naskiĝis en la komencaj jaroj de la sepa jarcento p.H. (=13a jarcento p.K.) en mulaa familio en la urbo Ŝiraz en Persio. Pri liaj naskiĝ- kaj mortdatoj la historiistoj ne samopinias. Laŭ iuj, li mortis en 1291. La supremenciitaj datoj estas PIV-aj.

Frujunaĝe li vojaĝis al Bagdado kaj tie en la Nezamije-universitato studis literaturon kaj teologion. Nezamije estis universitato por Ŝafiistaj sunaistoj.

Post sia studado, li ekvojaĝis al Sirio kaj Heĝazo. Samtempe de la regado de Ábubákr Sá'd Zángi (623– 658 p.H.= 1226–1259 p.K.) Salgurida (angle: Salghurids) GrandBejo (Ata Bejg) Sadio revenis al Ŝiraz kaj ekverkis sian libron Bustan (Ĝardeno/ Horto) en la jaro 655 p.H. (1257 p.K.). Sadio dediĉis tiun libron al tiu Bejo.

Unu jaron pli poste (656 p.H.= 1258 p.K.) li verkis sian duan libron Golestan (florejo/ florgardeno), kiun li dediĉis al la princo Sá'd filo de Ábubákr kaj elektis sian poemtitolon laŭ lia nomo: Sá'di (Sadio).

Bustan estas poema kaj Golestan estas kombino de poemoj kaj ornamita (paronomazia) prozo. Poste li ekloĝis en sia Ĥangaho (34) en Ŝiraz. Li pasigis plejparton de sia cetera vivo tie kaj mortis tie. Oni lin entombigis en lian ĥangahon kaj la tombo ankoraŭ restas vizitata.

Sadio estas unu el la kvar plej grandaj poetoj de la perslingva literaturo. La aliaj tri estas: Ferdoŭsi, Rumi, Hafizo. Sadio fariĝis modelo por postaj verkistoj. Jen rakonto el Golestan, ĉapitro 7, rakonto 19: (ĉi parton mi prenis de mia traduko por tiu titolo kiun redaktas Kejhan Sajjadpur, irana esperantisto, kaj por kiu kunlaboras en la teamo kelknaciaj esperantistoj, interalie Renato Korseti/Corsetti).

Disputo de Sadio pri riĉo kaj malriĉo kun iu pretendanto

Iu, aspekte sed ne vere, derviŝo, en kunsido, malbele plendadis kaj riproĉis riĉulojn. Li estis diranta la jenon: “malriĉulo ne havas povon kaj povulo ne havas afablon,

*“dijoj de dono ne plu monon havas
dijoj de mono ne plu donon emas”.*

(kiam mi eniĝis la diskuton) al mi, kiu kreskis per riĉaĵoj de granduloj, malplaĉis tiuj vortoj kaj mi reagis:

“Ho amiko, la riĉuloj estas enspezfontoj por malriĉuloj kaj rezervoj por dezertuloj, destino por pilgrimantoj kaj kavernoj de vojaĝantoj. Ili portas pezajn ŝarĝojn por komfortigi la vivon de aliaj homoj. Ili nur tiam ekmanĝas, kiam certiĝas ke la familianoj kaj servistoj jam manĝas. De ili atingas donacoj al soluloj, maljunuloj, parencoj kaj najbaroj.

*Riĉuloj donas donaciojn, votojn, festenojn
impostojn, liberigojn, akcizojn, buĉoferojn*

Ĉu vi volas perpreĝe konkurenci kun ili? Preĝe vi zorgas ne Dion, sed proprajn suferojn! Se la povo venas de dono kaj se la potenco venas de preĝo, ambaŭ estas eblaj por kapablaj homoj kiuj havas purigitan monon (51), purlavitan veston, prudan animon, trankvilan koron. Forto de preĝo dependas de pura manĝo kaj ĝusta preĝo dependas de pura vesto. (52) Malplena stomako ne donas forton kaj malplena mano ne donas donacon. Soifa piedo ne boniras kaj malsata mano ne bonfaras.

*Nokte zorgoplene dormas tiu
al kiu mankas la morgaŭa mono
Formiko kolektas somere por ke
vintre ĝi fartu en sato kaj bono*

Trankvilo ne eblas ĉe manko (53). Koncentriĝo ne okazas ĉe malriĉo (53). Iu komencas vesperpreĝon, alia atendas vespermanĝon. Ĉu tiu similas al tiu ĉi?

*Senjoro okupiĝas pri Sinjoro
Derviŝo pri sia disparta koro*

Do, Dio pli akceptos la preĝojn de la riĉuloj, ĉar ili preĝas per trankvila menso kaj koncentrita penso. Riĉulo, bone provizinte sin, komencas preĝi senzorge. Araboj diras: “Azilon ĉe Dion! (54) Pro malriĉo suferiga kaj kuniĝo kun malŝatata”.

Estas hadito (55): “Malriĉo estas (kaŭzo de) vizaĝnigreco (nigra, sombra, morna, malhela vizaĝo estas metaforo por ekstrema honto) en ambaŭ mondoj (sur Tera kaj postmorta)”.

Li demandis min: “Ĉu vi ne aŭdis ke la profeto – saluton al Li – diris: Malriĉo estas mia honoro?”

Mi respondis: “Silentu! La aludo de La Mondsiro – saluton al Li – estas al grupo kiu konsistas el viroj de la areno de Kontento kaj cedo al Dia Volo, ne tiuj ĉi, kiuj aspektas kiel derviŝoj sed la derviŝajn almozaĵojn forvendas!

*Ho vi, brua tamburo! kaj interne nenio,
sen provianto, nian kampanjon vi difektas.
Deturnu vin de la popolo se vi honestas.
Ne turnu milbidan rozarion! Vi afektas!*

Nekognipova derviŝo ne trankviliĝas ĝis el lia malriĉo rezultos herezo. *Proksimas ke malriĉo iĝu herezo!* (56). Sen riĉeco oni ne kapablas vesti nudulon aŭ liberigi malliberulon. Homoj kiel ni kiam povus atingi al ilia nivelo? Ĉu supera mano similas al malsupera? Ĉu vi ne legas ke Dio – Kara kaj Alta Li estas – en La Fortika Subensendaĵo (Korano) donas novaĵon pri la loĝantoj de la paradizo, *kiuj ricevos provizaĵon konatan?* (57) Por ke vi sciu; kiu sin zorgas pri lukrado, tiu ne pensas pri feliĉo de la pio, ĉar trankvilon oni akiras per konata provizaĵo.

*Dormanta soifanto sonĝas
ke li en puran akvon plonĝas*

Dum mia parolo atingis ĉi tien, la derviŝo senpacientiĝis kaj eltiris sian kielglavan langon kaj ekrajdis en la elokventan arenon kaj atakis min dirante: “Tiom vi komplimentis ilin kaj rakontis galimatiojn ke la imago imagas ke ili estas teriakoj aŭ ŝlosilo de la provizaĵmagazeno. Ili estas manpleno da arogantaj fanfaronaj orgojlaj hatataj uloj. Ili estas okupataj pri mono kaj riĉo kaj trom-

pataj de ambicio kaj havaĵo. Ili ne parolas krom indigne kaj ne rigardas krom digne. Ili atribuas al ulemoj almozpeton kaj nomas malriĉulojn kanajloj. Pro siaj havaĵoj ili sidas antaŭ ĉiuj kaj pro siaj propre imagitaj altrangoj, ili konsideras sin pli bonaj ol aliaj. Ili absolute ne intencas demandi pri ies kielfarto nek helpi iun. Ili ne scias pri la eldiro de la saĝuloj ke: “kiu preĝas malpli sed riĉas pli, tiu aspektas riĉulo sed vere malriĉas.”

*Se filistro, pro mono, kontraŭ pensuloj arogantas
li estas azenpugo, eĉ se li kiel kaĉaloto gigantas*

Mi diris: – Ne riproĉu ilin ĉar ili donacas. Li diris: – Vi eraras! Al sia mono ili sklavas. Kiel februara (58) nubo ili sekas kaj ne pluvas. Ili estas suno sed ne brilas. Ili estas sur ĉevalo sed ne rajdas. Ili ne metas paŝon al Dia regno kaj ne donas draĥmon sen ĝena degno. Ili kolektas monon daŭre, tenas ĝin kaŭre kaj forlasas ĝin bedaŭre. La trezoro de avarulo elteriĝas kiam li mem enteriĝas.

*Iu monon per penado deponas
aliulo sen peno ekdisponas*

Mi diris: La avarecon de la riĉuloj rimarkas nur almozuloj. Se vi ne estus almozulo, egalus al vi avarulo kaj donacemulo. Provŝtono (59) scias kio estas la oro kaj almozulo scias kiu estas avara. Li diris: “Tion spertinte mi diras ke la riĉuloj atendigas siajn proksimulojn ĉe la pordo kaj ordonas al la brusokaj pordistoj ne enlasi la gastojn kaj mensogi ke la mastro ne estas hejme! Kaj la gardistoj pravas, ĉar:

*Kiu ne saĝas, bonkoras, helpemas, bravas
tiu ne estas hejme! La pordisto pravas*

Mi diris: “Ĉar ili laciĝas pro tro da petantoj kaj jam sufiĉas svarmo da almozuloj. Se la sabloj de la dezerto perliĝas, la okuloj de almozuloj ankoraŭ ne pleniĝas”.

*Ne satiĝos avidulo de valut’
nek de roso pleniĝos seka put’*

Kie ajn suferinto kaj humuligito troviĝas, tie tiu sin avide en hororajn aferojn ĵetas kaj pri la konsekvencoj ne pensas, Dian punon ne timas kaj permesitaĵojn disde malpermesitaĵoj ne distingas!

*Se al hundo oni ĵetas ŝtonon
ĝi ĝoje pensas pri osto kaj kaptas
Se kadavron oni al tombo portas
avarul' kuniras kaj antaŭfestas*

Sed la riĉulo havas la Difavoron kaj ĉar li havas puran monon, do li ne bezonas malpuran havaĵon. Mi, kvazaŭ ne dirinte ĉi tiujn vortojn kaj ne argumentinte konvinke, petas de vi juston. Ĉu vi iam vidis amuleton sur brako, aŭ povran malliberulon, aŭ perfortitan ulinon, aŭ detranĉitan manon, pro alia kialo ol malriĉo? Herooj nur pro neceso estas en kavoj kaptitaj kaj iliaj ŝultroj truitaj. Eblas ke la Ordonanta Memo (60) ion petas de derviŝo kaj ĉar li ne havas, tial li falas en ribelon. Ĉar ventro kaj subventro estas ĝemeloj, t.e. de la sama interno. Ili dependas de unu la alia. Mi aŭdis ke oni arestis derviŝon kiu estis kun knabo faranta pekon. Li ege hontis kaj ĉar ŝtonmortigo eblis, li lamentis: “Ho muzulmanoj, kion fari? Mi ne estas tiom riĉa por edziĝi nek tiom piforta por pacienci. *En Islamo ne estas monaĥismo!* (56)

El la kaŭzoj de kalmo kaj trankvilo, kiun disponas riĉuloj, unu estas tiu ke ili ĉiunokte brakumas idolon per kio ĉiutage ili rekomencas junecon. Bela virino al kies brilo ĵaluzas Suno kaj pro kies alta staturato ĝeniĝas altega cipreso.

*Krifon enigis ŝi en sangon de amant'
ruĝas ŝiaj ungoj jam kiel amarant'*

Do, ne eblas ke kun tiel bela amatino la riĉulo alproksimiĝos al malpermesitaĵoj aŭ ekpekos.

*Kiu rabis koron de huri' paradiza
tiu certe ne Ĉigilan (61) hurion ŝatas
Kiu jam havas apetitvekan daktilon
tiu ne plu vinberspikojn ŝtonbatas*

Ofte la manmalplenuloj malpurigas sian famon kaj malsatuloj ŝtelas panon.

*Se malsata hundo trovas viandon, egalas al ĝi
la kamelo de Saleh, aŭ azeno de Antikristo (62)*

Ho, kiom da damoj, pro malhavo falis en perverson kaj la karan honoron makulis per infamio.

*Ĉe malsato ĉasto ne eblas
Ĉe malhavo pio ja feblas*

Hatem Tai (63) loĝis en dezerto. Se li loĝus en urbo, la almozuloj dispecigus liajn vestojn.

Li diris: "mi kompatas ilin". Mi diris: "Ne! Vi ĵaluzas pro ilia riĉo".

Ni varme diskutis kaj disputis. Ĉiun moviĝon de lia peono mi kontraŭis kaj ĉiun sinmovon de lia reĝo mi respondis per mia damo. (64) Finfine finiĝis la forto de liaj vortoj kaj malpleniĝis la sagujo de liaj argumentoj.

*Atentu atakon de elokventa retoro
kies armiloj estas bombasto, metaforo
Havu kredon kaj kognon ĉar literatoro
ĉe forlasita fortikaj' estas en deĵoro*

Dum, pro miaj rezonadoj kaj argumentoj, li ne plu povis diskuti, li komencis disputi kaj galimatiojn eldiri. Estas tradicio de nescio; se vi ne regas fatalon, ekigu batalon. Same kiel Azar la Idolskulptisto (65) kiu diskute ne povis venki super Abrahamo ekigis batalon kaj diris: "se vi ne ĉesos, mi ŝtonumos vin".

Li (la diskutanta derviŝo) insultis min. Mi insultis lin. Li disŝiris mian kolumnon, mi kaptis lian mentonon...

*Li min, mi lin fervore surfalis
kaj nia infamio furoris
Homoj nin mokis kaj priridis
amaso nin freneze postkuris*

Findecide, ni iris al kadio kaj interkonsentis akcepti kion ajn verdiktos la juĝisto de islamanoj pri la diferenco de riĉaj kaj malriĉaj homoj.

La kadio, sciiginte pri nia afero kaj aŭskultinte al niaj argumentoj, enpenŝiĝis kaj post longa pensado eldiris: “Ho vi kiu komplimentis la riĉulojn kaj mokis la malriĉulojn, sciuj: kie estas floro tie estas ankaŭ dorno, post ebrio estas postebrio, gardas trezoron serpento, ĉe la kara perlo estas hommanĝa ŝarko. Plezuron de la vivo sekvas piko de la morto kaj bonon de la paradizo malhelpas malbona muro.

*Se vi serĉas amikon, malamiko forpelas
vi devas do toleri eĉ se ĝi ja malbelas
Trezoro kun serpento, floro kun dorno
ĝojo kun ĉagreno ĉiam alterne ĝemelas*

Ĉu vi ne vidas ke en la ĝardeno estas káj mosk-saliko káj sek-ligno? Ankaŭ inter la riĉuloj troveblas káj dankemaj káj mal-dankemaj. Inter la malriĉuloj tiele; káj paciencaj káj plendemaj.

*Se ĉiu guto de roso perlo fariĝus
perlo samkiel terbido senvaloriĝus*

Proksimuloj de Dio -Kara kaj Supera Li estas— riĉas kiel la interno de sufioj kaj derviŝas ne riĉulmense. La plej granda riĉulo estas tiu kiu helpas derviŝojn kaj la plej granda derviŝo estas tiu kiu ne atentis riĉulojn. *Kaj por tiu, kiu konfidis je Allah, Li sufiĉas.* (66)

La kadio poste sin turnis de mi al la derviŝo kaj riproĉe diris: “Ho vi, kiu diris ke la riĉuloj estas en zorgoj kaj neglekto, kaj ebrias pro siaj nababaĵoj, jes, iuj estas tiaj; indiferentaj, mal-dankemaj, kiuj kolektas kaj ŝparas, nek manĝas nek donas. Se ekzemple ne pluvas dum longa tempo kaj ne troveblas manĝaĵoj, aŭ se tajfuno detruas ĉion, ili ne demandas pri la kielfarto de malriĉuloj ĉar ili mem disponas sufiĉan provizaĵon. Ili ne timas Dion kaj diras:

*Se pro malhavo iu alia mortas
mi havas! Anaso tajfunon ne timas*

*Kamelrajdantinoj en la palankenoj
ne vidas ies falon eĉ se proksimas
Malnobluloj kiam savas sin tuj diras
mi ne zorgas se aliuloj viktimas*

Jes, iuj estas tiaj kiel vi diris. Sed iuj el la riĉuloj sternas manĝotukojn kaj havas donemajn manojn, serĉas bonfamom kaj bonfarton en la mondo kaj postmondo. Unu el ili estas Lia Moŝto, Monda Ŝaho, Amata Justulo, Venkanto, Helpato de Dio, Disponanto pri ĉiuj kreitaĵoj, Patrono de islamaj limoj, Heredanto de la Salomona suvereneco, La Plej Justa nuntempa Reĝo, Venkinto en mondo kaj kredo, Átabák Abubákr Sá'd – Alaho daŭrigu Lian tempon kaj venkigu Liajn Grandajn Famajn Agojn:

*Patro neniam kun sia filo tiom afablas
kiom vi kun aliaj homoj malavare agas
Dio volis al la mondanoj doni kaj pardoni
tial Li pro sia graco Vin al mondo reĝigas*

La kadio, ĉe atingo al ĉi stadio, kvankam kun troigo, eldiris sian verdikton kaj ni akceptis kaj la pasinton lasis kaj post la disputo komencis toleremon kaj amikiĝemon kaj interkisis kaj finis la aferon jene:

*Ho derviŝo! ne plendu pri la vivrivoluo
se plende vi mortos vi mortos en malfeliĉo
Ho riĉulo! koron, manon donantajn vi havas
manĝu, donacu, gajnu ambaŭ mondojn per riĉo*

31– Ezzoddin Máhmud Kaŝani

(mort.735 p.H.= 1334 p.K.)

عز الدين محمود كاشاني

Li estis teologo kaj sufio de la oka p.H-a jarcento (14–a p.K.). Inter liaj verkoj famas:

- 1– Klarigo de la T-fina odo de la araba poeto Ibn-e Farez.
- 2– Mesbah-ol Hedajáh vá Meftah-ol Káfajá (Vojmontra lumigilo kaj ŝlosilo por memsufiĉo).

La dua libro estas grava perslingva libro pri bazoj kaj principoj de la irana mistikismo kaj sufismo. Li utiligis la plej faman antaŭan tian libron de Sohrávárdi “Ávaref-ol Máaref” por verki sian libron.

Mesbah-ol Hedajá konsistas el dek partoj kaj ĉiu parto el dek ĉapitroj. Malgraŭ la aserto de la aŭtoro ke li verkis la libron por perslingvaj legantoj kiuj ne bone regas la araban lingvon, la teksto plenas de specife arabaj vortoj, arabaj kunmetitaĵoj kaj arabaj longaj frazoj.

Jen fragmento el tiu libro:

Ĥangaho kaj ĥangahanoj (34)

Kvankam konstrui ĥangahojn kaj uzi ilin kiel tranoktejon kaj kunvenejon de sufioj kaj derviŝoj estas bona nova tradicio, tamen tio havas sian historion en la tempo de la profeto – Dia saluto kaj paco al Li – kiam la malriĉaj adeptoj de Li kunloĝis en Soffe. (67) Soffe estis loko en Medino kie kunuloj de la profeto ripozis kaj kunvenis, vojaĝanto kaj sendomuloj tranoktis tie. La iniciato, sendube, estas belaĵo el belaĵoj de la islamanoj. Malordo kiu nuntempe trafas la sufiojn pro maljuniĝo de la koncernaj sci(enc)oj kaj pro malapero de la aŭtentikaj ceremonioj, ne riproĉas la originon. En la starigo de ĥangaho estas kelkaj utiloj:

– Unue, ĝi estas loko por multaj malriĉuloj kiuj ne posedas alian lokon por loĝi. Ili trovas ĉi tie lokon por loĝi. Estas ilia hejmo.

– Due, pro kunloĝado, la sufioj povas pli kunsidi kaj pli interparoli. Tio kreas pliajn kuniĝon, kunpreĝadon, kunmangadon kaj dialogon. Tiele ili, ekstere kaj interne, unuiĝas. Konsekvence, iliaj reciprokaj amo kaj intimeco pliiĝas kaj iliaj koro kaj animo pli proksimiĝas. Ilia lumo lumigas ilin mem kaj la aliajn, ĉu proksimajn ĉu malproksimajn. Tial ilin maltrafas plagoj.

– Trie, pro kunvivo, unu iĝas observanto de alia, ĉies rigardo estas ligilo por aliaj kiuj ne konkuru pri malobeajoj kaj ĉiam estu viglaj kaj singardemaj...

La ĥangahanoj estas du grupoj: vojaĝantoj kaj loĝantoj. Se vojaĝanta derviŝo intencas tranokti en ĥangaho, kutime li stre-

bas atingi tien antaŭ ol vesperiĝo. Se ial li atingas malfrue, li tranoktas en moskeo aŭ alia angulo kaj morgaŭ matene iras al la ĥangaho.

Enirinte ĥangahon, oni devas preĝi je du preĝunuoj por sanktigi la lokon. Poste li devas saluti kaj brakumi la ĉeestantojn.

Tradicie, la gastsufio kunportas donacojn, ekzemple manĝaĵojn por la loĝantoj. Poste oni restas tri tagojn en la ĥangaho, preĝas kaj plenumas aliajn ritojn...

32- Āli Ākbār Dehĥoda (68)

(1880–1955)

علی اکبر دهخدا

Li estas la plej granda irana vortaristo. Lia persa-persa vortaro ankoraŭ ĝisdatiĝas pere de kolegoj de lianoma institucio kaj ankoraŭ estas la plej fama persa-persa vortaro. Ĝi nomiĝas Dehĥoda-vortaro.

Krom tiu grandioza verko, kiun li serioze komencis malesperiĝinte de la politiko, li estis lerta filologo, literatoro, ĵurnalisto kaj poeto. Pro siaj honesto kaj demokrata karaktero, estinte iam la speciala sekretario de la persia ambasadoro ĉe la balkanaj landoj, en politiko li spertis multajn konfliktojn kaj longan ekziliĝon.

Dum la Konstitucia Revolucio en Irano (1905–1911), Dehĥoda fervore subtenis la revolucion. Du fondintoj de la tiam avangarda ĵurnalo Sur Esrafil, invitis Dehĥoda (Esrafil= Israfilo, ĉefanĝelo en Islamo kiu estas komisiita por dum la resurekta tago vekti mortintojn per blovado en Sur. Sur estas alia nomo por Kárna. Kárna estas longa korno kiun oni uzas kiel longan trumpeton. Do, la nomo de la ĵurnalo implicas la aserton ke oni intencas vekti la kvazaŭ mortintan popolon, kiu toleras tiom da maljustaĵoj kaj ne kontraŭbatalas).

Dehĥoda akceptis la inviton kaj verkinte bonajn artikolojn fariĝis pli fama ol la fondintoj, sed samtempe famiĝis kiel arda revoluciulo kiu postulas modernan konstitucion, laŭ kiu ŝahoj devus esti nur reĝoj, ne regantoj. Tiu afero ĉiam en Irano estis tabuo kaj tial la tiama ŝaho fariĝis sanga malamiko de Dehĥo-

da. Sed ne nur la ŝaho! Ankaŭ ajatoloj fariĝis liaj malamikoj kaj klopodis ekskomuniki lin. La ŝtato baldaŭ ĉesigis la eldonadon de Sur Esrafil kaj mortigis Mirza Ĝáhangir ĥan Ŝirazi, unu el la fondintoj, en la ĝardeno de la ŝaha palaco, dum la ŝaho mem spektis la mortigon! La dua fondinto, Mirza Qasem ĥan Tabrizi, fuĝis al Istanbulo.

La Konstitucia Revolucio en Irano malvenkis per la puĉo de Mohámmád Áli Ŝah. La kolera ŝaho, nur helpe de interveno de multaj kleruloj, konsentis ne mortigi Dehĥoda sed ekzili lin.

En Parizo kaj en Svisio li denove komencis pli akre kontraŭi la despotismon. Li, kun kelkaj aliaj, relanĉis la ĵurnalon Sur Esrafil. En iu numero de ĝi, Dehĥoda eldonis sian poemon pri la mortigo de Mirza Ĝáhangir ĥan Ŝirazi:

Memoru la mortintan kandelon

Ej! birdo de l' aŭror', se ĉi sombra nokto
mallumumadon forlasintos
Kaj pro vivigaj tagiĝaj brizoj
postebrioj de l' dormintoj forkurintos
Se l' amatino de l' blua ĉiel' (Suno)
siajn orajn harojn displektintos
Kaj se Dio tutkomplete aperintos
kaj Arimano enprizoniĝintos

Memoru la mortintan kandelon, memoru

Ej! kompano de Jozefo en prizon'
se via songinterpretado realiĝos
se via koro de ĝojo pleniĝos, viaj lipoj de dolĉrida
se vi enviata de l' malamikoj, ŝatata de l' amikoj
al via amatino kaj familio irantos
pli libera ol brizo kaj lunlumo
Tiun kiu ĉiu-nokte kun vi iam
sopirante siajn geamikojn
ĝis-matene kalkulis stelojn, memoru

...

Se l' mondo denove iĝos aranĝita

ho bebo de l' ora tempo
Kaj pro l' obeo de siaj sklavo
denove Dio ekdiomos
Se ne restos plu la famo de Ŝáddad nek lia Edeno (70)
se oni ĉesigos plu ĉikanadon
Tiun kiun de l' glavo de l' murdisto
kaptite kulpigite pro vero-adoro
trinkis de l' eterna fonto (71), memoru

33– Mohámmád Áli Ĝámalzade

(1892–1997)

محمد علی جمالزاده

Li estis unu el la pioniroj de la moderna irana prozo. La du aliaj estas Sadeq Hedaját kaj Bozorg Álávi. Ĝámalzade kreis sian propran stilon. Iuj nomas lin “la patro de la irana moderna prozo”.

Li eldonis la unuan modernan novelaron de la persa lingvo en Berlino ĉ. la jaro 1921. La persaj klasikaj prozaj rakontoj ofte komenciĝas per “iu estis, iu ne estis”. Li elektis tiun frazon kiel la nomon de sia libro, sed la lingvaĵo kaj la enhavo estas tute moderna. En la jaro 1965 li estis elektita kiel kandidato de la literatura nobelpremio sed li ne gajnis.

Lia stilo plenas de (kompare kun sia tempo) simplaj, popularaj vortoj kiujn ankaŭ la nekleraj homoj povis bone kompreni. Li ofte uzis popolajn ŝercojn, ironiojn, proverbojn kaj esprimmanierojn.

Ĝámalzade pasigis plimulton de sia vivo ekster Irano kaj eĉ forpasis kaj entombiĝis en Ĝenevo, Svisio, sed ĉiam verkis pri Irano kaj en la persa lingvo. Lia novelo “La persa estas sukero”, en lia novelaro “Iu estis, iu ne estis” ofte estas konsiderata kiel la unua moderna novelo de la persa lingvo. Ĉi novelo, post ĉ. mil jaroj de la persa prozo, estas turnpunkto. La antaŭparolo de Ĝámalzade en la libro “Iu estis, iu ne estis” efektive estas grava literatura manifesto, en kiu li emfaze diras ke la literaturo moderna unue devas respeguli la popolan kulturon kaj nur poste respegulu sociajn problemojn de la popolo.

Liaj verkoj, pro lertaj uzoj de la lingvaĵoj specialaj de la persa lingvo, perdas iom el sia gusto en la traduko. Simile ĉe Hafez. Tamen mi provas kiel eble plej bone traduki iom lian Sukeran Persan:

La persa (lingvo) estas sukero

Nenie en la mondo oni bruligas kune sek-malsekaĵojn (72) kiel en Irano. Ĉe la reveno post kvin jaroj da loĝado kaj mal-facilaĵoj en fremdaj landoj, ankoraŭ dum mi staris sur la ferdeko de la ŝipo kaj ankoraŭ ne bone ekvidis la puran teron de la patrujo, trafis miajn orelojn la kantado de la pramistoj de la Ānzáli-haveno kiuj en la Gila lingvo (73) kantante “balam ĝan, balam ĝan= mia kara, mia kara” ĉirkaŭis, kiel formikoj ĉirkaŭas mortintan lokuston, la ŝipon kaj peste ĝenis la pasaĝerojn. La barbo de ĉiu pasaĝero estis en la manoj de kelkaj remistoj, pramistoj kaj portistoj. (74)

Inter la pasaĝeroj, mi havis tamen la plej malbonan situacion. Ĉar la aliaj pasaĝeroj ĝenerale estis komercistoj de Râst kaj Bakuo, vestintaj sin per longaj manteloj kaj mallongaj ĉapoj, kies burs-laĉoj neniam estos malfermitaj eĉ sub minaco per bastonoj. Tiuj komercistoj donus sian animon al Azraelo (75) pli facile ol sian monon al iu ajn. La povra mi, ankoraŭ ne trovintis tempon depreni mian frankan (76) pelvoforman ĉapelon kiun mi surhavis de Frankio (76), tial tiuj uloj supozis min haĝulido (77) kaj grasa predo. Dek kruelaj portistoj kaj dek kvin pramistoj rumore kriis “Sahib’! Sahib’!” kaj ĉiu peco de mia bagaĝo falis en la manojn de unu alia ulo. Mi klopodis elpensi rimedon ekliberiĝi de ĉi atakantoj... ekaperis policanoj... kaj bone pririgardante min petis mian pasporton... kaj ordonis al soldato: “Momente detenu la Ĥan-Sahibon”! Oni enkarcerigis min ie malantaŭ la borda doganejo de Ānzáli-haveno....

Ni estis trio en la karcero... malfermiĝis la pordo de la karcero kaj oni enpuŝis junan felto-ĉapulon kaj denove fermis la pordon. La nove veninta junulo, post kiam li certiĝis ke ĝemado kaj lamentado kaj plorado ne utilas, forviŝis siajn larmojn per la

basko de sia mantelo, donacis vicon da insultoj al Tero kaj Ĉielo... kaj demandis (la mulaon, kiu estis unu el la malliberuloj):

– Ŝejka moŝto, je sanktuloj, diru al mi, kio ja estas mia kulpo?...

– Devotulo! Ne fordonu la bridon de via malrezignacia kaj malpiema memo al kolero kaj indigno... (78)

La felto-ĉapulo, kompreninte neniun vorton de la mulao, balbultis:

– Ne, ne, moŝtulo, mia nomo ne estas Devotulo, mi estas Ramadan! Mi demandas ĉu almenaŭ eblas scii, kial oni entombigis nin ankoraŭ vivantajn?...

La povra Ramadan kiu komprenis neniun vorton de la mulao,... turnis sin al la frankeska (79) viro (alia arestita viro):

– Pardonu sinjoro, ni, malpurkolumuloj, ne komprenas tiajn vortojn. Mi ne scias ĉu la mulao estas malsana, ĉar li ne parolas nian lingvon, aŭ tute araba. Pro Dio, ĉu vi povas diri al mi, kial oni malliberigis nin?

(La eŭropeska viro respondas per frazoj plenaj de francaj vortoj el kiuj Ramadan komprenas nenion... Post kiam mi, – la aŭtoro – klarigis al li per simpla persa kiun li povu kompreni... Ramadan diris:)

– Ho ĉiuj viaj doloroj trafu la kapojn de ĉi du frenezuloj. Je Dio, mi estis ĉe la ekmorto. Ĉu vi vidis kiel ĉi du frenezuloj eĉ ne parolas unu persan vorton? Kvazaŭ ili parolas la lingvon de ĝinnoj.

Mi respondis:

– Frato, ili estas nek ĝinnoj nek frenezaj. Ili estas irananoj kaj niaj religiaj kaj patrujaj fratoj.

Ramadan, aŭdinte mian respondon, supozis ke ankaŭ al mi mankas io kaj laŭte ekridis kaj diris:

– Je sanktuloj, almenaŭ vi ne moku min. Se ili estas irananoj, kial unu vorto de ilia parolo ne similas al la lingvo de homoj?....

Dua parto: Poemoj

1- Rudáki

(859–940/941)

رودکی

Ábu Ábdollah Ĝá'fár filo de Mohámmád, fama kiel Rudáki, estas unu el la plej unuaj kaj plej famaj grandaj poetoj de la persa lingvo.

Li naskiĝis en Rudák, proksime de Samarkando. Laŭ multaj historiistoj li denaske estis blinda, sed iuj aliaj, surbaze de liaj precizaj priskriboj pri koloroj en liaj poemoj, ne akceptas ke li estis denaska blindulo.

Li estis la unua konata poeto de la nov-persa lingvo (69) kiu reguligis kaj ordigis la persan poemon kaj uzis ĝin divers-teme. Tiuj temoj estas: rakonto, gazalo, panegiro, prediko, elegio ktp. Tial la pli postaj poetoj nomis lin “La patro de la persa poemo”, “La majstro de la poetoj”, “La sultano de la poetoj”.

Lia poemaro estis fama. Lia ĉefverko estis poema pers-lingvigo de la araba versio de la libro “Kálile kaj Demne” (2). El tiuj versoj restis nur malmultaj.

Li rilatis al la kortego de la Samanida dinastio, plejparte al Emiro Násr filo de Áhmád (mort. 331 p.H.= 942 p.K.). Jen poemo de Rudáki:

Gajvivu

Gajvivu kun nigrokulinoj gajaj

La mondo estas nur mitoj baj-bajaj

Pro venont' ne ĉagreniĝu via kor'

Kaj pro iron't' ne zorgu via memor'
Mi kaj tiu buklo, kun moska odor'
Mi kaj tiu huri', kun ora kolor'
Feliĉas kiu manĝas kaj fordonas
Nek manĝi mem nek donaci malbonas
Vento estas ĉi mondo kaj nubo, ve!
Kion fari? Vinverŝu ajnokaze

Maljuniĝo

Trivitaj elfalis ĉiuj miaj dentoj
Kiaj dentoj? Je lumo brila identoj
Pregita arĝento, blankperloj, koraloj
Al matena stel', al pluvero rivaloj
Ĉiuj jam elfalis, eĉ unu ne restas nun
Sinistre! Malbone! Ĉu kaŭze de Saturn'?'
Ne, ne, ne estas de longvivo aŭ Saturno
Kio estas? Mi diras: Dia malfortuno
La mondo ĉiam estis tia; rivalua
Estas ĝia eco; turnado kontinua
Kio kuracis iam, kaŭzas nun doloron
Nek kuraco, nek doloro havas valoron
Okulfrape ĝi malnovigas ĉion novan
Ĝi malnovigas ree ĉion ĵus elkovan
Multaj jam dezertoj estis iam Edenoj
Multaj dezertoj iĝos denove ĝardenoj...

2- Rabee

رابعه

Poetino de la kvara jarcento p.H. (10-a p.K.). Ŝi estas la unua poetino de Irano inter la konataj gepoetoj. Ŝiaj poemoj estas famaj pro subtileco, eskviziteco kaj enteno de impresaj sencoj.

Ŝiaj delikataj kaj ardaĵ gazaloj jam de longe estas citataj kaj ĉefe al sufioj tre plaĉas.

Jen poemoj de ŝi:

Lia amo

Lia amo min denove enligilas
Liberiĝon mi baraktis, senutilas
Lia amo ŝajnas al mi oceano
Elnaĝadon mi provas, ja ne eblas
Ĉar mi volas resti ĝis fino fidela
Bontrovas malbonaĵojn, se banalas
Ĉion el li mi supozas ke belegas
Dolĉkandon lia venen' ja egalas
Sovaĝa mi estis, baraktis sovaĝe
Tamen barakto lazon plie instalas...

Malbeno

Mi vin malbenas: Dio igu vin amanto!
Al kruda, kruela, malafabla, partnero
Ke vin trafu malfeliĉo pro malĉeesto
Kaj vi aprezu mian amon eĉ je ero

3- Ferdouŝi

(329–411 p.H.= 940–1020 p.K.)

فردوسی

Ábolqasem Mánstur filo de Hásán, Ferdouŝi Tusi, estas la plej granda irana epopeisto kaj senrivala majstro de la persa poema epopeo. Laŭ iranaj literaturistoj, lia verko “Ŝah-Name” estas unu el la mondfamaj gravaj epopeoj.

Ŝahname (en Vikipedio Ŝahnameo – verkodaŭro ĉ. 977–1010) estas la libro de Ferdouŝi. Epopeo en preskaŭ 60 000 duversoj. (80) La vorto ŝah, kiel Esperanta ŝaho, signifas, plej unue, ŝahon. Tamen ĉar la ŝaho ĉiam estis la unua persono de la lando, oni uzas la vorton por montri la primarecon, perfektecon, ĉefecon ktp. Ekzemple ŝah-kar signifas ĉef-laboron/verkon, ŝah-rah signifas ĉef-vojon, ktp. Do la laŭlitera signifo de Ŝah-name estas káj ĉef-libro káj libro pri ŝahoj. La poeto, kiel ĉiuj aliaj poetoj, vortludis per la kombinaĵo. Efektive la libro estas libro pri

ŝahoj kaj ĉefuloj, ĉar la historio apartenas al ili! Se ni ion scias pri aliaj ne-ŝahaj homoj, estas nur dank' al la (mal)amikeco de ŝahoj kun ili.

Ŝahname rakontas pri la mitoj, herooj kaj historio de Irano ekde la komenco ĝis la disfalo de la Sasanida dinastio (La konkero de la arabaj novmuzulmanoj en la jaro 651 p.K.).

La ĉefrolula heroo estas Rostam, irana Herkulo. Multaj fakuloj, en kaj ekster la lando, komparis la epopeon de Ferdoŭsi kun la Iliado de Homero.

Multaj popoloj havas siajn epopeojn. Oftas epopeaj verkoj ĉu poeme ĉu proze. Sed Ŝahname, laŭ multaj irananoj, fariĝis ilia “dokumento de la nacia identeco”.

Kial Ŝahname estas tiom grava por la irananoj? Laŭ mi, krom la epopea enhavo kiu tro imponatone rakontas pri la pasint-tempaj grandiozaĵoj de nun malsukcesa kaj venkita popolo, la lingvo mem fariĝis instrumento por la rezistado.

Post la konkero de la araboj, multaj zaratuŝtranoj, apartenantaj al la reganta religio, forfuĝis al Barato, kie ili ankoraŭ nun nomiĝas Parsioj. Multaj batalantoj rezistis perglave, mortigis kaj mortis. Kaj finfine, dum ĉirkaŭ 200 jaroj, la plimulto vole-nevole konvertiĝis al la nova religio, sekvante siajn lokajn duondependajn duonmemstarajn regantojn. Multajn regionojn regis turkaj eksmilitistoj de la islamaj arabaj kalifoj (mamlukoj). Multaj irananoj kredas ke dank' al Ŝahname, ni ankoraŭ parolas la persan lingvon kaj se ne estus la granda 30-jara laboro de Ferdoŭsi, kiun subtenis neniu reĝo, ni irananoj, kiel multaj aliaj venkitaj popoloj, parolus arablingve.

Ferdoŭsi parolis tiun ĉi Farsi-lingvon (69), kvankam li sciopovis la mezopersan antaŭislaman lingvon (Pahlavi/ Páhlávi/ Parsia lingvo laŭ PIV). Li skribis en la nova alfabeto arabdevena, ĉar la reganta samtempa sultano (Máhmud de Gazni/ Gaznavida, 971–1030) nome estis subulo de la bagdadaj kalifoj. Máhmud estis turko kaj sunaista muzulmano.

Strange ke ankaŭ turkoj uzis la mitajn kaj epopeajn elementojn de Ŝahname por honorigi sin kontraŭ la persoj! Laŭ Ŝahname:

Ferejdun (43), la mondŝaho, dividis la mondon inter siaj tri filoj; La okcidenton li donis al Sâlm (Sarm-Romo), la orienton li donis al Tur (Turlando-Turkestan–Turkoj. Oni ne klare diferencigis inter turkoj kaj ĥinoj!) kaj la koron de la mondo, Iranon, li donis al Irâĝ (IR en IRano aludas al Arjaj popoloj. Irananoj, ĝenerale sed ne ĉiuj subpremataj minoritatoj, konsideras siajn rason kaj lingvon “Hind-Arjaj” aŭ “Hind-Eŭropaj” kaj tre fieras pro tio.)

En la kortegoj de la otomanaj turkoj, en la kortegoj de la mogola imperio en Barato, en kelkaj aliaj ĉirkaŭaj landoj, oni parolis la persan (Farsi) lingvon.

Ferdoŭsi en Ŝahname klopodis kiel eble plej ne uzi la arabajn enmiksitajn vortojn. La libro konservis multajn pers-devenajn vortojn. Ĝi fariĝis klasika bazo por la persa/Farsi lingvo kaj per tiu lingvo konsolis la vunditan animon de la irana popolo.

Ekde ĝia unua apero, la popolo mem, senkonsidere de la (mal)ŝato de registaroj, uzis ĝin, ŝatis ĝin, voĉlegis ĝin en la publikaj ariĝejoj, rolludis ĝiajn rakontojn...

Kaj tiele unu sola libro sukcesis konservi gravegan bazon por la lingva, literatura, kultura kaj nacia rezisto de venkita popolo kaj donis al tiu popolo kuraĝon postuli siajn lingvon kaj identecon kaj finfine reakiri ilin. Kvankam “la irana popolo donis fraŭlinon kaj ricevis patrinon”, laŭ iuj!

Ĉu Ferdouŝi estis ekstrema naciisto? Absolute ne! Eble multaj fakuloj kritikos min pro tiu ĉi mia eldiro. Tamen la disvastiĝo de Ŝahname inter nepersaj irananoj kaj inter neiranaj popoloj klare montras ke Ferdouŝi konscie faris sian epopeon ne nur por la persoj.

Ferdoŭsi kontraŭas ke la vero estas ĉe nur unu religio:

Ĥerád ra o ĝan ra hámi sánĝád U
Dár ándiŝeje sáhte keĝ gongád U

La racion kaj la animon elfaras Li,
Ĉu eblas enigi Lin en la elfaritan penson?

Tia eldiro, kiu bazas sin sur la punkto ke por rilati al Dio ne nepre necesas obei la imamojn kaj muftiojn, estis filozofia batalo kontraŭ la religia domineco. La kalifo estis samtempe káj la religiestro káj la ŝtatestro. La unuiĝo de la religio kun la ŝtato, kiel

modelo de la antaŭaj iranaj registaroj, donis al la kalifoj tian povon kiuj mortpunis kontraŭulojn, oponantojn kaj disidentojn argumentante ke tiuj estas malobeantoj de Dio, ĉar Dio diris: Obeu Alahon, obeu la profeton kaj obeu viajn regantojn! (81)

El la politika vidpunkto, Ferdoŭsi ne estis favora al iu ajn. Li postulis bonajn, justajn kaj homajn agojn:

Ŝávád haje dár zire morqan tábah	Eĉ ovoĵ sub la kokinoj putriĝas
Hár angáh ke bidadgár gášt ŝah	Se la ŝaho maljustulo fariĝas

Alia grava aspekto de la verko estas ĝia respekto al aliaj kredoj kaj nacioj. Rostam, la Herkulo de Ferdoŭsi, estas nek muzulmano nek eĉ zoroastrano, sed nur adoranto de Dio, kaj se temus pri iom da plia klarigo: mitraisto! Oni devas atenti ke en la tempo de Ferdoŭsi dominis Islamo, kaj antaŭ ĝi, Zoroastrismo. Mitraismo estis jam venkita religio, káj en Persio káj en Romio.

Rostam, la plej fama kaj la plej amata irana heroo, estas duoniranano! Lia patro Zal estas iranano kaj lia patrino Rudabe estas filino de Mehrab Kaboli. Mehrab estas filo de Záh-hak. Záh-hak estas arabo kaj konsiderata kiel la plej granda malamiko de Irano!

Do, la plej amata nacia heroo de la irananoj, deflanke de la patrino estas araba. Ĉu tio estas hazardo? Tute ne:

Alia ekzemplo estas Esfándjar, kiun dum batalo Rostam mortigis. Esfándjar, laŭ la zaratuŝtra tradicio, estas pli grava heroo eĉ ol Rostam. Esfándjar estis filo de Goŝtasp-ŝah kaj laŭ Avesto lia patrino estis Hutaosa, persa nobelino. Tamen laŭ Ferdoŭsi, la patrino de Esfándjar estis Katajun, princino el Romio! Do, la plej gravaj herooj de Irananoj nur duone estas irananoj!

Kritikoj:

Ferdoŭsi estas tiom respektata ĉe la irananoj ke kiam la maldekstrula poeto Áhmád Ŝamlu (1925–2000) kuraĝis uzi la marksisman terminon “feŭdulo” pri li, kvankam tiu ĉi lasta poeto mem ankaŭ estas respektata, li devis toleri furiozajn kritikojn kaj eĉ insultojn. Verdire Ferdoŭsi havis iom da bieno, sed, dum pli ol

tridek jaroj, sidi verkante la libron malriĉigis lin tiele ke en la maljunaĝaj jaroj li estis klare malriĉa.

Estas vere notinde ke dum la 1979a (islama) revolucio en Irano, dum la furioza homamaso sturme atakis kaj detruis ĉiujn signojn kaj simbolojn de la ŝaha reĝimo kaj moderna (laŭ ili okcidenta) vivmaniero, kiel kinejoj, tavernoj, bankoj, statuoj ktp, neniuj ŝtatoj eĉ ŝtoneron al la statuoj de Ferdoŭsi aŭ al la statuoj kiujn oni skulptis surbaze de legendoj aŭ mitoj rakontitaj en la libro de Ferdoŭsi. Jen versoj de Ŝahname:

Rostam رستم

Rajdanto naskiĝis el idoj de Sam (82)
Kiun nomis Patro Dástan: Rostam (83)
Li venis kiel arkosaŭr' rorante
La mondon bruligi elspirante
Li ade supren, malsupren galopas
Nin li glave kaj klabe stopas (84)
Mia viv' ĉe li polvon egalas
Ĉielon klabo lia batalas
Nian armeon li tute ekstermas
Heroo aperas, kolosego ĝermas
Flagon mian li rimarkis en angul'
Klabe atakis min tiu strangul'
Li venis, zonon mian forte tiris
Kvazaŭ li artikojn al mi ŝiris
Tiel li levis min desur la ĉeval'
Kvazaŭ mi pezas je kulo, ne rival'
Ŝiriĝis al mi la kiras' kaj la zon'
Li kaptis min per krifoj de leon'
Leono ne estas forta kiel li
Piedoj sur Tero, kap' en ĉiel' li
Savi min el la manoj de tiu mont'
Kostis al mia armeo tro da hont'...

Milito inter Irano kaj Turano (85)

Leviĝis tumulto, batala rumor'
Brilis sagoj, glavoj, regadis horor'

Du korpusojn egaligis atako
 Kiel anojn de la sama barako
 Bruoj de gongoj, krioj de fuĝo
 Pliis ol tondra forta muĝo
 Timigis la fer-ungoj de l' leonoj
 La korojn de leopardaj kolonoj
 La teron ruĝigis lia sangorabo
 Per ia bovkaposimila ferklabo
 Kien ajn ĉevalo lia sin direktis
 Foliojn aŭtun', kapojn li, rikoltis...
 De sango de l' herooj la tereno
 Ekondis samkiel mara ebena
 Plenis piedoj, manoj kaj kapoj
 Sub militĉevalaj piedfrapoj
 De hufoj de ekvoj en batallok'
 Ses-tavoliĝis Tero, Ĉiel' ok (86)
 Sobiris al Fiŝo, soris al la lun'
 Tiutage sango, tiunokte dun'
 Foriris turkoj el la dezerto Mogan (87)
 Trenis sian armeon al Damgan (87)

Rostam kaj Sohrab رستم و سهراب

Ráhŝ, la ĉevalo de Rostam, perdiĝis. Serĉante ĝin, Rostam sin trovas ĉe la landlimo de Irano kaj Turano. La loka reganto de la Turana urbo Sámangan petis lin esti lia gasto dum kelkaj tagoj. Táhmine, filino de la reganto, falis en amon de Rostam. Ŝi noktomeze iris en lian liton. Táhmine naskis bebon. La filon ŝi nomis Sohrab. Rostam neniam vidis sian filon. Sohrab fariĝis forta heroo. Afrasiab, la reĝo de la tuta Turano, sendis Sohrab-on batali kontraŭ Rostam. Dum la batalo, kelkfoje venkis Sohrab sed ia svaga sento de samsangeco malhelpis lin mortigi Rostam. Sed Rostam finfine mortigas Sohrab ne ekkoninte lin. Nur post la grava vundo, dum la lastaj momentoj de la vivo de Sohrab, Rostam ekscias la veron pri sia filo.

La tragedio komenciĝas per unu el la plej kortuŝaj protazoj de la persa literaturo:

Se fortvento ekblovas el angulo
Kaj terenfaligas nematuran bergamoton
Ĉu ni nomas ĝin maljusta aŭ justa?
Ĉu ni konsideras ĝin malscia aŭ scia?
Se la morto estas justa, kio do estas maljusta?
Pro justeco kial ni do lamentas kaj krias?
Via animo ne estas konscia pri ĉi mistero
Malantaŭ ĉi kurtenon oni vin ne enlasas
Ĉiuj iris ĝis la pordo de la scivolemo
Sed la mistera pordo ne malfermiĝis al iu...

Ĝar tondbadi bárajád ze konĝ
Behak áfgánád nareside toronĝ
Setámkare ĥanimš ár dadĝar?
Honármánd danimš ár bihonár?
Ĝar márg dad ást bidad ĉist?
Ze dad in háme bang o fárad ĉist?
Áz in raz ĝane to agah nist
Bedin párde ándár to ra rah nist
Háme ta dáre az ráfte fáraz
Be kás bár násod in dáre raz baz...

Mi aŭdis ke Rostam komence de sort'
De Dio tiom ricevis li da fort'
Ke se li metadis piedon ien
Se ŝton', eniĝis piedo tien
Pro l' fort' li ĝeniĝis kaj suferis
Liberiĝon de la pezo preferis
Ĉe la Mondsenjoro li lamentis
Je fervora preĝado diligentis
Ke Dio malpliigu la forton
Ke li povu toleradi la porton
Tiom insiste kaj persiste petis
Ke Di' onon de la forto reĵetis
Ĉe Sohrab-o kiu lukton pretis
Denove li sian forton repetis...
Dio donis lian forton denove
Li fariĝis egala korpopove...
Atakis Sohrab patron elefante
Lazon brake, mane arkon, tenante
Kiel apro, leono, Sohrab roris
La teron ĉevalo lia baŭmboris...
Je la fin' Rostam faligis la filon
Ne aŭskultinte sian korkonsilon
Akran ponardon rapide eltiris
Flankon de la filo la patr' ŝiris...
Se sangon soifas vi malprudente
Kaj glavo via sangas violente

La sorto soifos je via sang'
 Ĉiu korpharo via al vi stang' ...
 Sohrab agoniante:
 La patrino donis patran blazonon
 Kiu verŝis amon en mian koron
 Mi lin serĉis kies vangon mi kisu
 Maleblas nun reserĉadon mi bisu
 Veadon! Ĉar la patron mi ne vidis
 Kvankam kun doloro mi avidis
 Sed tamen se vi fiŝe akven naĝos
 Aŭ kiel obskur' nokten vojaĝos
 Aŭ se vi steliĝos sur ĉielo
 Se tute malaperos en ribelo
 Mia patro je venĝo vin trovas
 Se li aŭdos ke mi movon ne povas
 Bravulo el miaj bravuloj iam
 Portos tiun ĉi mesaĝon al Rostam
 Ke Sohrab falis en batal' kaj mortis
 Ĉar la amon al patro li alportis
 Aŭdinte ĉi vortojn Rostam svenis
 Mallumo liajn okulojn kurtenis...

4- Fārroĥi

(?– 429 p.H= 1037 p.K)

فرخی

Li estis poeto de la kvina jarcento p.H. (= unuaj jaroj de la 11-a jarcento p.K.), subtilstila, sprita gazalisto/lirikisto, verkinta ankaŭ panegirajn odojn, en kies poemoj klare videblas lia samseksemo. Liaj poemoj utiligas simplan lingvaĵon sed entenas artajn subtilajn esprimojn, ĉefe pri amo, amoro kaj diboĉo. Lian stilon oni nomas “Simpla sed ne imitebla”.

Jen poemo de li:

La paco

Ree interkisis ni ke ni lasu la separon
 Kondiĉe ke li pentu kaj zorgu la riparon

Kion ajn li faris, li pentis pardonpetante
Mi lin pardonis, reiris en lian amaltaron
Se ne estis mi lia amo ĝis hieraŭ
Hodiaŭ ni festas, kaj ĉiujare, amjaron
Pasintnokte hazarde mi iris al lia hejmo
Min riverencis li prenante la pordbaron
Mi diris al li: ho la animo de la mondo
Riverencu per kis'; mi ŝatas rekt-cidaron
Ĉesu kisi la grundon, fremdulon ne servu
Vi ne estas fremda, evitu la eraron
Li tre ĝojis, liaj vangoj ruĝiĝis flore
Kun mizerikordo komparis li mian faron
“Bonfaras, bonkoras vi”, li diris, “tial Dio
Donis al vi da favoro de l' Sultan' maron” ...

5- Onsori

(mort. 431 p.H.= 1039 p.K.)

عنصرى

Li estas fama poeto de la unuaj jaroj de la 5-a jarcento p.H. Li estis majstro de la ornamitaj odoj kaj subtilaj gazaloj. Li famas i.a. pro siaj nove iniciatitaj temoj. Li versigis kelkajn iranajn am-rakontojn, inter kiuj estas: Vameq kaj Ázra, Sorĥbot kaj Ĥengbot, Ŝadbáhr kaj Ejnolhájat ktp. El tiuj libroj bedaŭrinde restas nur kelkaj versoj.

Onidire li ankaŭ versigis la tragedion Rostam kaj Sohrab, sed nuntempe ĝi ne troveblas.

La lerte faritaj odoj de Onsori estas imitataj de multaj posteuloj.

Dum tempo li loĝis en la kortego de Násr filo de Nasereddin Sáboktákin, kiu deflanke de sia frato Máhmud filo de Sáboktákin (Mahmud de Gazni, 971 – 1030 p.K.) estis militreganto de Ĥorasano (mort. 412 p.H.= 1021 p.K.). Li poste ekloĝis en la kortego de Máhmud mem. En tiuj kortegoj li estis la ĉefpoeto. Jen poemoj de li:

La Noŭruz-a vento (38)

La Noŭruza vento idolojn faris en ĝardeno
Pro ĝia kreiv', ĉiu arbo alia sceno
Horto iĝis kiel tolvendejo plurkolora
Vent' moskodoras kiel parfumeja marokeno
Lili' arĝenton blankan jam rikoltas en la agro
Reverdigas la naturon rebeliga mieno
Vizaĝvualoj de kampoj estas de ĉina fajro
Orname beligas la arbon juvela kolĉeno
La suno kiel duonvualita belulino
Foje brilas, foje sin kaŝas per nuba kurteno
Demetas l' alta montaro la arĝentan kronon
Kun emajlaj okuloj, silka vizaĝ', moska ebena
Tagoj plilongiĝas kiel bonvivo de l' reĝo
Ĝarden' plifreŝiĝas kiel feliĉ' de l' suvereno

Sáde-fajro(88)

Sáde-festo de ŝahoj memorrestas
Aferidun (43) kaj Ĝám (41) tiun refestas
Ĉi-nokte la tero kvazaŭ Sinajo
La Di-lumo kiel fajr' manifestas
Se tagiĝis nokto do ni feliĉas
Ne noktas do se lumtago ekestas
Do ĉi tero situas en Edeno
La lumo kaj brilo ĝin sugestas
L' universon la tero samegalas
Se la du, samegalecon atestas
Tiu estas de lumo kaj de fajro
Tiu ĉi lumbrilon nu ne kontestas
Se Ĉielo rubenmino ne estas
Rubeneroj kial en vento nestas?...

6- Mánuĉehri (mort. 432 p.H.= 1040 p.K.)

منوچهری

Lia kortega vivo komenciĝis ĉe Mánuĉehr filo de Qabus Dejlámi (33) (421–432 p.H.= 1030–1040 p.K.). Lia poeta kromnomo Mánuĉehri devenas de la tiu-loka reĝo. Liaj unuaj lernojaroj pasis por lerni la araban literaturon. Tial li lertiĝis en la araba kaj klopodis imiti arabajn poemojn kaj eĉ ekuzi arabajn vortojn pli ol faris liaj samtempoj. Arabaj poembildoj kaj imagoj en lia poemaro iam estas iom fremdaj al la klimato de Irano, ekzemple priskribado de dezertoj kaj dezertvojaĝoj, kameloj, tendarejoj ktp. Tamen li estas en la listo de la kapablaj iranaj poetoj pro:

- novaj poemaj imagoj
- novaj elpensajtoj, temoj kaj vortfaradoj
- lertaj priskriboj kaj esprimoj
- detale precizaj similigoj kaj metaforoj
- flueca poeta naturo

Li priskribis diversajn naturajn pejzaĝojn: dezertojn, montojn, ĝangalojn, floretojn, ĉielon, nubojn, pluvon kaj plurajn plantojn kaj bestojn. Diboĉemo kaj juneco de Mánuĉehri kaŭzis al li troigon en priskribado de vino kaj diboĉaĵoj. Eble li mortis preskaŭ junaĝe pro tro da diboĉo. Ĉefe liaj vinpriskribaj poemoj estas la plej bonaj ĝis lia tempo.

La aŭroro

*Ĉo áz zolfe šáb baz šod tabha
Foru mord qándile mehrabha
Sepide dám áz bime sármaje sáht
Bepušid bár kuh sánĝabha...*

Kiam el hararo de l' nokto malnodiĝis nodoj
Formortis kandeloj de l' mihraboj kaj pagodoj
La aŭroro pro timo de l' malvarmo intensa
Vestadis la montopintojn per dikaj efodoj
La verŝistino alvokis drinkantojn per hola

Dum ŝi krispigis siajn harpintojn per dentorodoj
De ŝia unua kri' prancis ni de l' dolĉdormo
Impetis kiel batitaj polopilkaj kaj lodoj
Flagris stelsimile la juna vino ankoraŭ
Ke ŝi haste rapidis verŝi vinon al prodoj...

Dormilo

Venis nokto kaj dormo estas ĉe mi nur sufero
Amiko mia, donu al mi sukcon de vinbero
Mi volas forpeli la dormemon per vino pura
Ja junulo per vino dormon venkas! Jen konkero
Konsternas min tiu kiu dormas en sia domo
Dum tie ankoraŭ restas botelo en kamero
Eĉ pli strange: kiel oni drinkas sen harpo?
Ĉu sen harpo kaj vino noktiĝas vere vespero?
Oni fajfas por ĉevalo ke ĝi akvon ja trinku
Ol ĉevalo hom' plias, kaj la vino ol rivero...

7- Fáhroddin Ás'ád Gorgani

فخرالدین اسعد گرگانی

Li estas fama rakontisto, vivinta en la unua duono de la 5-a jarcento p.H. (11-a p.K.). Li famiĝis en la tempo de la sultano Ábutaleb Toqrol Bejg la Selĝukida (429–455 p.H.= 1037–1063 p.K.). Verŝajne li mortis en la finaj jaroj de tiu sultano, eble post 446 (1054).

Lia ununure restanta verko estas versigita amromano Vis kaj Ramin, kiun li tradukis el la mezpersa (Páhlávia) al la siatempa persa lingvo kaj kiu temas pri amromano el la tempo de la Partia Imperio (247 a.K. – 224 p.K.).

Ŝah-Mubed, la Ŝaharŝaho, interkonsentis kun Ŝahru, la bela reĝino de Mahabad, ke se ŝi naskos filinon, la filino estu lia fianĉino. Ŝahru naskis Vis-on sed rezignis pri sia promeso kaj konsentis ke Vis geedziĝu kun sia frato Viru. Mubed ekbatalis kontraŭ Viru sed ne sukcesinte en la batalo elpensis ruzajon kaj eligis Viru el la fortikaĵo kaj kunportis lin al Ĥorasano. Survoje,

Ramin, la juna frato de Ŝah-Mubed, falis en amon de Vis. Post iom da tempo ankaŭ Vis ekamis Ramin. Ili ambaŭ kune forfuĝis pro la kolero de la ŝaho.

La amromano, malgraŭ sia tabua temo pri amo inter gefratoj, estis populara kaj citata ĝis la sepa p.H-a jarcento.

Vis

Filino kiu forlasante patrinon
Kiel suno metis al nokto finon
Ĉeestantoj samvorte ĝojkriis:
“Belecon absolutan ŝi raziis”
Okulparo de la bebo gagata
Oni nomis ŝin Vis La Beata
Je statur’ kreskis ŝi ĉiuhore
Blankarĝent’ korpe, fortŝtal’ kore
Kia homo, kia nova fenomen’
Kiom bela, kiom forta la numen’...

8– Āsādī Tusi (Ābunāsr Āli filo de Āhmād)

(mort. 465 p.H.= 1072 p.K.)

اسدی طوسی

Li estis odisto, epopeisto kaj filologo de la 5-a jarcento p.H. (11-a p.K.).

Doŭlātŝah Sámárqāndi, biografo, en nepruvita eldiro nomas lin mentoro de Ferdoŭsi kaj kuraĝiganto de li versi Ŝahname. Tiun nepravigeblan eldiron citis kelkaj orientalistoj (89) kiuj kredis ke ekzistas du Āsādī; la patro, Ābunāsr, kaj la filo, Āli. Tiuj orientalistoj diris ke la libron “Polemikaj odoj” verkis la patro kaj la libron “Gārŝasbname” verkis la filo. Ili malpravas. La verkisto de tiuj du libroj plus la vortaro “Vortaro Fors” estas unu persono kaj li estas Ābunāsr Āli Āsādī Tusi.

Lia famiĝo okazis dum la ŝtatrenversoj kaj sociaj tumultoj en Ĥorasano. Temas pri la invado de Selĝukidoj kiu kaŭzis la disfalon de Gaznavidoj. Āsādī elmigris el Ĥorasano al Azerbajĝano kaj poste al Armenio.

Lia vortaro estas la plej antikva verko pri la lingvo Farsi (69).
Gárŝasbname (ankaŭ Kárŝasbname) temas pri praavo de Rostam. Jen versoj de tiu libro:

Animo kaj korpo

Animo ajnan esencon superas
Ne de Ter' sed de Ĉielo aperas
Ĝi estas lumo el pura deveno
Kiu falis al ĉi morna haveno
Ĝi lumas kaj kreas movmotivon
Kreas racion, saĝon, la vivon
Ne sinmovas ĝi nek movon sufokas
Ne ekstere nek interne ĝi sin lokas
Se karas korpo, ĝi karas pro la anim'
Kiel karas vesto pro korpoproksim'

9– Naser Ĥosro

(394– 481 p.H.= 1003– 1088 p.K.)

ناصر خسرو

(Por pliaj informoj pri lia biografio, vidu la prozan parton, numeron 16).

Naser estas fama poeto kaj aŭtoro, filozofo kaj propagandisto de la ismailana ŝijaismo. Dum sia vojaĝo tra Mekko kaj Kairo, li konvertiĝis al la ismailanisma ŝijaismo. La egipta ismailana kalifo elektis lin kiel ĉefon (Hoĝĝát) de la Ĥorasanaĵ ismailanoj.

Li estas sendube unu el la grandaj poetoj de la persa lingvo. Li havas fortan naturon, firmajn vortojn kaj specialan propran stilon, kiu similas al la stilo de la poetoj de la finaj jaroj de la Samanida erao. La ĉefaj karakteroj de liaj poemoj estas admono, maksimumoj kaj religiaj dogmoj. Ankaŭ lia scienca menso igas lin sekvi la vojon de logikistoj. Liaj paroloj plenas de logikaj komparoj kaj konkludoj, kaj raciaj rezultigoj. Tial al liaj poemoj ofte mankas poeziaj kaj belartaj subtilaj imagoj. Tamen por la persa literaturo li gravas, ĉar li estas inter la unuaj aŭtoroj kiuj per komprenebla lingvaĵo klarigis la komplikajn filozofiajn kaj sciencajn konceptojn. Jen du poemoj de li:

Frukto de l' scienco

Ne riproĉu Ĉielradon, ne la sorton
Ne stulte ripetadu tian vorton
La Ĉielo se nenion povas fari
Kial vortojn akuzantajn gargari
Paciencu vi se la vivo kruelas
Saĝulo kontraŭ vivo ne duelas
Se vi mem faras vian sorton malbona
La sorto ne estos al vi feliĉdona
Vi ne similos la anĝelojn vizaĝe
Sed vi simulu ilin age kaj saĝe...
Senfruktajn arbolignojn oni bruligas
Tiel senfruktecon oni reguligas
Se arbo via donos sciencfrukton
Vi gajnos kontraŭ Firmamento la lukton...

Aglo

Foje en montaro aglo ekelanis
Ĉasi predon flugante ekplanis
Al siaj etenditaj flugiloj rigardis
Sinlaŭdon fanfaronis kaj prilardis:
“Ĉielkulminen se mi flugas, mi vidas
En profundo de la maro kio sidas
Se sur branĉeto Moskito movetas sin
Ĉe tiu moviĝeto, mi tuj atentus ĝin”
Ĝi multe arogis, ne timis la sorton
Finfine la sorto uzis sian forton
Subite el embusk' pafarko tre forta
Sagon flugigis al l' aglo nebonsorta
Fine el embusko arko ĵetis sagon
Finis al l' aglo ĝian adan flugvagon
La alon de l' aglo la sago trafis
Ĉielo la aglon al tero repafis
Ĝi falis teren, baraktis kiel fiŝo
Flugilojn faris agonian tapiŝon
Sin turnis al sago, vidis lignon, feron

Miris ke la sago atingis eteron
Sagfine ekvidis ĝi aglan plumon
Lamentis: “ni faras mem nian lotumon”

10– Sánai (mort. 545 p.H.= 1150 p.K.)

سنایی

Ábolmáĝd Máĝdud filo de Adám Sánai Qáznávi, estas poeto kaj fama mistikulo (sufio) kaj majstro de la persa poemo. Li naskiĝis en la mezaj jaroj (eble 470–473?) de la 5-a jarcento p.H. (11-a p.K.) en la urbo Qáznin (Gazni, nuntempe en Afganio). Frujunaĝe li estis kortega poeto de Másud filo de Ebrahim kaj Báhramŝah filo de Másud la Gaznavidoj. Post vojaĝo al Ĥorasano kaj kelkara loĝado tie, aperis interna ŝanĝo en li kaj li ekemis pie solvivi. Lia sufia karaktero formiĝis en tiu periodo. Li ekversis siajn famajn odojn pri pio, moralo kaj mistikismo. Li verkis la librojn “Hádiqát-ol-Háqiqá” (ĝardeno de l’ vero), Táriqát-o-Táhqiq (vojo de l’ serĉado), Sejr-ol-Ebad (vojiro de la Diservanto), Karname-je Bálh (bulteno de Balĥo) ktp.

Li estas la unua kiu plej serioze komencis uzi poemon por mistikismo kaj sufiismo. Li mortis en Gazni kaj lia maŭzoleo estas vizitata tie. Sánai efikis sur la persan poemon kaj kaŭzis diversecon en ĝiaj stiloj.

Komence de sia kariero, li imitis la stilojn de Onsori kaj Fár-roĥi, sed poste li trovis sian propran stilon, en kiu abundas la mistikismaj konceptoj, moralajoj, predikoj, religiaj maksimumoj ktp. Li ornamis siajn versojn per Koranaj kaj arablingvaj vortoj, frazetoj kaj eĉ esprimmanieroj, ankaŭ per malfacilaj terminoj de sciencoj kiujn li konis. Tial liaj poemoj estas foje komplikaj kaj malfluaj. Ili bezonas klarigojn por esti bone komprenataj. El liaj poemoj:

Scienco

Animo senscienca mortigas korpon
Ĉagrenas la sorpuj’ kiu ne donas sorpon
Scienco kunportas riĉon kaj komforton
Jes ja scienculo havas bonan sorton

Scienculo kaj artist' estas ĉielo
Sine: firmamento kaj punkte: stelo
Aŭskultu ĉies, ĉiujn kaj ĉiajn parolojn
Enkapigu la perlojn kaj lasu petolojn
Fariĝos oni tamen al Dio ŝuldanto
Lerninte se ne estos aplikmeditanto
Kion vi lernis, endas unue bonuzi
Per dua scienco due sin amuzi

Pura vesto

Vagabondo iam rampis en kampo
Lia vesto ĉifona, mem li trampo
Iu lin pri vestaĉo mokdemandis
“Ĉar ĝi estas la mia” li respondis
Mi ne volas kredvende *haram*-serĉi (90)
Do vest' ne pli bonas ol tiu ĉi
Licas ĝi kvankam ekstere malpura
Ne estas mallica, *haram*-velura
Se puras vesto laŭ via kredo
Vi ne hontu pro ĝia posedo

Tempo de malfacilo

De la patroj rakonton mi memoras
Kies vortojn glore mi honoras
Loĝadis en vilaĝeto virino
Ĉe ŝi bovo, bovino kaj filino
Filino, Mehsati, malsane falis
Malicegaj okuloj ja kialis
Filino litkuŝadis palvizaĝe
La patrino lamentis oldaĝe
La koro al la patrino brulis
La filinon ununuran ŝi lulis
Pri morto rakontis maljunulin'
Deziras ŝi frumorti ĉe filin'
La dombovo kiu serĉis furaĝon
Enigis en kuirpoton vizaĝon

Fariĝis la kuirpoto la kapo
 La bovo sin frapis post frapo
 Similis al demono de geheno
 Kiu fuĝis subite el kateno
 La maljunan virinon ĝi teruris
 La anĝelon de la morto figuris
 La patrino timegis nun la morton
 Kriis per sia forto la vorton:
 “Kiun anĝel’ de la morto ja vartas?
 Ne mi, sed Mehsati malbone fartas!
 Nu maljune mi fartas tute sane
 Prijuĝu, elektu justamane
 Se vi serĉas la malsanan filinon
 Prenu ŝin, ne min sanan ulinon
 Averton, ho averton, ho averton!
 Je malfacil’ kiu donas certon?

11- Ānvāri

(1126–1189 p.K.)

انوری

Li estas granda poeto de la 6-a jarcento p.H. (12-a p.K.). Liaj elokventaj panegiroj kaj gazaloj famigis lin. Li estas unu el la kolosoj de la persa poezio. Li studis literaturon, filozofion, matematikon kaj astronomion. Li simpatiis kaj defendis la filozofion de Aviceno (kaj tio postulis kuraĝon ĉar Aviceno mem pro defendo al Aristotelo suferis persekuton). Dum la regado de la sultano Āhmād Sānĝār Selĝukida (1097–1118), Ānvāri pasigis sian vivon en la kortego de tiu sultano kaj post lia morto (552 p.H.= 1157 p.K.) iris al kortegoj de novkonkerintaj Goz-emiroj.

Ānvāri verkis verve, vikle kaj sprite en flua lingvaĵo, tre simila al la samtempa konversacio. Tio estas la kialo de lia graveco, ĉar antaŭe ĉiuj poetoj uzis klasikan kleran skribforman lingvaĵon. Li estis la unua poeto kiu komencis uzi tian parolfor-

man, simplan, senornaman lingvaĵon. Liaj poemoj tamen estas tre belaj. Jen kelkaj poemoj liaj:

Spekti la ĝardenon

Ho, la mondo renoviĝis, elŝeliĝis
Kaj la tempo kaj la tero rebeliĝis
Pli longa nokto estis ol la tago
Al ĝi manko, al ĉi nun denove pago
Ter' denove elspire elvaporas,
La kukoloj ekkukuas, ekamoras
Dum la aŭtun' jam garantiis gazono
Por floro ĉe la birdo, laŭ sezono
Nun gazonon pri ŝuldo oni petas
Jes, oni garantianton pripetas
Pro gazelmoskujo la tero odoras
Ambro kaj rosmareno ne plu valoras
Se zefiro ne krude koloris arbojn
Kial do la arboj akven ĵetas farbojn?
Eble akvo kaŝis sekretojn en teron
Ĉar mi vidas de la sekretoj aperon...

Kontenteco

Ne poluu vin per degno de homo
Se estas panpeco en via domo
Ho Memo eniru kontentbazon
Tie vi trovas malmultkoston varon
Evitu malmolnuka ies degnon
Degno elĉerpas vian animregnon
Kion vi faras en la korpa mondo?
Via destino estas anim-ondo
Sendube donaco estas komplezo
Sed ne-akcepto estas bonherezo
Multe bonas donaci kaj doni
Sed pli bonas ne-ricevon koni

12-Nezami Gánĝávi

(1141–1209?)

نظامی گنجوی

Ábu Mohámmád Elias filo de Jusof Nezami Gánĝei, fama kiel Nezami Gánĝávi, estas granda majstro de la persa poemromano. Li naskiĝis en la urbo Gánĝe. Tiu urbo en Vikipedio estas *Ganĝa* kaj nuntempe situas en Azerbajĝano.

Preskaŭ tutan sian vivon li pasigis en sia urbo kaj kvankam li ne estis kortega poeto, – kaj tial ni ne scias multe pri li, eĉ la precizajn datojn de liaj naskiĝo kaj morto – tamen li havis kontaktojn kun lokaj kaj najbaraj regantoj. Li omaĝis al tiuj regantoj per kelkaj siaj libroj.

Lia plej fama verko estas: Kvin Trezoroj (1– Magazeno de la misteroj, 2– Ĥosro kaj Ŝirin, 3– Lejli kaj Mágnum, 4– Sep Belulinoj, 5– Aleksandrolibro). Li verkis ankaŭ odojn kaj gazalojn, el kiuj partoj atingis nin.

Nezami sendube estas unu el la majstroj de la persa poemo. Li sukcesis krei aŭ disvolvi sian propran stilon, kiu estis imitata kaj pastiĉata longajn jarojn post li. Jen poemoj de li:

Ĝojigu la korojn (el Magazeno de la misteroj)

Ĝojigu la korojn, jen bonvivo
Ekĝojos de vi la Mondkadivo
Sekvu l' ombron de l' rajdantoj de Sun'
Preferu sinsuferon pro komun'
Prenu dolorojn, donu rimedon
Akiru tiel regnan posedon
Varmiĝu de am', de malam' male
Sune, Lune, prilumu egale
Se vi bonfaras al iu homo
Bonfaro venos al via domo
Por Rivoluanto Firmamenta
Bon' kun malbon' ne estas identa

Morto de Dario (el Aleksandrolibro)

Kiam l' armeo al batalo foriris
Subite li ĉirkaŭmalplenon akiris
Neniu ĉerestis ĉe Dario-reĝo
De malam' kaj soleco en sieĝo
Malicaj du generaloj de li mem
Atencis Darion sen problem'
Ili du vundis la reĝon grave
Eligis sangon lian senprave
Defalis teren Dario pro l' vund'
Lamentis kun li la monda profund'
La ŝaha grandarb' perfide falis
Lia korp' vundita, polvon egaligis
La du malbeataj generaloj
Post murdo foriris al rivaloj
Al Aleksandro ili rakontis
Ke Persujreĝon ili alfrontis
"Ke jam malplenas lia trono
de nun mondregas via krono"
Aleksandr' rimarkinte ke ili
Pri reĝmurd' kuraĝas babili
Bedaŭris li, pentis promeson
Plu li ne havis ian intereson
Foriras espero de samrangulo
Se lia rivalo mortas en angulo
Aleksandr' demandis pri la viktimo
"Kie falas li, ĉu en proksimo?"
Aleksandron tiuj du gvidis sen timo
Al la loko de sia perfida krimo
Aleksandr' kiam la reĝon en sang' vidis
Por lian kirason malfermi ĉe lin sidis
Metis lian kapon sur sian femuron
Por doni al li afablon kaj sekuron...
(Dario testamentis)
Mi havas dezirojn tri testamente

Plenumu ilin kompleze eminente
Unue pri morto de mi per teroro
Vi estu mem, novreĝo, prokuroro
Kaj la dua: se vi faros komandon
Prizorgu ne damaĝi mian landon
Trie pri la subuloj kaj la harem'
Ne rompu tabuojn kaj regu vin mem
Aleksandr' akceptis kion Dari' informis
Akceptint' ekstaris, dirinto dormis

Empirea birdo (el Aleksandrolibro)

Oni diras ke super la bluĉiel'
Troveblas grandega blankkoko
Se matene kokerikas tiu birdo
Kokerikas ĉiu koko de terloko
Tiu birdo de l' Empire' mi estas
De mi venas ĉe tagiĝo novalvoko
Se mi pepas, ĉiuj birdoj de la urbo
Gratulas sin pro l' nova epoko...

13- Ĥaqani Ŝervani/ Ŝirvani

(1120–1198)

خاقانی

Lia kompleta nomo estas Áfzál– od– Din Bádíl filo de Áli. Lia patro estis ĉarpentisto kaj lia patrino estis romiana nestorian-kristana sklavino, konvertita al Islamo. Iom da tempo li studentis ĉe la poeto Ábolála Gánĝávi, edzinigis lian filinon kaj helpe de li estis prezentita al la kortego de la reganta dinastio Ŝirvanŝahoj, kiu establis ŝtaton en Ŝirvano (situanta en nuntempa Azerbajĝano).

Ĥaqani du fojojn plenumis haĝon kaj unu fojon malliberiĝis (ĉ. 1173). En la finaj jaroj de sia vivo li emis izoli sin kaj ekloĝis en Tabriz (urbo en la irana provinco Azerbajĝan) kaj tie mortis.

Ĥaqani estas sendube majstro de la odo kaj unu el la kolosoj

de la perslingva poezio. Li kreis sian propran stilon, kiu estis imitata dum longa tempo. Li famas pro siaj sprito, lerta vortkombino, kreo de novaj nocioj, novstilaj priskriboj, novecaj similingoj kaj uzado de tre malfacilaj rimoj. Liaj vortkombinoj entenas novecajn fantaziaĵojn, metaforojn kaj bizarajn sinekdokojn kiaj ĝis lia tempo ne troveblas en alia teksto.

Liaj poemoj estas tre malfacilaj, ĉar li multe uzas sciencajn, religiajn, filozofiajn, mitajn terminojn. Neniu studento de literaturo volonte elektas lin por studi profesie aŭ parkerigi liajn poemojn, sed se oni lernis lian poem-arton kaj komprenis ĝin, ĝia dolĉeco plu restos kun la lerninto. Jen poemo de li:

Roĥsar-e Sobh (vizaĝo de la mateno)

Roĥsare sobh pārde be ámda bár áfgánád

Raze dele zámame be sáhra bár áfgánád...

La matenvizaĝ' la vualon vole malvolvas
Misterojn de la vivo en saharoj dissolvas (91)

Matenebriuloj refreŝigas sin per vino
Sur l' maljunulino aperas nov-pelerino (92)

La skurĝo de la aŭroro jam avancas
Mi timas ke l' ĉevalo arĝenta (93) prancas

Verŝu vinon kies brilo elpokalas
La aŭroron ĝi sprone, bele, vualas

La firmamento jude al sia blusino
Alkudris flavan stelon por sindifino (94)

Se l' mateno siajn silkajn fajojn elserĉas
Tiujn fajojn aliformas, mil fojojn sorĉas

La firmament' forprenas ŝakpecojn eltabule (95)

Kaj ellasas nur unu ŝakfiguron regule (96)

Mardrinkantoj monthepataj tian vinon prenas (97)

Kies ardo monton martreme enmaren trenas

Amanto matendrinkas spite marabuton

Salute al marabuto tamen trinkas guton...

14-Áttar (1145–1221?) عطار

Fáridoddin Mohámmád filo de Ebrahim Nejŝaburi, fama kiel Áttar Nejŝaburi, estas fama poeto kaj sufio de la sesa kaj komenco de la sepa jarcentoj p.H. (12 kaj 13 p.K).

Junaĝe li laboris kiel apotekisto en sia heredita apoteko. Poste pro spirita ŝanĝiĝo iniciĝis en sufiismon kaj mistikismon. Pro tiu ŝanĝiĝo li forlasis sian apotekon kaj ekvojaĝis. Reveninte li loĝis en sia naskiĝurbo Nejŝabur kaj mortis tie dum la invado de la mongoloj. Lia maŭzoleo ĝis nun restas en Nejŝabur, urbo en irana Ĥorasano.

Li estas unu el la plej grandaj poetoj de la irana sufiismo. Liaj poemoj estas facile kompreneblaj, tamen tre pasiaj. Li estas tre sincera en sia amo al Dio.

Li verkis en diversaj ĝenroj; odo, gazalo, kanzono, biografio de sufioj, *masnavio* (versduo/distiko) ktp.

La plej fama lia masnavio estas *Mánteqottejr* (lingvo de birdoj). Ĝi estas simbolisma verko konsistanta el pli ol 4600 versduoj. Temas pri diskuto inter birdoj pri *Simorq*. Simorq en la irana mitologio estas unu el la mitaj birdoj, parolipova kaj saĝa. Du aliaj tiaj birdoj estas *Qoqnus*, kiu egalas pli-malpli al Fenikso, kaj *Homa*, kies ombro kunportos feliĉon se ĝi falas sur iun.

En la verko de Áttar, Simorq estas simbolo de Dio. Kvankam la vorto Simorq en la tempo de la poeto estas ŝanĝita formo de pli antikva malnovpersa vorto, tamen la poeto ignorante tion, vortludis per Si (30) Morq (birdo): Birdoj volas serĉi la Veron/Dion. Upupo gvidas ilin. En la vojo, multaj birdoj, unu post la alia, ĉiu pro propra kialo aŭ preteksto rezignas. La vojo estas malfacila. Finfine atingas Simorq-on nur 30 birdoj! Kiam tiuj 30 birdoj ekperceptas sian etecon ĉe Simorq/Dio kaj tute neniigas en Dion, subite ili ekkognas ke Simorq efektive estas 30-morq, t.e. ili mem! (En la persa oni ne diras 30 birdoj, sed 30 birdo).

Jen poemo de Áttar:

(neniĝo)(98)

Diris Loqman la Sarahsa: ho Dio! (99)

Vidu min en maljunaĝstadio

Oni ĝojigas oldan sklavon

Skribe donacas al li savon

Estante via, ho granda Reĝo

Mia nigra hararo iĝis neĝo

Jam mi estas ĉagrena, moderigu

Jam mi estas maljuna, liberigu

Voĉo diris: empiria malplebo

liberiĝon ja meritas nur glebo

Sen la saĝo, sen la tasko, sen la vol'

Lasu saĝon, lasu taskon, jen abol'

Li kriis; ho Dio mi vin amas

Sen tiuj kolkatenoj mi ja famas

Do Dio igis de li for racion

Sen ia tasko eniris socion

Li ripetis: nun kiu estas mi?

Sen Dio, do kun kiu estas mi?

Sklaveco foriris kaj liberec'

De l' feliĉo, malfeliĉ' neniŭ pec'

Ne klaras ĉu mi Vi-as aŭ Vi mi-as?

Neniĝas mia mio, ĉio Ni-as...

15- Rumi

(1207-1273)

(pri lia biografio vidu numeron 28 en la proza parto)

مولوی

Jen kelkaj komencaj versoj el lia fama Másnávi Má'návi/
Masnavi Manavi

(spirita versduaro مثنوی معنوی)

Ŝalmo

Beŝno in nej ĉun ŝekaját mikonád

Áz ĝodajiha hekaját mikonád...

Aŭdu ĉi ŝalmon kiele ĝi plendas
Kaj kiele ĝin disiĝo ja ofendas:
De kanejo oni min fordetrancis
Per mi viroj kaj virinoj ĝemoanĉis
Se la sino de vi estas disŝirata (100)
Mi rakontu pri la dom' sopirata
For de sia origino kiu restas
Reunuiĝa sopiro ĉe li nestas
Ĉe ĉiu ajn homgrupo mi lamentis
Kun feliĉaj, malfeliĉaj, kune sentis
Ĉiu homo min traktis siakone
Ne koninte misteraĵojn de mi bone
Kun la kantoj mia mistero unuas
Sed oreloj kaj okuloj jam enuas
Korpo, anim', unu vidas la alian
Ne vidas vi ventanimon papilian
Kanto de ŝalm' fajrsimilas, ne aeron
Al kiu ĉi fajro mankas, malaperon!
Fajro de l' am' ja kantigas la kanŝalmon
Pasi' de l' am' ja estigas la vinŝaŭmon...

(Alia poemo de Rumi: neniĝo)(98)

En ŝipon iu sintaksisto sidis
La kapitanon li aĉe demandis:
Ĉu vi studis sintakson? Respond': Ne!
Li diris; duono de via viv' ve!
La ŝipestro evidente indignis
Sed momente respondon li rezignis
Vento ĵetis la ŝipon en vorticon
La ŝipestro redonis la malicon:
Ĉu vi scipovas naĝi? Jam diru
La sintaksisto diris ne! Foriru!
– La tuta via vivo ve! fripono!
Ĉar la ŝipo jam estas en drono
Nun neniĝ', ne sintakso, utilas
La maro pezulaĉojn ja mutilas

L' akvo facile mortinton redonas
Liberiĝon la vivanto ne konas
Se vi el homaj karakteroj ja mortas
La maro de l' mistero vin surportas ...

(Alia poemo de Rumi: biaso)

Kiel arbo estas, ho fil', ĉi mondo
Sur ĝi homo; kiel frukto sur frondo
Kruda frukto branĉon pli forte tenas
Ĉar ĝi por manĝ' ankoraŭ ne bonas
La frukto se maturas kaj sukplenas
La branĉon ĝi malpli forte prenas
Rigoreco kaj biaso krudecas
Al la feti nur, sangsuĉado decas...

Alia poemo de Rumi: la urbo de l' amo

Amanton vizitintan alilandon
Demandis amatino ĉi demandon
“kiu urbo plie belas, pli famas”?
-:”tiu urbo en kiu iun vi amas”!
La plej feliĉa urbo de la mondo
Kuşas ĉe la amo, ama respondo...

16- Sadio

(1184-1281)

(lian biografion bv. legi ĉe la numero 31 en la proza parto)

سعدى

Jen kelkaj famaj poemoj de Sadio:

Kunsento

Ni homoj unu korpon membraras
Esence ni ĉiuj egale karas
Iu el la anaro mis se fartas
La bonfarto de aliaj forestas
Se vi fajfas pri dolor' de homo
Ĉu “homo” al vi estas deca nomo?

Orfo

Al perdinta sian patron ĵetu vian ombron
Deskuu lian polvon, eltiru lian dornon
Ĉe orfo kies kapo tuŝas lian sinon
Ne kisu ĉe li patre bonvole vian filon
Neniu deviŝas lin se l' orfo ploradas
Se l' orfo koleretas neniu toleradas
Afable liajn polvojn deviŝu de vizaĝo
Afable liajn larmojn forigu via saĝo
Atentu ke la orfon neniu premadu
Ĉe orfo premata Empiro tremadu...

Papiliono kaj najtingalo

Iunokte flortempe sur la gazono
Mi estis, kandel', floro, papiliono
Papiliono najtingalon skoldis
Kiu amon sian al floro heroldis:
Kial vi krias, najtingalo povra?
Kial vi igas vian amon malkovra?
Lernu amon de mi kiu tiom ardas
Ke eĉ iri fajren bruli min ne gardas
La najtingalo aŭdinte lamentis
La insekton gratulis kaj komplimentis:
Ke vi estas feliĉa, malfeliĉa mi
Vi mortas ĉe amatino, kial timi?
Floron mi amas sed efemeran floro
Ĝi iras kun vento mi restas en ploro
Pri tiu vivanto oni devas plori
Kiu foriron de l' am' devas memori

Homeco

La korpon de la hom' animo de la hom' dignas
Ne ĉi vesto bela meriton de la hom' signas
Se la homo estus okuloj, buŝaperturo
Ne estus io li krom pentraj' sur iu muro
Nuraj dormo, manĝo, volupto, estas malbono

Por la bestoj pri la homeco restas malkono
Estu vera homo, birdojn oni ankaŭ trovas
Kiuj en la homa lingvo paroli ja provas
Vera homo al demono la manon ne donas
Eĉ la anĝel' la rangon de l' homo ne disponas
Se la sovaĝeco formortos el via natur'
Vi ekvivos kiel homo vera en la futur'
Iros homo tien kie li nur Dion vidos
Estu averta: kiom alte la homo sidos...

17- Hafez/ Hafizo

حافظ

Hâĝe Ŝâmsoddin Mohâmmâd Hafez Ŝîrazi (1325/26–1389/90?)

Hafez estas unu el la plej famaj kaj plej lertaj perslingvaj poetoj. En siaj belegaj gazaloj li parolas pri sufiismaj, mistikismaj, esoteraj, elpensaj, kutime kontraŭ la ŝario. Liaj gazaloj ĝis nun restas unikaj kaj en neatingebla nivelo. Li naskiĝis en la urbo Ŝîraz (ĉe Persepolo), en mezaj jaroj de la oka jarcento p.H. (14-a p.K). En tiu urbo li studis religiajn sciencojn kaj literaturon. Ĉar li parkerigis la tutan Koranon, li elektis la kromnomon Hafez kiu signifas “parkeriganto”. Tiun profundan sian konon pri la religio kaj Korano pli poste li uzis por moki ŝarion kaj hipokritaĵojn de ulemoj. Verŝajne li por iom da tempo oficis ĉe la Inĝu- kaj Mozaffaridaj reĝoj de Fars (regiono, nuntempe samnoma provinco en Irano, kies ĉefurbo estas Ŝîraz). Li kombinis esoterajn gazalojn kun amgazaloj kaj kreis sian propran stilon. Li kapablis verki mallongajn versojn kiuj entenas tre profundajn, ampleksajn kaj subtilajn sencojn. Liaj esprimoj kaj kunmetaĵoj ofte estas novecaj kaj neologismaj. Hafizo estas la plej lasta unuagrada poeto de la persa klasika poezio. En Esperanto legeblas kelkaj liaj gazaloj, kiujn tradukis William Auld [ŭiljam old].

Gazalo 105

Sufi' se vinon trinkas sed modeste, sanon!

Se ne, forgesi devas li tute ĉi planon

Kiu ame vinon fordonacas kaj pokalon
 Beluline l' sukceso surprenu lian manon
 Nia majstro asertis: La Kreo ne eraris
 Aprezegas mi ĉi pardoneman veteranon
 Turka reĝo aŭskultas la kalumniaĵojn
 Hontmemoru sangon de Siavaŝ kaj Turanon (101)
 Pro orgojlo kvankam ne parolis tiu kun mi
 Mi animon je ties lip' oferas kiel branon
 Spegultenas okuloj por via vizaĝo
 Kispluvu el mia lipparo sur vian kaftanon...

18- Saeb

(1016- 1081 p.H= 1607- 1670 p.K)

صائب

Lia kompleta nomo estas Mirza Mohámmád Áli filo de Mirza Ábdorráhim Saeb Tabrizi. Lia patro estis el la urbo Tabriz kaj migris al Isfahano. Saeb naskiĝis en Isfahano, tie studis kaj plaĉis al Ŝah' Ábbas (1571-1629). Saeb pli poste migris al Barato.

Saeb provis verki en diversaj ĝenroj. Li ne aperis tiom lerta en odo kaj masnavio/ versduoj, sed certe estas majstro en gazalo. Liaj versoj estas trafaj, elokventaj, sencoplenaj, entenantaj subtilajn elpensaĵojn kaj belajn imagaĵojn. Versoj de liaj gazaloj ankoraŭ estas proverboj ĉe perslingvanoj. Saeb estas la plej granda poeto de la Hinda Stilo. Jen poemoj de li:

Strebo de la maljunulo

Aprezu la strebon de sperta maljunulo
 Plum' estas por flugo de la sag' stimulo
 Plias radikoj ĉe maljunpalmo ol ĉe novida
 La maljunhomo estas je mondo pli do avida
 Maliculo unue proksiman homon ĝenas
 Glavo primare vundi sian ingon penas...

El liaj famaj versduoj:

La purulojn la vivo pli turmentas
 Purtritiko en muelil' lamentas

Malpezulon se la vivo ektravas
Ĝin kiel paperon flugigi provas
Petego perfortulon ne atingas
Larmo de l' kebab' fajron malestingas
La amikojn ne provu ofte testi
Se sen amikoj vi ne volas resti
Plenumiĝo de la preĝo per silento eblas
Di' ne akceptas preĝon se vi preĝi kapablas

19– Iráĝ Mirza

(1874–1924)

ایرج میرزا

Iráĝ Mirza filo de Qolamhosejn Mirza estis el pranepoj de la reĝo Fátĥáli Ŝah' Gaĝarida. Krom la persan lingvon, li bone parolis la araban kaj francan. Li kapablis ankaŭ paroli ruse kaj turke. Deknaŭjaraĝe li ricevis la titolon “estro de la poetoj”, tamen baldaŭ li rezignis ofici en kortegoj.

La poemoj de Iráĝ estas pli-malpli modernaj, simplaj kaj proksimaj al la lingvaĵo de la publiko. Ĝis lia tempo la poetoj evitis uzi la simplan popolan lingvon en poezio. Ĉar Iráĝ konatiĝis kun la eksterlandaj literaturoj, la klasika stilo – ankaŭ en kiu li estis lerta – ne plu kontentigis lin verki siajn socitemajn verkaĵojn. Li kreis sian propran stilon, sed ne tute foriris de la klasika stilo. (Tion faris pli poste Nima Juŝiĝ). Jen poemo de li:

Patrino

Oni diras: kiam naskis min panjo
Al mi mamsuĉadon ŝi lernigis
Noktojn maldorme ĉe mia lulilo
Al mi bondormadon ŝi lernigis
Ŝi prenis miajn manojn, min irigis
Al mi vojiradon ŝi lernigis
Literon kaj literon enbuŝigis
Al mi paroladon ŝi lernigis

Metante sur miajn lipojn rideton
Al floro floradon ŝi lernigis
Mia esto estas pro ŝia esto
Al mi panjamadon ŝi lernigis...

20– Párvin E'tesami

(1906–1941)

پروین اعتصامی

Párvin estis filino de Jusef E'tesamolmolk Aŝtiani. Párvin estas unu el la plej lertaj iranaj poetinoj. Ŝia patro, Jusef (m. 1937), estis kapabla aŭtoro kaj tradukisto. Jusef estas unu el la unuaj irananoj kiuj eldonis artikolojn pri Esperanto en Irano. Párvin, en siaj odoj, lingve, sekvas la stilon de la poetoj de la 5a kaj 6a jarcentoj p.H. ĉefe la stilon de Naser Ĥosro (m. 481 p.H. = 1088 p.K.), sed enhance, ŝiaj poemoj estas kritikemaj, novecaj, sentemaj pri sociaj kaj moralaj problemoj kaj foje sub la influo de la parollingvo. En siaj poemoj, ŝi similas al patrino kiu afable parolas al siaj infanoj. Jen poemoj de ŝi:

Ebriulo kaj malebriulo

Policano kaptis ebriulan kolumon por lin aresti
L' ebriulo diris: ne estas brido, sed ĉemizo por vesti
– Vi ebrias kaj tial vi ŝancele kaj falonte promenas
– Pri irado, sinjoro, ne ja temas, la vojo ne ebenas
– Mi devas vin irigi al la kadio, tio estas normo
– Revenu do matentempe, la kadio nun kuŝas en dormo
– Do ni iru kune al la domo de lia moŝta regento
– Eble li drinkas ĉe vinvendistino, ne estas bonmomento
– Vi devas resti en moskeo, mi iros ŝerifon informi
– Absolute ne, en moskeo malbonulo ne rajtas dormi
– Donu dinaron kaŝe kaj mem vin liberigu ordinare
– La aferon de la ŝario oni ne solvas perdinare
– Reparacie mi devas forpreni de vi ĉi ĉemizon
– Estas putrantaj ĝiaj veftovarpoj, ne taŭgas provizon

- Vi estas ebria, vi ne konscias ke falis de vi ĉapo
- Ne gravas esti sen ĉapo, devas esti saĝo en la kapo
- Vi drinkis multe, aĉulo, tial vi ĉi-forme senkonscias
- Se oni drinkas, pri malmulto aŭ multo oni ne scias
- La konscia malebriulo devas ebriulon vipbati
- Neniun mi vidas ĉi tie konscia, ĉesu ultimati...

Larmo de l' orfo

Iun tagon ŝaho tra vojo pasis
 Ĉiu-flanke homoj ĝoje amasis
 Orfo apudulon demandis mirdrone
 Kio estas tio luma surkrone?
 “Nu, mi ne scias”, apudulo diras
 “Klare ĉiu ĝian karon admiras”
 Diris frustrante maljuna ĝibulo:
 “Via korsango, larm’ de mia okulo!
 Por trompi nin li paŝtiste sin vestas
 Tiu lupro jam jarojn engrege nestas”
 Piulo feŭdonhava estas ripozulo
 Reĝo malriĉultrompa estas almozulo
 Rigardu al larmo de orfaj gefiloj
 Jen, de kie venas juvelaj briloj...

21– Nima Juŝiĝ

(1897 – 1960)

نیمایوشیج

***Klarigo:** La libro Gánĝ o Gánĝine (mia fonto por elekti specimenojn) malhavas biografiojn de la modernaj poetoj kaj verkistoj, ĉar ili ne estas bonvenaj en la nuntempaj universitataj tekstoj kaj la aŭtoro ne povis enmeti! Kelkajn mi aldonis: Nima Juŝiĝ, Áhmád Ŝamlu, Sohrab Sepehri, Foruq Fárroĥzad. Por iliaj biografioj mi uzis Vikipedion kaj aliajn retajn eblojn.*

Lia denaska nomo estas Áli Esfándiari. Li estas “la patro de la persa moderna poezio”. Li sukcesis novigi la persan miljaran poezion forlasante la klasikan metrikon. Siatempe li faris veran

literaturan revolucion. Post li, la moderna persa poezio nomiĝas ankaŭ Nima-poezio. Kvankam li tute ne forlasis ritmon, tamen liaj posteuloj, surbaze de liaj instrukcioj, forlasis ajnajn lingvajn engaĝiĝojn. La plej fama poeto post Nima estas Ŝamlu, kies poemstilo famiĝis kun la nomo *Blanka poemo*. La tombo de Nima en Juŝ, lia naskiĝvilaĝo norde en Irano, estas vizitata. Jen kelkaj poemoj de Nima (fragmente):

Likas lunlumo

Likas lunlumo

Lumas lampiro

Kvankam je unu momento nenies okulo perdas la dormon, tamen

Pro zorgo pri ĉi longedormanto

Rompiĝas la dormo en miaj larmaj okuloj

La aŭroro kunzorgas kun mi

Kaj matenon postulas de mi

Ke mi informu ĉi dormantan popolon pri ĝia beata parolo

En mian koron tamen dorno

Pro ĉi vojaĝo rompiĝas...

Aj homoj

Aj homoj kiuj surborde sidas gaje kaj ride

Homo en akvo dronas

Homo en akvo baraktas

En tiu ĉi maro akra malhela peza kiun vi konas

Se ebrias vi pro venko al malamik'

Tiam kiam vi vane pensas

Ke vi malpovulan manon prenis

Por aperigi vian plipovon

Tiam kiam vi streĉe ligas

Viajn talizonojn

Kiam mi diru plu?

Unu homo en akvo dronas, moŝtoj!

Aj homoj kiuj surborde piknikas!

Kun pano sur tablo, kun vesto sur korpo

Homo en akvo vin vokas!...

Kortuŝas min

Kortuŝas min profunde tiu ĉi
Gastejo gastmortiga kies tagoj estas mornaj
Kiu bataligas nekonatojn
Dormantojn
Brutalojn
Nekonsciulojn...

Mi krias

Mi krias
Mia vizaĝo estas sombra
Mia kajako eksidis teren
Mia celo de l' paroloj klaras al vi
Unu mano ne havas sonon
Mia mano petas vian helpon
Mia krio, ĉu silenta en gorgo
Ĉu laŭta
Por via kaj mia liberiĝo
Mi krias
Mi krias...

Dolĉas vivo

Vivo estas ege pimpa, dolĉa
Feliĉege, vivi libere
Sen timo deziri, paroli pri l' deziroj sentime, esti ĝoja...

22- Áhmád Ŝamlu

(1925–2000)

احمد شاملو

Áhmád Ŝamlu, pseŭdonime A. Bamdad, estas, post Nima Juŝiĝ, la dua plej grava poeto de la irana nuntempa poezio. Li naskiĝis en Tehrano, la ĉefurbo de Irano, sed pro la militista profesio de la patro loĝis en pluraj urboj de Irano. Li ne finis sian mezlernejan studadon. Kelkfoje pro politikaj kialoj li malliberiĝis. Por vivteni, aŭ propra interesiĝo, li faris redaktadon de kelkaj ĵurnaloj kaj monataj bultenoj, verkis novelojn, scenarojn, rakon-

tojn por infanoj, poemlibrojn, tradukaĵojn el fremdlingvaj poetoj, ekzemple Federico García Lorca, Majakovskij, k.a. Ankaŭ liaj poemoj estas tradukitaj en la hispanan, rusan, armenan, anglan, francan, germanan, nederlandan, rumanan kaj turkan. Liaj elektitaj poemoj estas eldonitaj ankaŭ en la serba lingvo.

Li famas ĉefe pro sia novstila poemaro. Antaŭ li, Nima Juŝiĝ, alia avangarda poeto, jam subfosis la klasikan poemon de la persa lingvo per la forlaso de la klasika metriko, ĉefe la forlaso de la deviga rimado kaj la samlongeco de la versoj, tamen li ankoraŭ uzis ian ritmon. La poemoj de Ŝamlu, famiĝinta pro Blanka Poemo, tute liberigis sin de ajna klasika devigo. Krom poemojn, Ŝamlu verkis dikvoluman libron pri la popola lingvaĵo; La Libro de la Strato. Politike li estis maldekstrulo. Tial lia akra kritiko pri Ferdoŭsi, la plej fama epopeisto de Irano kaj la verkinato de Ŝahname, kiun Ŝamlu nomis Feŭdulo, kaŭzis malkontenton ĉe irananoj. Post la islama revolucio en Irano, la oficiala rakonto de la persa literaturo tute neglektas lin kaj aliajn liberpensajn aŭtorojn. Liajn verkojn oni absolute ne traktas en sciencaj studoj, sed ĉe la literaturema popolo li estas tamen legata kaj respektata. Lia tombo situas en Kárâĝ, urbo proksima al Tehrano, kaj lian tombŝtonon “nekonataj homoj” plurfoje disrompis! Jen poemoj de Ŝamlu:

Diru vian plej belan parolon

Rivelu vian pro silento kaŝitan turmenton

Kaj ne timu se oni dirus

Ke vi vane kantas

Ĉar nia kanto

Ne estas vanajaĵo

Ĉar la amo

Ne estas vana vorto

Eĉ lasu Sunon ne leviĝi

Pro nia morgaŭo

Se ĝi degne venos

Ĉar la amo

Mem estas morgaŭo

Mem estas ĉiam...

Sen vidi

En ĝardeno
Oni sentas
En la meandra kontraŭvento
La dignan desperon de folio kiu
Senhaste
Teren sidiĝas

Mi ame ŝin amis

Kaj ŝi saĝe min pelis
Ŝia logiko
Estis eĉ pli stulta ol mia stulteco!

Pardonu pluvo

Vi pluvadas kaj ni
Ade ne laviĝas!

Kaj amo

Se malgraŭ ĉi ĉiutagaĵoj
Restu amo
Estas amo!

Se ĉi tiele oni devas vivi parie

Kia senhonta mi estus se mi ne kroĉus mian vivo-lanternon skandale
Al la alto de l' sekpino de mia sen-elira strateto
Se ĉi tiele oni devas vivi pure
Kia malpura mi estus se mi ne enmetus el mia kredo kiel monton
Eternan memoraĵon, en ne-eternan teron.

La silento de l' akvo

Povas
Esti sekeco kaj krio de l' soifo
La silento de l' tritiko
Povas
Esti malsato kaj triumfa tumulto de l' paŭperismo
Same kiel la silento de Suno kiu estas obskuro
Sed la silento de l' homo estas malesto de l' mondo kaj de Dio

Tumulon imagu...
Ni posedis ĉiujn vortojn de l' mondo sed ne diris ion
Kio utilas
Ĉar mankis nur unu vorto:
“Libereco”
Ni ne diris
Vi ĝin imagu!

Larmo estas mistero

Rido estas mistero
Amo estas mistero
Tiunokte larmo estis mia amrido
Mi ne estas fabelo kiun vi rakontu
Mi ne estas kanzono kiun vi kantu
Mi ne estas sono kiun vi aŭdu
Aŭ io kion vi vidu
Aŭ io kion vi sciu
Mi estas komuna doloro
Min krii

Oni flaras vian buŝon

Por vidi ĉu vi dirintis: “mi amas vin”
Oni flaras vian koron!
Estas bizara tempo, karulin’
Kaj la amon oni
Apud la bariero
Vipbatas...
La amon oni devas kaŝi en la kaŝkameron...
Tiu kiu frapas la pardon nokte
Venas mortigi la lampon
La lumon oni devas kaŝi en la kaŝkameron...
Jen buĉistoj
Sur pasejoj
Kun eŝafodoj kaj sangaj haktranĉiloj
Estas bizara tempo, karulin’
Oni forsekcas ridetojn el la lipoj

Kaj kantojn el la buŝoj
La pasion oni devas kaŝi en la kaŝkameron...
Kanarikebabo
Sur fajro de l' lilio kaj siringo
Estas bizara tempo, karulin'
La venkiĝinta satano ebrie
Festenas sur la manĝotablo de nia funebro
Dion oni devas kaŝi en la kaŝkameron...

Balzamo de miaj kronikaj vundoj estas viaj lipanguloj
Mi ne volas kison, nur diru ion

Nenion plu por fari
Havas mi kaj Suno
Ni vekigās por vin ami
ĉiu-matene...

23– Sohrab Sepehri

(1928–1980)

سهراب سپهری

Sohrab estas unu el la famaj poetoj kaj pentristoj de la moderna Irano. Li havas optimisman pensmanieron. Liaj profundaj elpensadoj kaj flue belaj poemoj baziĝas sur liaj profundaj konoj pri la persa literaturo, irana mistikismo kaj ankaŭ budhismo. En la spegulo de siaj poemoj, li ĉiam ŝajnas esti gajanima, ĝuante altajn ekstazojn, ĉu kiam li parolas simple pri la lavado de telero, ĉu kiam li preparolas morton:

Vivo estas lavado de telero

Vivo estas la ektrovo de monereto en la stratkanaletto
(el: La Piedir-sono de Akvo)

Kaj ni ne timu la morton

Morto ne estas la fino de kolombo
Morto ne estas cikada invers'
Morto fluas en akacimens'
(el: La Piedir-sono de Akvo)

Krom esti elokventa poeto, li ankaŭ kapable pentris. Li okazigis multnombrajn ekspoziciojn pri siaj pentraĵoj en Irano kaj eksterlande:

“Li ne estis pentristo kiu nur hodie poemis nek ankaŭ estis poeto kiu de tempo al tempo ekdeziras preni la penikon. Kaj liaj poemoj kaj liaj pentraĵoj estis serioze ĝuantaj la plej altajn karakterizaĵojn artajn.” (Aŝuri Darjuŝ k.a. *Pajami dar Rah* – Mesaĝo sur Vojo– Tehrano: Tahuri, 1981, 136 p. El Vikipedio)

De 1951, kiam li publikigis sian unuan poemlibron; *La Morto de l' Koloro*, ĝis 1967, sep poemaroj de li estis eldonitaj. Tiam por dek jaroj li pli ofte partoprenis en multaj pentraĵekspozicioj en Irano, Francio, Usono kaj Svisio. Liaj poemoj kaj pentraĵoj estas tre intime interligitaj. En liaj pentraĵoj oni povas vidi la spurojn de liaj poemaj scenoj, kaj en la poemoj multokaze paroliĝas pri pentrado:

Mi estas el (la urbo) Kaŝan

Pentristo mi estas

Mi faras kaĝon de tempo al tempo pere de koloro, kaj vendas al vi
por ke per-kante de anemono kiu kaptitas ene de ĝi
via soleca koro refreŝiĝu

Kia supozo, kia supozo, ... mi scias
mia pentraĵo estas senviva

Mi bone scias, la baseno de mia pentraĵo senas je fiŝo.
(el: *La Piedir-sono de Akvo*)

Plejparte liaj verkoj, ĉu poemaj ĉu pentraj, temas pri la naturo. Naturelementaj nomoj, en liaj poemoj, kaj la naturaj koloroj (precipe tiuj troveblaj en dezertoj, kie trovas sin Kaŝan, lia naskiĝurbo) en liaj pentraĵoj, tiel okulfrapas ke oni titolis lin la artisto pri la naturo. Sed ankoraŭ liajn verkojn pli profundigas lia filozofia vidpunkto.

En 1977 li publikigis sian novan poemaron, *Ni Nenio Ni Rigardo*, kune kun ĉiuj siaj antaŭaj sep poemaroj, en unu volumo, nomata *Ok Libroj*. La itinero, kiun li trapasis dum sia artista vivo, bonege montriĝas tra liaj verkoj.

La Piedir-sono de Akvo povus nomiĝi pensmaniera aŭtobiografieto de la poeto: ĝi kronologieske registras pensetapojn kiujn li traspertis dum sia relative mallonga vivo materia (52 jaroj). En Irano, plej multaj homoj emas citi verso(j)n de siaj ŝatataj poetoj dum la ĉiutagaj konversacioj. Eĉ la verkaĵoj de kleruloj en multaj okazoj miksatas kun tiaj saĝornamoj. Sed tia citado plejparte okazas pri la versoj de poetoj kiuj verkis en la klasikaj kaj rimohavaj poemformoj – kaj la citaĵoj plejofte apartenas al pasintjarcentaj poetoj. Ekzistas tre malmultaj novaj poetoj, kies verkerojn la publiko citemus ĉi tiel. Sohrab jam estas unu el ili: tie kaj tie ĉi oni povas aŭdi/legi liajn versojn inter la paroloj/skribaĵoj de personoj de tute diversaj socitavoloj, precipe inter la pli juna generacio. Jene ni provas konatiĝi kun la Sohrab-a mondo tra liaj tiaj verkeroj, kiuj, kiel jam dirite, nun utiligatas ankaŭ kiel proverboj kaj parolornamoj. (el Vikipedio kun etaj ŝanĝoj). Jen kelkaj poemoj de Sohrab:

Voku min

Via voĉo bonas

Via voĉo estas la verdo de tiu bizara planto

Kiu kreskas en la fino de l' sincero de l' aflikto...

Kiu scias ke vi en via kokono de l' soleco solas?

Kiu scias ke vi sopiras lukon al morgaŭ?

Ovru vian kokonon

Vi belas samkiel la papiliigo mem...

Mi plenas de lumo kaj iĝo

Kaj plena de arboj

Plena de vojo, ponto, rivero, ondo

Plena de l' folia ombro sur akvo

Kia sola mia interno...

Vivo ne estas malplena

Amo estas, pomo estas, kredo estas

Jes, dum estas papavo, ni vivu

Fermu la ombrelon

Iru sub pluvon
Penson, memoron, portu sub pluvon
Iru sub pluvon kun ĉiuj homoj de l' urbo
Serĉu amon sub pluvo
Dormu pare sub pluvo
Ludu sub pluvo
Verku sub pluvo
Parolu
Plantu nimfeon
Vivo estas ade malsekiĝi
Vivo estas naĝi en la baseno de l' nun
Demetu la vestojn
L' akvo estas post unu paŝo...

Apud vi mi iĝis pli sola

El vi ĝis via kulmino, etenditas mia vivo
El mi ĝis mi, etenditas vi
Mi kontaktis vin
Aliĝis al la mistero de l' adoro
El vi mi ekmarŝis
Atingis la modalon de l' sufero
Kaj kun ĉio ĉi, ho serena
Kaj kun ĉio ĉi, ho rara
Por mi ne estas vojo el vi al la pordo
Tero vokas pluvon
Mi vin...

En mia koro estas io

Kiel savano de l' lumo
Kiel dormo en aŭroro
Kaj mi estas tiel anksia ke mi volas
kuri ĝis la fino de l' dezerto, grimpi ĝis la pinto de l' monto
Lontane estas sono kiu alvokas min

Se vi venas al mi

Venu suple kaj adaĝe
Por ke ne krevu la minca porcelano de mia soleco

Kiu enamikiĝus kun birdoj de l' ĉielo
Tiu havus la plej trankvilan dormon de l' mondo

Ne estas nia afero
la misteron de l' rozo koni
Nia afero eble estas
en la mistero de l' rozo ŝvebi...

Kie estas la domo de l' amiko?

Aŭrore demandis rajdanto
La ĉielo hezitis
Pasanto donacis la branĉon de l' lumo kiun li havis inter siaj lipoj
al la mallumo de l' sabloj kaj fingromontris
blankpoplon kaj diris:
Ne atinginte al la arbo
Vi vidos hortstrateton kiu pli verdas
ol la dormo de Dio
kaj tie, la amo verdas kiel la plumoj de l' honesto
Vi iru ĝis la fino de tiu strateto
kiu konektiĝas al la malantaŭo de l' maturiĝo
Tie turnu vin al la floro de l' soleco
Du paŝojn antaŭ la floro
Restu ĉe la eterna fontano de l' Tera mitaro
Kaj tiam ĉirkaŭos vin timo serena
En sincero likva de l' spaco, vi aŭdos susuradon
Vi vidos infanon
grimpintan sur alta pino
por preni idojn el la nesto de l' lumo
Demandu lin:
Kie estas la domo de l' amiko?...

Kie ajn mi estas, estu

La ĉielo estas mia
La fenestro, penso, aero, amo, tero, estas miaj
Ne gravas
se foje kreskas
fungoj de l' fremdeco...

Mi ne scias

kial oni diras

ke ĉevalo estas nobla, kolombo estas bela

kaj kial en nenies kaĝo estas vulturo

Trifolio kial malpli belas ol ruĝa tulipo?

La okulojn ni devas lavi

Alimaniere ni devas vidi

La vortojn ni devas lavi...

Kie estas miaj ŝuoj?

mi devas foriri ĉi-nokte

Kiu vokis min: Sohrab!

Estis konata la voĉo

Konata kiel aero kun la korpo de l' folio...

Mi alparolis ĉi-popolon el la plej malfermita fenestro

Mi ne aŭdis vorton, taŭgan por la tempo

Nenies okuloj ame rigardis teron

Neniun ravis ĝardeneto

Neniu konsideris serioza pigon en kampo

Kiel nubo mi ploremas

kiam mi vidas ke Huri

la adoleskanta najbara knabino

sub la plej rara ulmo de Tero

studas ulemajn librojn...

Estas aliaj aferoj tamen

Grandiozaj momentoj

Ekzemple mi vidis poetinon

kiu tiel absorbe spektis la spacon

ke la ĉielo

metis ovojn en ŝiajn okulojn...

24– Foruq Fárrohzad

(1934–1967)

فروغ فرخزاد

Foruq Zámán Fárrohzad, estas fama poetino de la moderna persa poezio. Ŝi estis avangarda poetino dum tempo kiam paroli

pri modernaj konceptoj, ĉefe pri korpaj plezuroj, estis tabuo kaj plej ĉefe, se virino verkus pri tiaj aferoj, estus ankoraŭ pli malakceptebla.

Ŝi komencis sian poetinan karieron per Nima-aj poemoj, kvankam ankoraŭ interesis ŝin la klasika ritma kaj rima persa poemo, sed ŝi baldaŭ trovis sian propran stilon. Restas de ŝi 5 poemolibroj: Kaptito, Muro, Ribelo, Alia naskiĝo, KREDU NI AL LA KOMENCIĜO DE L' MALVARMA SEZONO.

Ŝiaj poemoj jam estas tradukitaj al la lingvoj angla, turka, araba, ĉina, itala, urduo, uzbeka, franca, hispana, japana, germana kaj hebrea.

Ankaŭ ŝia frato Ferejdun Fárroĥzad estis artisto, sed lin oni terormortigis en Bonn, Germanio, en la jaro 1992.

Ŝi mortis 32-jara en aŭtoakcidento. (Vikipedio mallongigite). Jen kelkaj poemoj ŝiaj:

Alia naskiĝo

Tuta mia vivo estas versiklo de l' obskuro
kiu vin, ripetante en si mem,
portos al aŭroro de l' florado kaj eterna kreskado
Mi suspiris vin en ĉi versiklo, ah,
Mi vin en ĉi versiklo
greftis al arbo kaj akvo kaj fajro
La vivo, eble
estas longa strato kie ĉiu-tage virino pasas kun korbo
La vivo, eble
estas ŝnuro per kiu viro sin pendigas de arbbranĉo
La vivo, eble
estas knabo kiu revenas de l' lernejo
La vivo, eble
estas bruligo de cigaredo inter debilecpaŭzo de du seksumoj
aŭ konfuzo rigardo de pasanto
kiu deprenas sian ĉapelon
kaj al alia pasanto, kun sensenca rideto, diras: "bonan matenon"
La vivo, eble
estas tiu stagna momento

kiam mia rigardo sin detruas en la korneoj de viaj okuloj
Kaj en tio ĉi estas sento
kiun mi miksos kun la percepto de Luno kaj kun la percepto de l' obskuro
en ĉambro kiu vastas kiom de soleco
Mia koro
kiu grandas kiom de l' amo
rigardas al la simplaj pretekstoj de sia feliĉo
Al bela malapero de l' floroj en la vazo
Al arbusto kiun vi plantis en nian hejman ĝardenon
Kaj al la kantoj de l' kanarioj
kiuj kantas sammezure de l' fenestro
Ah!
Mia porcio estas jena
Mia porcio estas jena
mia porcio
estas ĉielo kiun pendanta kurteno forprenas de mi
Mia porcio
estas malsupreniri tra forlasita ŝtuparo
kaj atingi ion en putriĝo kaj fremdeco
Mia porcio estas trista promenado en la ĝardeno de l' memoraĵoj
kaj morti en afflikto de voĉo kiu diras al mi:
“mi amas viajn manojn”
Mi plantos miajn manojn en la ĝardenon
Mi verdiĝos, mi scias, mi scias, mi scias...

Mi parolas pri la ekstremo de l' nokto

Mi parolas pri la ekstremo de l' obskuro
kaj pri la ekstremo de l' nokto
Se vi venos al mia domo
Por mi bonvolu kunporti lampon
kaj lukon
tra kiu mi rigardu al la tumulto de l' feliĉa strato...

Mia koro malĝojprematas

Mia koro deprimitas
Mi iras al balkono kaj per miaj fingroj

kareasas la streĉitan haŭton de l' nokto
La lampoj de l' rilato estas mallumaj
La lampoj de l' rilato estas mallumaj
Neniu prezentos min al Suno
Neniu invitos min al la festo de l' paseroj
Memoru la flugon
La birdo mortontas...

Piednotoj:

1– Ŝahname شاهنامه : Ŝah=ŝaho, reĝo kaj ankaŭ plej ĉefa aŭ plej grava aĵo/afero. Name: letero, skribo, libro. Ŝahname estas ĝenerala nomo por tiuj libroj, kiuj priparolas la mitojn kaj (pra)historion de la antaŭislama Irano. En tiuj libroj la historio kaj la mito miksiĝas. Kelkaj libroj havas tiun titolon, sed la plej fama estas “Ŝahname” de Ferdoŭsi.

2– Kálile kaj Demne/ Kalila kaj Dimna/ Kalīla wa Dimna/ Kalila ŭa Dimna/ كليله و دمنه: Hinddevena libro originale “Panĝa Tentara/ Panĉatantra”, kiu estiĝis tempe de la Kuŝana Imperio kaj la Sasanidoj en Persio (2-a jarcento a.K. ĝis 6-a p.K.). Ĝin Kuraciŝto Borzuje tradukis Parsien dum la Sasanida dinastio. En tiu libro la bestoj rakontas fabelojn. Kálile kaj Demne estas la nomoj de du ŝakaloj. La libron oni jam tradukis en multajn aliajn lingvojn. Dum longa tempo en Irano ĝi estis (kaj ankoraŭ estas) lernolibro! Mi ofte demandis min mem: kial? Finfine mi konvinkiĝis ke ĝi estas manifesto por diktaturo; la fabelo okazas en ĝangalo, la leono estas ĉionpova reĝo kaj ĉiuj aliaj bestoj devas obei ĝin!

La reĝo Alfonso la 10-a komisiis la tradukon al la hispana de pluraj orientaj fabeloj kaj rakontoj kiuj kvankam skribitaj en la araba, estis de hinda origino, kiel ekzemple la Kalila ŭa-Dimna, en 1251. Ankaŭ la Sendebār. Ili estis tradukitaj rekte en la kastilian. (Vikipedio)

3– Ŝanag: Baratdevena libro, originale “Tĉanakia”, valora libro pri kuracarto.

4– Ábdollah Moqáffá’ estis sekretario ne de Má’mun, sed de Isa ben Áli, onklo de Mánsur Dávaniqi.

5– Azenŝarĝo: estas antikva pezmezurunuo. Ĉiu azenŝarĝo pezas proksimume 300 kilogramojn.

6– Mohárrám: Laŭ la araba kalendaro la unua monato. La arabaj monatoj laŭvice estas: Mohárrám-Sáfár-Rábiolávvál-Rábios-

sani-Ĝámadiolávvál-Ĝámadiossani-Rágáb-Ŝá'ban– Ramadano ŝávvál-Dhiqá'de-Dhiheĝe.

7– Heĝiro: Fuĝo de Mahometo el Mekko al Medino (la 15-an de julio 622 p.K.). Por trovi proksimume la jaron Y de la kristana erao respondan al la jaro X de la (luna) heĝira, oni apliku la formulon: $Y=X+621,54-(3X/100)$ (PIV). La persa kalendaro uzas la Heĝiron kiel la komencon sed kalkulas la postajn jarojn laŭ la rondiro de Tero ĉirkaŭ Suno (ne Luno).

8– Mádajen; sep proksimaj unu de alia urboj, kiujn en la Siria lingvo oni nomis “Malka Mahoze = Reĝaj urboj” kaj probable en la Parsia (Páhlávi) lingvo Ŝáhristanan. Je la finaj jaroj de la Sasanida dinastio Mádajen konsistis el sep urboj, kvin el kiuj estas certe konataj: 1– Tisfun (Ktesifono/ Ctesiphon). 2– Veh-Árdáŝir. 3– Rumághan. 4– Dárzánidhan. 5– Válaŝ-Abadh. (Vidu: Arthur Christen Sen: *Iran sous les Sassanides*).

9– Transoksiano aŭ Transoksanio – la “Lando trans la Oksuso” (antikva nomo de Amudarĵo) – estas la nomo de grava historia regiono en okcidenta centra Azio. La areo fakte situas inter la du gravaj regionaj riveroj Amudarĵo kaj Sirdarĵo, kun la antikvaj urboj Samarkando kaj Buĥaro. Hodiaŭ ĝi apartenas grandparte al Uzbekio, sed ankaŭ al Kazahio (norde), Taĝikio (oriente) kaj Turkmenio (sude). (Vikipedio)

10– Ĥorasano/o. Regiono en la norda parto de Irano (57°E, 34°N). (reta PIV). Ĥorasano nun estas provinco en Irano. Antaŭe ĝi estis pli vasta, konsistanta el urboj kiuj nun estas partoj de la najbaraj landoj.

11– Ĉar ĝis tiam neniu certis ke oni rajtas traduki la Dian parolon.

12– Nuŝirvan/ Ánuŝirvan/ Nuŝervan, en la Parsia (Páhlávi) lingvo *Ánuŝák Ruvan* = Havanta eternan spiriton. Epiteto de Ĥosroŭ (Kserkso) la unua, la 21-a Sasanida reĝo (531–579 p.K.). Mahometo, la profeto de Islamo, naskiĝis en lia tempo. Laŭ iu hadito la profeto de Islamo diris: “mi naskiĝis en la tempo de justa reĝo”.

13– *Mubed* estas la rangohava pastro de la zoroastrismo. En PIV la vorto mago havas pli-malpli la saman signifon, sed laŭ la persa kulturo la magoj ekzistis eĉ antaŭ Zaratuŝtro mem. Mi volas pli precize klarigi ke la magoj ĝenerale estis klerikoj de la zoroastrismo, mitraismo kaj eĉ antaŭ ili. *Mubed-oj* estas klerikoj de nur la zoroastrismo.

14– Lia origina persa nomo estis Ruzbeh. Li estis persa mubedo. Li fuĝis al Arabio, aliĝis al Mahometo kaj fariĝis fervora islamano. En islama tradicio oni nomas lin Sálman Farsi.

15– Gabrielo/ Ĝábráil, unu el la kvar plej gravaj anĝeloj en Islamo. Ĝi alportis la revelaciojn al la profeto.

16– Fostat estas la unua urbo kiun konstruis la islamanoj en Egiptio en la jaro 18 p.H. (639 p.K.). Ĝin konstruis Ámr filo de As (Ámr-e As). Ĝi estas detruita nun kaj sur ĝia proksimuma loko situas la hodiaŭa urbo “Al-Babe”.

17– Anahid= Anahita, estas Avesta vorto, do arkaik-persa. Temas pri la Esperanta Venuso.

18– Se homo (mal)bonfaras, anĝelo raportas ĝin al la ĉielo.

19– Krom la priskriboj de PIV, ŝejko signifas ankaŭ estron kaj grandulon de mistikistoj, derviŝoj, sufiistoj kaj religiuloj.

20– Sufiismo estas Iran-Islama mistikismo, inkluzive de derviŝismo kaj koncernaj ritoj. Sufiisto/ Sufio/ derviŝo estas adepto de ĝia praktika ritaro. Krom la priskriboj de PIV, derviŝo estas preskaŭ alia sinonimo por la vortoj sufio, mistikulo, pia solulo, ermito k.s., se temas pri praktika ritaro. Se temas pri nur sufiismaj kaj teozofiaj ideoj, la persono nomiĝas Aref kaj la skolo Erfan (io entenanta sufiismon, teozofion kaj mistikismon).

21– Ĥezr (Ĥizr, Ĥazer, Khidr, Khodr, Khader...) estas unu el la profetoj ĉe islamanoj. Li iam kunvojaĝetis kun Moseo... Sufioj tre ŝatas kaj estimas lin. Okcidentaj opinioj pri li estas diferencaj. Kelkaj kredas ke li estas Elija, aliaj diras ke li estas sankta Georgo. Ĉe la islamanoj li estas unu el la eternuloj.

22– *Sama* estas sufiisma kolektiva rit-danco. Pri la *Sama*-sufi-danco kaj ĝia uzo en la sufiuj ceremonioj oni faris/as senfinajn diskutojn. Kelkaj jesas, kelkaj neas kaj iuj deklaras pli moderajn opiniojn. La nuntempa fama tia danco estas tiu danco kiun faras derviŝoj de la Rumi(Mevlana)adeptoj en Turkio (kaj kelkaj aliaj landoj). Vidu la anglan Vikipedion ĉe: “Sama (Sufism)”.

23– Famekonataj mistikuloj kaj sufioj.

24– Fama arabdevena amrakonto, kiu poste populariĝis en aliaj orientaj landoj. Lejli estis la amatino. La vera nomo de la amanto estis Qejs, tamen post ekamo oni nomis lin frenezulo (Máĝnun en la araba lingvo). Nezami Gánjáví, granda persa poeto, verkis poemaron kun la sama titolo “Lejli kaj Máĝnun” pri tiu rakonto. Máĝnun neniam atingis Lejli-on.

25– Du sufiismaj terminoj. Neniigo estas malaperi en Dion per neniigo de la malbonaj karakteroj, post tio komenciĝas reestiĝo en Dio.

26– Siatempo konata kuracisto el kiu la aŭtoro multe citis.

27– Post la morto de la edzo, lia edzino ne rajtas reedziniĝi dum tri monatoj kaj dek tagoj. Tio estas rimedo por malkovri ĉu ŝi estas graveda aŭ ne. Post tiuj tagoj ŝi rajtas denove edziniĝi.

28– Ĥarázmi – en Vikipedio Ĥorazmi, angle Khwarezm...– estas regiono kies nomon oni – baze de la persa skribo خوارزم – skribas kiel Ĥvarázmi, tamen tiu skribo baziĝas nur sur la skriba formo de la koncerna avesta vorto. (Jam de jarcentoj, en la persa lingvo, oni ne plu prononcas V inter Ĥ kaj A...)

29– Mi iom ŝanĝis la originalajn vortojn por akordigi ilin al la literoj (la tradukinto).

30– La teksto estus pli klara se la leganto scius ke Más’ud intencas iel envenigi Altuntaŝ-on en la ĉefurbon kaj puni lin pro politikaj kialoj. Sed la Ĥarázmi-ŝaho, pro multaj spertoj en politiko, antaŭvidinte tion, forkuris al sia lando Ĥarázmi, kiu nome estis sub la regado de la Gaznavida dinastio.

31– Ĉieliro de Mahometo (en la angla Vikipedio The Isra' and Mi'raj) estas du, aŭ kelkaj, partoj de vojaĝo de la profeto ĉ. la jaro 621, korpe kaj spirite, rajdanta sur veturilo simila al mulo kies nomo estis Buraq, el Mekko al La Plej Fora Moskeo, (= fama moskeo en Jerusalemo). Dum tiu vojaĝo, kiu laŭ Tera tempo daŭris tre mal-longe, li vizitis multajn lokojn kaj alten iris ĝis la sepa ĉielo kaj parolis kun Dio...

32– Alhagi estas genro de plantoj en la familio fabacoj. Ili estas popole nomitaj kameldornoj aŭ mana-arbustoj. Alhagi-specioj povas al kutimiĝi al sekegaj regionoj kaj uzi la grundakvon. La genro estis nomita laŭ haĝo. (Vikipedio)

33– Gilan estas norda provinco de Irano, ĉe la bordo de la Kaspia Maro. La Zijarida dinastio, el kiu venas ĉi emiro kaj aŭtoro, regis nordajn kaj iom orientajn partojn de Irano (930–1090). la Zijaridoj kaj Bujidoj estis du branĉoj de la Dejlám-popolo (Dejlamanoj/Dajlamanoj ديلمیان), kiuj devenis de Gilan kaj iam (10–11 jc.) regis grandajn partojn de Irano kaj kaŭzis seriozajn problemojn al la Bagdadaj kalifoj.

34– Ĥanqah/ Khanqah/ Khanghah: kunloĝejo kaj kunsidejo de derviŝoj kaj sufiistoj. Esperante proksimume: Marabutejo. Kie islamaj sanktuloj vivas, preĝas kaj kiu post ilia morto fariĝas pilgrimloko. Terminologie la vorto ekaperas en Maniĥeismo. Ĥan/Ĥane= domo/hejmo kaj Gah= loko/ejo. Kiam prosperis sufiismo en Irano, oni uzis tian lokon kiel klubejon de sufiistoj, fakiroj kaj derviŝoj.

35– Debir-o estis sekretario, verkisto de ŝtataj leteroj kaj dokumentoj, kiu ofte samtempe ankaŭ faris iujn administrajn kaj financajn aferojn.

36– Qánat/ Kanat/ karizo= tradicia formo de freŝakva livero en la dezertaj regionoj. Temas pri horizontalaj kanaletoj, en kiujn oni kondukas la akvon... Vikipedio.

37– En la nuntempa persa alfabeto ne ekzistas aparta litero por montri (e). Oni uzas (h) anstataŭe. Ekzemple por transskribi Ŝahname aŭ Noŭruzname, en la oficialaj tekstoj oni aldonas tiun (h).

Do, eblas ke en la retaj serĉoj vi trovas Ŝahnameh/ Noŭruznameh ktp. Noŭ-ruz-name = Nov-tag-libro. Libro pri Noŭruz.

38– Noŭruz= novtago, la unua tago de la irana novjaro, ĉiam la unua tago de la printempo.

39– Arimano – Angra Mainju= Malbona Racio– estas la principo de la Malbono, en la iranaj religioj. (Ahura)Mazdo estas la principo de la Bono. Zorvan/ Zurvan estas ilia Gepatro. Zorvan grave digis sin mem kaj fariĝis ilia patro/patrino... kaj dividis la mondon inter siaj du filoj. Zorvan ne intervenas la aferojn de la mondo. La mondon kreas kaj administras la du dioj. En la unua periodo Arimano, en la dua periodo Mazdo, en la tria periodo en kiu ni nun estas, ambaŭ. En la fina periodo Ahura-Mazdo venkos kaj la mondo estos bona. Preskaŭ ĉiuj iranaj religioj sin bazas sur tia dualismo.

40– Fárr, Fárre, Fárreh, ..., Wikipedie Khvarenah, estas Dia donajo al specialaj homoj, ĉefe reĝoj, kiu kaŭzas sukceson, venkon, gloron, karismon ktp. ĉe la havanto.

41– جمشید Ĝám/ Ĝámšid/ Jamshid/ mezperse: Jamšit (Brila Jam), mita reĝo. En la Vedoĵ, Jama estas filo de Suno kaj la unua homo kiun venkis la morto. Laŭ Avesto, li estas la unua homo al kiu donis Ahura-Mazdo (Dio) sian religion. Laŭ iranaj mitoj, dum 300 jaroj en lia tempo, ne estis morto nek malsano. Sed li komencis memŝati, tial revenis káj morto káj malsano. Laŭ Ŝahname, la festo Noŭruz estas unu el liaj iniciatoj.

42– Záhhak/ ضحاک / Aĵidahak/... Wikipedie Zahhak, en la persa mitologio estas trimuzela/trikapa drako, poste nomo de la reĝo Bivárásp (havanta 10 000 ĉevalojn), poste filo de Merdas. Merdas estis justa reĝo de araboj kiun la filo (Záhhak) mortigas kaj anstatŭe reĝigas sin. Irananoj kiuj estis malkontentaj pri la reĝado de sia ŝaho (Ĝámšid), petas ke Záhhak fariĝu la reĝo de Persio. Arimano, en la korpo de lerta kuiristo, faris bongustajn viandaĵojn por li kaj rekompence petis kisi liajn ŝultrojn. El la kislukoj kreskis du serpentoj kies manĝo estis ĉiutage la cerbo de du iranaj junuloj. Antaŭ la tempo de Záhhak, la homoj estis vegetaranoj. Záhhak reĝis 1000 jarojn kaj faris tiom da krimaĵoj ke la irananoj denove sopiris la antaŭan sistemon...

43– Ferejdun, Feridun/ Aferidun/ Mezperse: Freton/ Aveste: Thraetaona, estas reĝo el la mita dinastio Piŝdadian. Li inventis multajn ritojn. Laŭ Ŝahname: Ferejdun, la mondŝaho, dividis la mondon inter siaj tri filoj: La okcidenton li donis al Salm (Sarm-Romo), la orienton li donis al Tur (Turlando-Turkestan– Turkoj. Oni ne klare diferencigis inter turkoj kaj ĥinoj!) kaj la koron de la mondo, Iranon, li donis al Iraĝ (IR en IRano aludas al Arjaj popoloj. Irananoj konsideras siajn rason kaj lingvon “Hind-Arjaj” aŭ “Hind-Eŭropaj”).

44– Kejumárs/ Kájomars/ Kiumárs/ Gajomaratha (Vivanto Mortonta) كيومرث... la primara “Káj”. Káj signifas “reĝo” sed pli arkaike... En la persaj mitoj proksimume identa kun Adamo, estas la unua homo kaj reĝo laŭ la irana mitologio.

45– Ofte la benaj frazetoj en la persa lingvo estas citataj en siaj originalaj arablingvaj formoj. Ankaŭ ĉi menciita frazeto originale estas araba.

46– Azano estas tiu krio kiun faras Muezino. Muezino estas PIV-a vorto sed bezonatas ankaŭ la verbo azani (ntr) por pli precize traduki la koncernajn tekstojn.

47– Vakfo, Vikipedie: La Ŭakfo aŭ vakufo, vakfo, transskribita en multaj naciaj lingvoj kiel waqf (arabe: وقف, plurale اوقاف, awqāf), ankaŭ nomata en Magrebo habis (حبس), estas religia donaco (donacio?) en Islamo; ĝenerale temas pri konstruaĵo aŭ terenoj oferitaj de homo al islamaj religianoj kun bonfaraj aŭ publikaj celoj. Laŭ la haditaj, la profeto Mahomedo mem instigis por la donacado en Medino, sed kelkaj akademiuloj asertas ke tio estas influo de la kristanaj orientaj eklezioj.

Ankoraŭ en kelkaj islamaj landoj funkcias tiunoma ŝtata organizaĵo/officejo.

48– Rumi naskiĝis en Balĥo/Baktrio. Balĥo estis urbo en Transoksidano kaj grava urbo en la granda Ĥorasano, tiame irana/persia. Nuntempe ĝi situas norde en Afganio. Infanaĝe li kune kun sia patro almigris al Malgranda Azio, preskaŭ samtempe de la mongola invado. Li ekloĝis kaj mortis en la urbo Konya/ Konjo en la nuntempa

Turkio. Estis/as iam konfliktoj inter tiuj tri landoj rilate al lia nacieco. Li mem deklaris sin kosmopolito.

49– Davudidoj estas idoj de قلیچ ارسلان / Kiliç Arslan Davud/ Kılıç Arslan / Kilitch-Arslan/ Kilij Arslan, kiu estas sultano selĝukida de Rum (1092–1107). Li estas filo kaj posteulo de Sulejman la unua/ Süleyman (1074–1086). La Ruma sultanlando, Salĝükijân-e Rûm= Rumaj Selĝukidoj, estis la daŭrigo de la Granda Selĝuka Imperio en Malgrandazio (Anatolio). La sultanlando ekzistis post la batalo de Manzikerto ekde la jaro 1077 ĝis la jaro 1307. La unua ĉefurbo estis İznik (Nicaea), poste la ĉefurban funkcion transprenis Konya (kie loĝis Rumi). La vorto “Rum” estas persa/araba formo por la Romia Imperio. La selĝukoj nomis la landojn de sia sultanlando “Rum” ĉar ĝi establiĝis sur teritorio longe konsiderata (orient-)”romia”, do bizanca. Tial Moŭlâvi/ Moŭlana nomiĝas Rumi (=Rumano). (El Vikipedio kun kelkaj miaj aldonoj. Said).

50– Kara-Ĥitana Ĥanato, aŭ Kara-Ĥitai Ĥanato – konata ankaŭ kiel Okcidenta Liao – en la ĉina Liáo, 1124–1218; oficiale la Granda Liao estis ĉinigita Ĥitana Imperio en la centra Azio.-Vikipedio.

51– Enspezojn oni purigas fordonante la religajn impostojn!

52– En Islamo oni devas preĝi en vestaĵoj puraj.

53– Por tagnoktaj preĝoj oni devus povi sen aliaj zorgoj koncentriĝi nur al Dio.

54– Auzo belLah! (prononco preskaŭ) Estas frazesprimo ĉe araboj kiun oni uzas ĉe miro aŭ grava afero kaj signifas: ”mi serĉas azilon/rifuĝon ĉe Alaho pro rakontota okazo”.

55– Hadiso/ Hadito/ Haditho, estas diro kaj faro de profeto aŭ imamo en Islamo kiun – apud Korano– islamanoj konsideras obeinda.

56– Estas hadito kaj en la teksto cititas en la araba lingvo.

57– Korano 37:42

58– En la originalo estas ADAR/ AZAR, malnova monatnomo. La ekvivalento depende de sistemoj estas de februaro ĝis marto.

59– Bazanita aŭ alia ŝtono uzata de juvelistoj por difini la titron de oro, arĝento ktp.

60– Laŭ islama teologio, la homo havas diversajn memojn: ordonantan, riproĉan, malbongvidan, cert(ig)an, kontentan, inspiran, puran ktp.

61– Ĉigil/ Ĉegel/ Jagma, turka tribo en centra Azio de kie oni importis sklavinojn kiuj onidire estis tre belegaj.

62– Saleh, unu el la Koranaj profetoj kies kamelo estas menciita en la rakonto pri li. Antikristo venos per azeno.

63– Hatem at-Ta'i poeto arablingva kaj fama pro sia malavara gastamo, de la tribo Taj.

64– Sadio uzas ŝakludajn terminojn por priskribi la disputon. Reĝo/ Damo en la persa ŝakludo estas Ŝaho/ Veziro.

65– Azar/ Azer, laŭ iuj islamanoj patro de Abrahamo, laŭ iuj aliaj: onklo de Abrahamo. En Judismo: Terah. Ŝijaistoj ne akceptas ke (pra)patro de profeto estu idoladoranto. Sadio estis sunaista islamano. Post la longa regado de la mongolidoj, preskaŭ reviviĝis granda irana imperio dum la Safavida dinastio aŭ safavidoj (1501–1722) (perse: دودمان صفوی). Ĝi estas konsiderata kiel la plej granda Irana reĝlando ekde la konkero de la novislamanoj araboj.

66– Parto de la 4-a versiklo de la 65-a ĉapitro (At-Tūalak=eksedziĝo) de Korano.

67– Soffe-Amikoj estis centoj da adeptoj de la islama profeto kiuj migris al Medino kaj ĉar ili jam perdis siajn havaĵojn, la profeto loĝigis ilin en la nordan parton de la Profeta Moskeo, sub granda tegmento. La profeto mem multe subtenis ilin kaj ordonis pri regula monpago al ili el la fisko.

68– Mi devas ion klarigi ĉi tie. Kial de la numero 31 (mort. 1334) mi saltis al 32 (nask. 1880) inter kiuj estas ĉ. kvin jarcentoj? Ĉu ne ekzistas aŭtoroj en tiu periodo? Certe jes, kaj multas la nombro. Sed ili taŭgas por aparta studo pro sia mezniveleco kaj ĝiaj kialoj. Ne troveblas perloj – krom esceptoj – en ĉi periodo. Iom da klarigo eble helpos.

En Irano, ekde plej foraj tempoj, konsekvence de troa diktatoreco kaj despotismo, ĉio dependas de la politiko. Se iam iu ŝaho/reganto estis klera homo, aŭ laŭ sia politika intereso subtenis sciencan, literaturon k.s, tiam aperis bonaj sciencistoj, verkistoj ktp.

La ekprospera periodo de la perslingva (69) literaturo estas la periodo de la Samanida dinastio (261–395 p.H./ 874–1005). Ili komencis movadon kies celo estis revivigi la pasintan iran pompon. Ilia movado daŭris dum la Gaznavida dinastio (977–1186, perse غزنویان Qáznávian), kiu estis persia islama dinastio de tjurka mam-luka deveno, kaj je sia plej granda etendo regis en grandaj partoj de Irano, Afganio, multo de Transoksiano kaj la nordokcidento de la Hindia subkontinento. La gaznavidoj, kvankam mem tjurkoj, tamen elektis la persan lingvon kiel sian kortegan kaj administran lingvon.

La movado daŭris en la periodo de la Selĝukida dinastio (Selĝukoj, Selĝukidoj aŭ Salĝukidoj turka: Selçuk, Selçuk; araba: السلجقة, as-Salâjjiqa; persa: سلجوقیان, Sálĝqian, angle Seljuq dynasty, 1104–1307, kiuj estis membroj de tribo de turka deveno elmigrinta el Turkmenio ĝis Okcidenta Azio) kaj malprosperis dum kaj post la invadoj de la mongoloj (1219–1221).

Post longa tempo ekaperis la Safavidoj (1501–1722), kiuj ĉefe parolis tjurkan lingvon (azera) sed kun la paso de la tempo perslingviĝis. La safavidoj establis unuiĝintan kaj sendependan Iranan ŝtaton unuafoje post la islamaniĝo de Persio kaj ili refirmigis la politikan iran identecon, kaj establis la ŝijaisman islamon kiel la oficialan religion de Irano. La safavidoj, plejparte, okupiĝis pri la ŝanĝo de la oficiala religio el la sunaismo al la ŝijaismo. Ili absolute ne respektis la literaturon. Multaj poetoj kaj aŭtoroj forfuĝis al la kortegoj de la otomana Turkio kaj al la Mogola (16–18-a jc. p.K.) kortego de Barato. Estas ludo de la historio ke kiam la turklingva Safavida regantaro de Irano forpelis la perslingvajn literaturistojn, ilin akceptis la Turkoj kaj Mogoloj, kies kortegoj estis perslingvaj!

Do, iom klaras kial la persa literaturo, dum tiu longa periodo ne sukcesis produkti konsiderindan verkon: simple ĉar la politiko ne permesis. Ĉefe la safavidoj estis tro okupataj establi la novan teologion de la novelektita religio, ŝijaismo, rivali kaj militi kun la otomana Turkio kaj subteni nur militistojn kaj mulaojn. Tamen

en arkitekturo kaj aliaj artoj ili havis grandajn sukcesojn. Ankaŭ ne-rette ili kaŭzis alian prosperon. Poetoj fuĝintaj al Barato, kreis novan stilon, kiun ni nomas Hinda Stilo. Inter ili mi prezentis Saeb.

Post la Safavidoj ekaperis Kaĝaroj, (1794–1925– قاجار – Qaĝar), alia tjurka dinastio. Arthur Kostler opinias ke ili estis la Ĥazaroj/Kazaroj mem. Kaĝaroj estis kaj estas ekzemplo de malbona regado. Ili perdis multajn kaŭkazajn urbojn de Persio. La klasika persa literaturo en ilia tempo perdis sian brilan stilon, sian valoron, sed pro ekkonatiĝo de irananoj kun eŭropanoj, la poezio kaj la prozo komencis alproksimiĝi al la lingvo de la ordinara popolo.

69– Persa/ Farsi: Ekde la jaro 254 p.H./ 868 p.K., kiam J'qub Lejs Sáffari, duonmemstara reganto de la post-islamiĝa Irano, plej unue (re)faris la persan lingvon oficiala lingvo de la kortego, la persa lingvo nomiĝas Farsi. La kialo estas ke en la arabaj alfabeto kaj lingvo ne ekzistas P (ankaŭ en la antaŭa alfabeto, Páhlávi/Parsia alfabeto, P kaj F skribiĝis samforme, kvankam la persa prononcata lingvo havis tiun fonemon > Pil/Fil= elefanto, Sepid/Sefid= blanka, Parsi/Farsi= Persa). Ekde tiam la Farsi/persa-literaturo komencis prosperi. Do, se emfazo bezonatas sur ĉi parto de la historia persa lingvo, ni nomas ĝin Farsi aŭ Nov-persa. Antaŭ ĝi estas Mez-persa kaj Antikva persa. Mezpersa estis la ĉeflingvo de la Sasanida dinastio (296–652 p.K.) kaj Antikva persa estis la ĉeflingvo de la Aĥemenida dinastio (550–330 a.K.).

En nuntempa Irano la nov-persa nomiĝas Farsi, en Afganio: Dari, kaj en Taĝikio: Taĝiki. Tiujn tri idiomojn oni povas konsideri kiel tri dialektojn de la sama lingvo.

70– Ŝáddad, reganto de la tribo Ad, nomis sin dio kaj rivale al Dio konstruigis paradizon.

71– martiriĝis.

72– Puni kulp-malkulpulojn kune kaj sendistinge.

73– La Gila lingvo estas la ĉeflingvo en la provinco Gilan en la nordo de Irano, ĉe Kaspia Maro. Rášt estas la ĉefurbo kaj Ánzáli estas havenurbo de Gilan.

74– Tiuj homoj ĉirkaŭis la pasaĝerojn por proponi siajn servojn kaj peti monon.

75– Azraelo Esp-Vikipedie, Azrael angle, Azraël france, Ezrail perse, estas la anĝelo de la morto en Islamo.

76– En la persa lingvo, populare, oni nomas la tutan Eŭropon “Frankio”= “Frankujo” en PIV.

77– Riĉa homo. Ĉar pilgrimi al Mekko (=haĝo) bezonas sufiĉe da mono.

78– La mulao uzas arabajn terminojn ne kompreneblajn por ne-edukitaj homoj.

79– Homoj kiuj reveninte el Eŭropo, montras sin edukitaj kaj modernaj homoj uzante mikslingvaĵon.

80– Ekde ĉi tie estas mia propra artikolo, kiu aperis iam aliloke. (Said Baluĉi)

81– Korano, Esperanta traduko, 4/60: Ho vi, kredantoj, obeu Allahon kaj obeu Lian senditon kaj tiujn el vi, kiuj posedas la regnon...

82– Sam estas Avesta vorto signifanta “La Nigra”. Nomo de kelkaj iranaj herooj, i.a. la avo de Rostam.

83– Dástan estas alia nomo de Zal, la patro de Rostam.

84– Temas pri Rostam, la heroo de Ŝahname. La versojn rakontas Afrasiab, malamiko de Rostam kaj heroo de ne-iranaj turkdevenaj triboj de Turan/Turlando/Turkestanto.

85– Kvankam Turano en Ŝahname literasence signifas Tur-lando/ Turk-lando/ Tjurk-lando/ Turkestanto, ĝi ampleksas ankaŭ la proksiman Ĉinion. Tur estis unu el la filoj de Ferejdun, la mond-ŝaho. Do, irananoj kaj turananoj estis kuzoj!

86– Tiutempuloj opiniis ke Tero kaj Ĉielo havas po sep tavolojn. Tie ĉi temas pri epopea troigo= tiom da polvo alĉieligis ke unu tavolo, t.e. polva tavolo, de Tero tute leviĝis kaj iris al Ĉielo. Do, Tero> 7-1= 6 tavolojn ekhavis kaj Ĉielo> 7+1= 8 tavolojn!

87– Mogan estas loko en la okcidento kaj Damgan estas urbo oriente en Irano.

88– Sâde: Fajro-festo, 50 tagojn antaŭ Noŭruzo. Tago de la malkovro de fajro laŭ iranaj mitoj.

89– Hermann Ethe; Neupersische Litteratur, Grundriss der Iranischen Philologie, II Band, Strassburg, 1896–1904.
– Edward Browne: A literary History of Persia, vol. II, p. 148

90– Haram/o: mallica laŭ Islamo, mal-halala.

91– Saharoj: vastasence: dezertoj, teritorioj.

92– Maljunulino= naturo. Nov-pelerino =laŭlitere; survesto, metafore; renoviĝo de la malnova naturo.

93– = mateno.

94– flava Suno sur la blua ĉielo.

95– stelojn li similigas al ŝakfiguroj kaj ĉielon al ŝaktabulo.

96– Suno.

97– Mardrinki= forte drinki. Monthepata= kuraĝa.

98– neniĝi en Dion estas la lasta etapo en sufiisma al-Di-marŝo.

99– Loqman Sarahsi/ la Sarahsa estis sufio el kiu Dio prenis racion kaj taskojn.

100– sino= koro, disŝirita koro= tro sopira kaj dolora koro.

101– Siavaŝ aŭ Siavoŝ estas figuro en la epopeo de Ferdoŭsi, Ŝahname. Li estas legenda irana princo. Bela kaj dezirinda junulo, kiu pro seksumdeziro de la edzino de sia reĝa patro fuĝis al Turano (lando de turkoj, rivalo de Irano) kaj tie finfine oni senkapigis lin maljuste. Siavaŝ estas la simbolo de la senkulpeco en la irana literaturo. Jarmilaj kultoj pri li, pli poste, post la islamaniĝo de la popolo, transformiĝis al kultoj pri la tria ŝijaisma imamo, Hosejn.

102– Temas pri malnovaj libroj kies aŭtoroj ne estas konataj.

Dankoj

Mi kore dankas la geamikojn kiuj bonvolis legi kelkajn/multajn/ĉiujn paĝojn de mia manuskripto kaj transdoni siajn rimarkojn al mi. Sen iliaj helpoj, tiu ĉi libro havus ankoraŭ pli da eraroj. Kompreneble la respondeco de ajna eraro restas sur miaj ŝultroj kaj mi klopodos plibonigi la originalan tekston por eventuala iama reeldono. Tiuj geamikoj estas:

1– Gerrit Berveling, kiu rimark(ig)is la neceson de la kompleta lingva revizio. Feliĉe la Esperanton de mia junaĝo mi mem ankoraŭ sufiĉe komprenis por povi revizii. Esti nur inter samnacilingvaj esperantistoj produktas nur memkompreneblan ĵargonon.

2– Bert de Wit, kiu legis parton kaj donis tre utilajn konsilojn, kiujn mi enuzis.

3– Manuela Burghilea, kiu legis la tutan tekston kaj detale korektis tajperarojn, gramatikaĵojn kaj atentigis min prave pri multaj korektindaĵoj. Mi dankas ŝin aparte pro tio ke ŝi malavare reliefigis ankaŭ punktojn kiuj laŭ ŝi estas interesaj.

4– Marianne Pierquin, kiu legis la tutan tekston kaj rigardis la formon kaj informis min pri decaj teknikaj aranĝoj kaj malkovris tajperarojn. Alia specifa kaj grava ŝia helpo estis ke ŝi, responde al mia peto, relegis la tradukon el la vidpunkto de eŭropano. Mi scias ke troviĝas multaj esprimoj en mia traduko kiuj, kvankam fidelaj al la originala teksto, eble povus esti miskomprenataj ĉe alikulturanoj. Ŝi prave kaj trafe sciigis min pri tiaj esprimoj kaj tradukstiloj. La ideon aldoni historian kronologieton al ĉi libro mi ŝuldas al ŝi. Sed la tempo mankis por realigi la ideon en la unua eldono. Se iam aperos la dua eldono, mi aldonos.

5– Anna Striganova kaj Dmitrij Ŝevĉenko, kiuj tre afable proponis al mi libroforman eldonon, kaj faris ĉiujn teknikajn

aferojn por eldoni la libron. Sen ilia helpo mi publikigus ĉi tekston maksimume rete.

6– Duncan Charters, la prezidanto de UEA, pro lia kuraĝigo kiu honorigis min.

7– Profesoro A. Giridhar RAO (Giri) el Bengaluro, Barato, pro la antaŭparolo al ĉi libro. Lin mi aparte dankas pro la interesa enhavo de la antaŭparolo.

8– Rob(erto) Moerbeek, Kiu tre atenteme legis la tutan tekston kaj elsarkis multajn erarojn. Enuzi liajn korektojn estis mia plezuro dum kio mi multe lernis.

9– Esperanto Nederland (Nederlanda Landa Asocio de UEA) kaj nederlandaj esperantistoj kiuj malfermbrake akceptis min kaj permesis ke mi fariĝu membro, poste estrarano kaj poste eĉ prezidanto de la asocio. Interparoli kaj kunlabori kun nederlandaj esperantistoj plivastigis mian lingvokonon kaj mian kulturkonon. En seriozaj kunlaboroj mi tuŝe perceptis ke la nura komuna lingvo ne sufiĉas ĉar la kulturmalsamecoj havas siajn radikojn ne nur en la lingvo. Ni devas pli kaj pli koni diversajn kulturojn kaj provi pli profunde kompreni unu la alian. Literaturo estas bonega rimedo.

10– Azad-Universitato de Tehrano kaj ĝiaj profesoroj: Prof. d-ro M.H. Sahebzámani, Prof. d-ro S.M. Torabi kaj Prof. d-ro Ĝálil Táĝlil. De d-ro Sahebzámani mi lernis kiel trakti la problemon de la lingva malsameco kaj bone ekkonis la valorojn de Esperanto. S-ino Ĵila Sediqi kuraĝigis min verki en Esperanto kaj ŝi mem korektis miajn novelojn kiuj aperis en *Kontakto* kaj aliloke.

D-ro S.M. Torabi kaj d-ro Ĝálil Táĝlil, mem ne estante esperantistoj, permesis al mi elekti mian tezon pri Esperanto. Ili meritas mian apartan dankon.

11– Kelkaj geamikoj ankoraŭ legas la manuskripton kaj pro tempomanko ne finis. Mi enuzos iliajn korektojn kaj sugestojn en la eventualan duan eldonon.



Internacia Kongresa Universitato. Tutmonde. 73-a sesio. 01 – 08 de aŭgusto 2020.

Ĉi-jare la unuan fojon IKU-libro estas elŝutebla senpage jam ekde la komenco de la Virtuala Kongreso de Esperanto. Elŝuti la libron kaj subteni la projekton vi povas ĉe:

<http://iku.trovu.com>



Mark Fettes Ne estas fido nur Elektitaj artikoloj kaj paroladoj el la jaroj 2010–2019

PDF-versio de la libro «Ne estas fido nur» estas tute libere kaj senpage elŝutebla. Ankaŭ aperis ĝia papera versio. Vi povos trovi ĝin en la Libroservo de la Universala Esperanto-Asocio (UEA).

Elŝuti la libron kaj subteni la projekton vi povas ĉe:

<http://mark.trovu.com>

Литературно-художественное издание

Саид Балучи

**Антологический очерк
персидской литературы**

جُنگ مختصر ادبیات فارسی به زبان اسپرانتو

Antologia skizo de la persa literaturo

На языке эсперанто

Подписано в печать 02.01.2021. Формат 84x108/32.

Печать цифровая. Усл. печ. л. 6,72. Уч.-изд. л. 7,4.

Тираж 50 экз.

Издательство «Импэто», Москва, 117593, Литовский б-р 13/12.

E-mail: impeto@impeto.ru

Интернет-магазин: www.lernolibro.ru